

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Treasurer (Kasisto): S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 144 (224)

MELBOURNE

Jan.-Feb., 1976

## LA UNUA PACIFIKA KONGRESO

La Kongreso Pacifika,  
La Unua kaj unika  
en la lando sub la stela kruco  
de l' sud',  
kien venis samcelanoj',  
kaj premiĝis ĉiuj manoj  
reciproke kun fratec' kaj  
varmsalut'.

El Usono, Nov-Zelando,  
Japanio kaj Irlando,  
el Belgio kaj Svedlando trans  
la mar',  
el Kanado kaj Aŭstrio,  
kiel granda familio,  
kune vivis en etoso la  
fratar'.

En kunsido por diskuto,  
sed neniam por disputo  
pri gravegaj temoj sub la  
verda stel'.

La rezulto, fruktodona,  
kaj la lingvo tre impona,  
laŭ la flua parolad' je  
altnivel'.

Societaj la kunvenoj,  
en spirito de festenoj,  
malsamlingvajn homojn ligis  
en kompren',  
kie zumis babilado  
kun feliĉo kaj ridado,  
en komuna lingvo . . la eterna  
ben'.

Estis trista la foriro.  
Ĉiu ĝemis kun sopiro  
al pasinta ĝoj', sed kun la  
firmdecid',  
kunestadi ĉe la dua,  
en spirito rendevua.  
Ne aŭdiĝis adiaŭ' . . nur  
ĝis revid'.

Jen kiel la Pacifika Kongreso inspiris  
veteranon V. J. (Tim) Timmins el  
Sydney.

La Kongreso okazis en la impona  
"Queen's College", kiu staras en granda  
parko kaj) inter kies malnovaj kaj novaj  
konstruaĵoj troviĝas verdaj herbejoj kaj  
dise kreskantaj arbegoj, sub kiuj la  
kongresanoj povis ripoze babiladi inter  
la kongresaj kunvenoj.

La varmeco en la altfenestra manĝ-  
salono, nomita dumkongrese "Hideo  
Yagi Halo", iom minacis la pacon en  
la unuaj tagoj, sed feliĉe la vetero  
mildiĝis por kontribui al glata evoluo  
de la programo. Kongresanoj ricevis  
bongustajn manĝaĵojn kaj komfortajn  
unu-litajn ĉambrojn po \$14 tage, sufiĉe  
modera prezo en la nuna inflacia tempo.

### Propaganda Laboro

La Inform-Oficisto de la L.K.K. (S-ro  
Arnold Baldwin) bone preparis la in-  
formadon al la gazetaro, Radio kaj  
Televido. Sekve de tio 9 Komitatanoj  
parolis en la "komunuma" Radio-Stacio  
3ZZ. La "Etna" Radio-Stacio 3EA  
disaŭdiĝis germanlingvan intervuon

kun Emil Vokal (Vieno) kaj anglalingvan kun la Kongresa Sekretario (Herbert Koppel). La pollingva sekcio de la sama stacio intervjuis S-rojn T. Ilow kaj T. Pisz. La granda ĵurnalo "AGE" (1.1.76) aperigis longan intervjuon kun S-ro Ken Linton.

La japana sekcio de "Radio Australia", la kurtonda radiostacio de la aŭstralia registaro, surbendigis intervjuojn kun japanaj delegitoj kaj poste disaŭdigis ilin al Japanujo.

Preskaŭ ĉiutage aperis novaĵoj pri la kongreso en la gazetaro kaj Radio kaj la tutaŭstralia presagentejo "Australian Associated Press" transprenis la raportojn por gazetoj en aliaj aŭstraliaj urboj. Plue, la Foto-Servo de la registara Inform-Oficejo transsendis serion da fotografajoj al la japana gazetaro. Tiamaniere, por la unua fojo, Esperanto fariĝis temo de transpacifika raportado.

### La Kongreso komenciĝas

Ci-foje la laboroj de la Kongres-Komitato estis pli komplikaj ol kutime, ĉar krom la Unua Pacifika Kongreso de Esperanto (4-10 Jan.) okazis ankaŭ la 20-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso (2-4 Jan.) Pri tiu kongreso vi trovos raporton aliloke.

Jaŭdon, 1-1-76, la membroj de la Kongres-Komitato eklaboris en la Kolegio. En la antaŭhalo de la granda manĝalono S-roj J. Fallu kaj S. Kanaĉki instalas la bone preparitan Ekspozicion de Esperanto, dum Libro-Servantoj Tom Elliott kaj S-ino I. Fallu preparis la ampleksan libro-standon. Ĉe tabloj markitaj "Registaro" kaj "Servo-Centro" deĵoris F-ino Vera Strachan kaj S-inoj Adrienne Paling, Fay Koppel, May Frogley, Barbara Podmore. Ke preskaŭ \$20.000 trapasis la manojn de tiuj ĉi virinoj atestas al la granda laboro, kiun ili faris, akceptante monon por loĝado, ekskursoj, manĝoj, fotografajoj kaj bildpoŝtkartoj. F-inoj Ann Hearn, Lorna Samble kaj S-ino Rita Rathjeans zorgis i.a. pri refreŝaĵoj.

Kiam vesperiĝis la Transporta Servo sub S-ro Len McLochlan eklaboris. S-roj M. Cohen, S. Kanaĉki, K. Linton, R. Reed kaj S-inoj Helen McLochlan, Doris O'Brien, Margaret Sanders kunlaboris por transporti preskaŭ 40 kongresanojn el Sidnejo kaj Brisbane de la Stacidomo al la Kolegio.

### La Di-Servo

Kiel enkonduko al la kongresa programo tre digne impresis la Di-Servo en la plenplena kolegia kapelo, fru-

vespere de 4/1. Helpantoj por la preparoj kaj la funkciado estis Ges-roj A. Baldwin kaj S-roj K. Linton kaj I. Maddern, kiu lasta legis la unuan lecionon el Ĉapitro XIV de Korintanoj I. Komencante sian predikon Pastro C. C. Cowling avertis, ke eble li ofendos la kongregacion per sia aserto, ke la E-Lingvo ne estas facila. Per ekzemploj el la ĉiutaga vivo li montris, ke ĝenerale estas malfacile, komuniki la penson al la oreloj de alilingvuloj, ke ĉiu lingvo interpretas malsame. Tamen liaj esploroj kaj en la Bibliaj lecionoj kaj en la vivo kondukis al la konkludo, ke ne gravas kiom bone oni interpretas per lingvo, plej gravas, ke oni bonfare agadus al siaj homfratoj.

### La Bonveniga Vespero

Vere gajiga estis la programo de la bonveniga vespero. Post transdono de libropremioj al diversnumeraj kongresanoj, instigon al ridado donis ŝercam-kontoj de S-ro P. Schwerin kaj poem-deklamo de Emil Vokal (Vieno) el la stoko de Raymond Schwartz. Ravis Brisbanoj per hora kantado (sub gvidado de S-ino Martin), S-ino May Baxter el sia repertuaro pri la dancarto, kaj S-ro Les Scott per akordiona muziko. Interesajojn el la folkloroj de siaj landoj prezentis novzelandanoj Stefan kaj Victor McGill (laŭ maoria tradicio) kaj kvinslandano Tom O'Grady (monologe). Speciale ekscita estis la muziko de tasmaniano Clarence Strohnetter, kiu unue akompanis sian kantadon ludante gitaron kaj poste, duete kun si, ludis samtempe gitare kaj buŝharmonike.

### Inaŭguro de la Kongreso

En la plenplena kongresejo (Salono "John Booth"), meze de babilada zumado, subite ekregis silento, kiam la honora gasto, Hon. Murray Byrne, la Ministro por Turismo de Viktorio, alvenis kaj estis prezentita al la Prezidanto Prof. Robertson, S-ino Isobe kaj la aliaj honorgastoj sur la podio. Post atentigo pri la historia signifo de la okazintaĵo, Prof. R. Robertson (angla-lingve) prezentis la Ministron por oficiale malfermi la kongreson. S-ro Byrne esprimis ĝojon pri la privilegio plenumi tiun taskon; komentis pri la grandaj ŝanĝoj kiuj okazas en la vivdaŭro de unu homo; pli bonaj metodoj, medicinaj kaj teknikaj, konstante kontribuas al la plilongigo de la homa vivo, sed ĉu a homaro uzos la atingojn por la plibonigo de la homa sorto, aŭ por sindetruo? La mondo ŝrumpas, sed

ankoraŭ la homoj ne scias kunvivadi harmonie. La Esperanto-organizaĵo estas gratulinda ĉar ĝi helpas al spirito de reciproka interfratiĝo. Deklarante la Kongreson malferma, S-ro Byrne deziris al ĝi sukceson kaj al ĉiuj ĝuplenan restadon en Melburno.

Post pianludado la Ministro adiaŭis kaj foriris, akompanate de S-ro K. Linton kaj Ralph Dearnly, kiuj regalis lin en "Eakins". Halo dum li inspektis la Ekspozicion.

Prof. Robertson daŭrigis la inaŭguron. Sekvis la salutoj de diversaj organizaĵoj. S-ro J. Allan, UEA-Cefdel. de Nov-Zelando, kiu aldonis leteran saluton el Koreujo, S-ino Y. Isobe, Japana E-Instituto emfazis la gravecon kaj historiplenan signifon de la Kongreso kaj dankis pro la ebleco por pli intima kaj efika kunlaborado por la progresigo de E en la Pacifika Regiono. S-ro H. Koppel legis salutojn de UEA Prez. D-ro H. Tonkin, de Marjorie Boulton, Familio Isobe, Tokio, kaj D-ro K. Smith, Manly. S-ro J. Allan anstataŭis S-ron K. Linton por UEA, S-ro Volo Guelling salutis nome de SAT, S-ro V. Timmins por Katolika Unuiĝo, S-ro W. Chandler, Ornitologia Rondo, Emil, Vokal, nome de Aŭstria E-Federacio kaj Radio Vieno. S-ino E. Ernst, nome de Belga E-Federacio, F-ino Amy Nilsson, nome de Sveda E-Societo, S-ro C. Fettes nome de Irlandaj E-istoj kaj Vegetarana Asocio. Sekvis Victor McGill (N.Z. Junularo), S-ro Frank Wood (Auckland), S-ro Ralph Dearnly (Wellington), D-ro Balcar (San Francisco), S-ino Ruth McGrath (Perth), S-ro S. Kanaĉki (Melbourne (E-Soc.)), S-ino M. Wybenga (Morwell), S-ro R. Reed (Oakleigh Grupo), S-ro C. Lanyon (Malvern Grupo), F-ino Edith Gibson (Launceston), S-ro N. Gamble (Canberra), S-ro A. Cockling (NSW-Federacio), S-ro Tom Elliott (Sydney E-Soc.), S-ino B. Cleminson (Manly), S-ino D. Sinclair (Kvinslanda Fed.), S-ro Ray Ross (Brisbana E-Soc.), S-ino W. Greenhalgh (St. Lucia), S-ino J. Lehane (Toowoomba), S-ino J. Turner (Rockhampton), S-ino J. Torr (Ora Marborda Grupo).

#### Kongresa Statistiko

Aliĝis al la 2 kongresoj 242 ĝesamideanoj el kiuj 189 fakte ĉeestis. Laŭŝtate venis el Viktorio 58, el Kvinslando 33, el Nov-Zelando 29, el Nov-Sud-Kimrujo 27, el Japanujo 9, el Tasmanio 8, el Okcidenta Aŭstralio 7, el Usono 7, el Suda Aŭstralio 4 kaj po unu el Aŭstrio, Belgio, Irlando, Kanado,

Svedio, A.C.T. kaj Norda Teritorio.

Ni esperis saluti inter ni S-inon Paz A. Macasaet (Manilla) sed bedaŭrinde la Filipina Registaro ne donis al ŝi vojaĝ-permeson.

#### Specialaj Vesperoj

Okazis 3 specialaj vesperoj, dum kiuj diversnacianoj prezentis programojn pri siaj landoj.

La "Aŭstralio kaj Nov-Zelanda Vespero" (lunde, 5/1) konsistis el: (1) Filmoj pri Aŭstralio, "Takto" (Aŭstralio en la sepdekaj jaroj), La "Kvina Fasado" (la Sidneja Opera Domo), ambaŭ kun Esperanto-komentario. Ilin projektis Prof. Robertson.

(2) Filmoj kaj diapozitivaj pri Nov-Zelando, prezentitaj de S-ro J. Allen kaj Stefan McGill. (3) Kantado de Nov-Zelandanoj kaj skeĉo de Stefano kaj Victor McGill kun Maoria danco de Victor.

La "Japana Vespero" okazis mardon, 6/1, S-ro B. Iŝizaki rakontis pri la Pacifika Rondo de Radio-Amatoroj, kiuj interkontaktiĝas nur per Esperanto. Li aludis al S-ro Bunny Chambers en Hawai, kiu trifoje tage alvokas Esperantistajn Radio-Amatorojn. S-ino Michiko Takagi (Nagoya) kantis japane kaj Esperante. S-ino Y. Isobe, vestita en kimono dancis japanan dancon. La tuta japana grupo kantis en horo. S-ino Isobe montris diapozitivajn pri pentraĵoj de artisto kiu veturis al multaj lokoj por pentri Monton Fuji. S-ro E. Ito konkludis la vesperon per montrado de filmoj pri la Internacia Festivalo ĉe Oomoto post la 50-a U.K. en Tokio kaj filmon faritan de Oomoto. "Arto kaj Spirito".

La "Amerika Vespero" okazis jaŭde (8/1). D-ro B. J. Balcar el Monterey (Kalifornio) montris diapozitivajn pri sia urbo kaj pri la "Papilia Festo" kaj S-ino Maria Wenzel (Calgary) montris bildojn pri diversaj partoj de Kanado.

Samvespere, S-ro C. Fettes montris lumbildojn pri Irlando - ĉefe pri sia hejmurbo Dublin kaj ĉirkaŭaĵo.

#### Prelegoj:

Kvarfoje kongresanoj havis la oportunon partopreni frumatene "Lingvajn Seminariojn". En la kongresejo ("Salono "John Booth") S-ro I. T. Maddern aŭdis komencantojn kaj por progresintoj S-ro Ken Linton prelegis en Salono "Brendon Clark".

S-ro Ralph Dearnley (Wellington) 6/1 prelegis pri "La Nov-Zelanda Ministerio de Agrikulturo kaj Fiŝstudoj", kiu detale esploras kaj klopodas

ĉiam plibonigi kaj modernigi teknikojn kaj metodojn de produktado samtempe utiligante informon kaj helpon al la produktantoj. S-ino **Yukiko Isobe** (Tokio) parolante pri "**Virinoj en Moderna Japanio**", konsentis ke la situacio de la virinoj en la pasinteco estis tre malalta, sed tio radikale kaj tre rapide ŝanĝiĝis de post la dua Mondmilito, kaj nun iliaj rajtoj preskaŭ egalas tiujn de la okcidentaj fratinoj, eĉ inkludas la politikan kampon. Ekzistas ankaŭ multaj Virinaj Organizaĵoj. Tamen necesas eduki multajn, ke ili mem devas strebi al la celo.

S-ro **Eizo Ito** (Kameoka) prelegis pri "Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo" (6/1). Li aludis al la monumento en Kameoka kun tiu devizo, kiu resumas la vojon laŭ kiu la homoj marŝas kaj devas marŝi. La religio ekzistas tiom longe kiom la homo mem, sed necesas klopodi al kredo pri unu Dio. Li aludis al la nuna emo al Eku-menismo. Simila tendenco al la celo, ke unu superpotenco regu la mondon, montriĝis en agadoj diversloke por Mondfederacio. Sed monda komunumo postulas ankaŭ komunan lingvon. La Pacifika Kongreso estas brila komenco por plivastiĝi la uzon de nia lingvo en la Pacifika Regiono.

S-ro **Trevor Steele** (Brisbane) faris prelegon demandante "**Kiel statas nun la la Terra Paradizo?**" Lia vere akademia kaj informriĉa prelego estis prezentita en tiel facile komprenebla lingvaĵo, ke ĉiu sekvis kun streĉa atento lian pritrakton pri famaj filozofoj (de Condorcet ĝis Teillard de Chardin), kies konceptoj pri la progreso forte influis la pensadon de samtempaj kleruloj. En pli fruaj epokoj oni kredis pri la progreso per agresemo, sed lastatempe okazis ŝanĝo — pli necesas harmonio pri kiu oni povas nur esperi — kaj Esperantistoj nepre devas esti esperantoj.

S-ro **I. T. Maddern** prelegis (7/1) pri la "**Historio de la Aŭstralia E-movado**", temo bone konata al legantoj de nia gazeto.

"Ĉu altaj idealoj kaj praktikaj rezultoj estas akordigeblaj?" estis la temo de prelego de **D-ro A. Einihovici** (Perth). La nuntempa stato de nia movado ne estas kuraĝiga; idealistoj konsistigas la firman bazon; ekzistas ankaŭ periferiaj hobiistoj. Necesas ŝanĝi nian sistemon varbi kaj instrui — ne enfazu la facilecon, kiu estas nur kompara, sed proponu Esperanton kiel ion valoran. Konkludo: Jes ili estas akordigeblaj, sed ni devas konsistigi

mision por la interfratiĝo de la homoj, kiu farigos baro al la milito.

Serio da prelegetoj provizis varian programon (7/1). **Stefano McGill** (Wellington) pledis pri la neceso pli forte labori, pli bone organizi, por varbi la junularon. S-ro **Ito** parolis pri "**Spertoj en miaj mondvojaĝoj per Esperanto**", S-ro **Christopher Fettes** (Dublin) informis pri la spirita kaj ekonomia bazo de **Vegetarismo** kaj **Arthur Cocking** (Manly) multe amuzis la aŭskultantojn per sia prelego "**Kompatu la grasulojn**".

S-ro **Marcel Leereveld** (8/1) per lumbildoj provis klarigi novan sistemon instrui la Esperanto-gramatikon pere de simboloj — "**Gramatik-Simboliko**".

"**Kion mi vidis en Popola Ĉinio per Esperanto**" estis la titolo de prelegeto de S-ro **E. Ito** (10/1)

### INSTRUISTAJ KUNVENOJ

Ĉe kunsido de membroj kaj Estraro de la "Asocio por la Instruado de Esperanto en Aŭstralio", post dujara paŭzo pro manko de aktivaj laborantoj kaj neeldono de la asocia organo "Klerigo", likvidi la Asocion, kaj dividi la kapitalon de la Asocio (\$185.86) egale inter la "Tajni Goldsmith Memoriala Fonduso" kaj la "F. R. Banham Fonduso", estis decidite.

Aliflanke, S-ro **Trevor Steele** alvokis al kunveno de profesiaj instruistoj por organizi novan pli aktivan Asocion. Post vigla diskuto la partoprenantoj decidis fondi Asocion por la Pacifika Regiono kun la nomo "**Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto**".

Elektiĝis la jena estraro: Prezidanto: S-ro **Trevor Steele**, 3/32 Birdwood St., Coorparoo, 4151; Vic-Prez.: S-ro **Stefan McGill** (Nov-Zelando), dum 1976 ĉe U.E.A. en Rotterdam; Sekretariino: S-inr **Jean Lehane**, 2 A Harms Street, Toowoomba, 4350; Kasisto: S-ro **Tom O'Grady**, 42 Norton St., Upper Mount Gravat, 4122.

La nova Asocio intencas eldoni gazeton 4-foje jare kaj la membrokoto estas \$4.00 jare.

### LA DRAMO-KONKURSO

Merkredvespere (7/1) okazis la Dramo-konkurso en la bela halo de la Hospitalo "Queen Elizabeth", preskaŭ vid-al-vide al la Kolegio. Partoprenis 4 trupoj. La Brisbana E-Societo, la lasta gajninto de la ŝildo, prezentis teatraĵon "La Distra Vespero de la Ekzilitoj", originale verkita de **Trevor Steele**, kiu ankaŭ ĉefrolis en sia duon-

satira, duon-farsa, drameto en formo de televida programo pri la iama (homa) speco nomata "mobjo".

"La Liberigo" estis 3-scena, streĉa teatraĵo, verkita de la konata Nov-Zelanda verkisto, Brendon Clark, kaj prezentita de Nov-Zelandanoj Frank Wood, Donald Bruce kaj la fratoj Stefan kaj Victor McGill.

"Geedza Feliĉo", ŝajne senfina kaj tre populara temo, estis prezentita de duperona trupo el la E-klubo de "Manly" — S-ino Eunice Graham kaj Prof. R. Robertson — kaj verkita de alia "Manly"-ano, S-ino Margaret Liston.

"Malsana Humuro" estis la titolo de aro da amuzaj skeĉoj rilate la vivon kaj morton en hospitalo, prezentitaj de membroj de la E-grupo de "Oakleigh". Reĝisoris F-ino Ann Hearn.

Ĉiuj kvar trupoj meritas gratulon pro bonega prezentado, kiu donis malfacilan taskon al la internacia trio da juĝantoj: Elfriede Ernst (Belujo), Fay Koppel (Aŭstralio), Emil Vokal (Aŭstrio). Ĉiu tamen faris sian ŝuadon sendepende unu de la alia, laŭ la vidpunktoj lingvo-kapablo, enhavo, prezentado, kaj transdonis sian kalkulon al balotkontrolisto Christopher Fettes (Irlando), kiu anoncis ke la gajninto estas la "Manly" Esperanto-Klubo.

Gratulon al la geaktoroj kaj al la verkistino, kies teatraĵo aperis en "Brita Esperantisto" antaŭ kelkaj jaroj.

### Fak-Kunveno

La Fak-Kunsido de la **Ornitologia Rondo Esperantlingva** okazis vendrede (9/1) kaj konsistis el 2 partoj. Unue S-ro Wre. Chandler prezentis informplenan paroladon pri "Lovano, la birdo kiu faras kovigilon". Sekvis la laborkunveno, kiun prezidis S-ro W. Chandler, mond-prezidanto de O.R.E., kiu klarigis la celon de O.R.E. kaj ties "Studgrupo pri Natur-protektado".

Estis decidite starigi Aŭstraliazian Sekcion de O.R.E. La fondiĝa membraro estas 37 Aŭstralianoj kaj unu Nov-Zeladano, el kiuj 20 ĉeestis la kunsidon. La organizo aperigos reĝule propran gazeton "La Suda Mevido", kies provizora redaktoro estas S-ro Chandler, kiu estas (ankaŭ) la provizora prezidanto. Sekretario-Kasisto estas S-ino Betty Cleminson. La kotizo estas \$3.00 jare.

S-ro Chandler atentigis la membraron pri la Premio Simondetti kaj petis ke ĉiuj kapablaj kandidatiĝu por la Aŭstralia ludo gravan rolon en la vivo de O.R.E.

La **U.E.A.** - Kunventon gvidis R. Cef-Delegitoj: S-ro K. Linton (Melbourne) kaj S-ro J. T. Allan (Wellington). S-ro Allan raportis ke Stefan McGill foriros al Rotterdam por dediĉi tutan jaron al volontula laboro en la U.E.A. oficejo. Kelkaj deligitoj, i.a. S-roj Chandler, Schwerin, S-inoj Sinclair, Greenhalgh raportis pri informpetoj ricevitaj kaj S-ro Linton alvokis membrojn fariĝi delegitoj.

La **S.A.T.** - **Kunvenon** gvidis la aŭstralia Peranto S-ro V. Gueltling. Li parolis pri la celoj de S.A.T. kaj klarigis pri la ĉi-jaraj kotizoj. Sekvis prelego de S-ro Marcel Leereveld pri "la Multnaciaj Kompanioj".

### Ekskursoj

Kongresanoj faris kvar ekskursojn. Tiuj kiuj jam ĉeestis la Aŭstralian Kongreson, ekskursis je 3/1 tra la urbo kaj vizitis kelkajn belajn parkojn de Melbourne. La rondveturado finiĝis ĉe "Como House", la historia domo kiu nun apartenas al la organizo "Nacia Kuratoro" (National Trust). Dua urbekurso (5/1) montris aliajn partojn de Melbourne kaj la Marbordojn kaj finiĝis ĉe "Ripponlea", luksa domo en luksa kaj bela parko, alia posedaĵo de la "Nacia Kuratoro".

Tuttaga ekskurso al Healesville okazis jaŭde (8/1) per 2 aŭtobusoj. Post lunĉo en la parko apud la Maroodah-Akvobarilo, kongresanoj veturis al la konata bestrezervejo apud Healesville por vidi la unikajn aŭstraliajn bestojn, precipe koalo, ehidno kaj ornitorinko. La kvara ekskurso (11/1) kondukis postkongrese al Cowes sur insulo "Phillip". Post vespermango apud la marbordo kongresanoj veturis al la loko kien la pingvenoj ĉiuvespere, post tuttaga fiŝkaptado, revenas por nutri la idojn en la sablodunoj.

### La Koncerto

Pri la koncerto, vendredvespere (9/1), respondecis S-ino M. Sanders kaj ĝi okazis en la sama halo kie okazis la Dramo-Konkurso. Anoncisto K. Linton prezentis la artistojn. Dotalenta S-ro Jim Dimo, post akordionludado kun sia edzino Jennifer, ŝerce prezentis kelkajn magiaĵojn. Sekve aŭdiĝis la dolĉa voĉo de S-ino Dorothy Thyer, kiu prezentis plurajn kantojn en Esperanto.

Bekfluta kvinopo, kiu inkludis S-inon kaj F-inon M. Sanders, alternis kun la "Esperanto-Kantistoj" de Morwell — Ges-roj I. Maddern, du flinoj Philippa

kaj Dorothy kun elzo (Ges-roj M. Howes). Vigliga konkludo por ambaŭ partoj de la programo estis la dancado de okmembra trupo de la Svisa Klubo en kolorplenaj kostumoj.

### Pacifika Estonteco

Viglaj diskutoj okazis pri la estonteco de la E-movado en la Pacifika Regiono. F-ino **Judy Campbell** (Dunedin) laŭlegis siajn premiitajn eseojn pri "Esperanto en N.Z. kaj la Pacifiko 1975-1980", kiu enhavis valorajn sugestojn pri estonta agado. S-ino **Ruth McGrath** parolis pri la enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lingvo en la nova Universitato Murdoch, kies lektorino ŝi estas. S-ro **Stefan McGill** parolis pri Esperanto en Nov-Zelando, kie oni jam sukcesis enkonduki Esperanton en la lernejoj — ĉiutage 20-minuta instruado, almenaŭ teorie, kvankam eble la vero estas iom diferenca pro la bezono por kurso por instruistoj.

S-ro **Jim Allan**, Prezidanto de N.Z.-E.A. aldonis, ke, krom la instruado en la lernejoj, ekzistas la korespondaj kursoj, el kiuj venas ŝajne la plej bonaj E-istoj.

D-ro **R. Balcar** (Usono) transdonis proponon de S-ro William Harmon, Prezidanto de ELNA, ke Pacifika Kongreso okazu ĉiun trian jaron. S-ro **H. Koppel**, Kongresa Sekretario, skizis la historion, kiu kondukis al la okazigo de la unua kongreso. Inter 1967 kaj 1972 oni nur diskutis kaj elektis "esplor-komisionojn", sen ia praktika rezulto. Pro tio ne estas realece proponi tro oftan okazigon de pacifikaj kongresoj. Li tial proponis, ke tiuj kongresoj okazu ĉiun kvaran jaron, same kiel la Olimpiaj Ludoj. D-ro **Einihovici** subtenis tiun ideon kaj S-ro **F. Wood** proponis ke estu minimuma interspaco de 4 jaroj. S-ro **J. Allan** raportis, ke en la lasta Nov-Zelanda Kongreso oni sugestis, ke la kongresloko estu laŭvice en la norda kaj la suda Pacifiko. S-ro **Tom Elliott** atentigis ke oni ne forgesu ke en la norda Pacifiko la tempo eble devos esti en la mezo de la jaro. S-ino **Isobe** (Tokio) konsentis ke Tokio estus ideala loko por la dua kongreso, sed ke ŝi mem ne rajtas surprizi la respondecon. Si nur povas transdoni niajn sugestojn. S-ro **H. Koppel** fine proponis la elekton de reprezentantoj, kiuj restos en daŭra kontakto kaj klopodos aranĝi la okazigon de la 2-a Pacifika Kongreso. Tiun proponon la ĉestantoj akceptis kaj elektis la jenan komitaton: S-ron Frank Wood (Auckland), S-inon Y. Isobe (Tokio), S-ron H. Koppel (Melbourne) kaj petos S-ron W. Har-

mon (Los Angeles) akcepti la postenon por Usono.

### La Fermo de la Kongreso

La oficiala fermo de la Kongreso okazis sabate (10/1) kaj komenciĝis per literaturaj prelegetoj. D-ro **Einihovici** deklamis "Al la Fratoj'n. S-ro **Emil Vokal** (Aŭstrio) prezentis poemon "La Majstro antaŭ ni" kaj poste danke adiaŭis. **Stefan McGill** (Wellington) legis vivoveran priskribon "Renverso", dum kiu oni mense vidis aerbatalon inverse, de la fino ĝis la komenco, tiel ke regis fine la ĉiam dezirata paco.

S-ro **P. Schwerin** (Sydney) aldonis pensintigan eron "Ĉu Bigamio"? kiu temis pri geedza interkompreno. S-ino **E. Ernst** (Bruselo) adiaŭe dankis kaj la Kongres-Komitaton kaj la kongresanaron pro mirinda kongreso.

Sekvis disdonado de libroj al transmaraj kongresanoj, kiuj aktive kontribuis al la programo. Ĉiu ricevis el la manoj de Prof. R. Robertson ekzempleron de "Kanaĉo el Kananam" kun aŭtografio de la aŭtoro, S-ro **K. G. Linton**. Prof. Robertson preparis la edukistemon rilate la studadon de fremdaj lingvoj en Aŭstralio. "Ni idealistoj", li diris "lernas -Esperanton kaj celas kontakti samideanojn ĉie ajn. Por ni la Pacifika Kongreso de Esperanto tre gravas, ĉar ne ĉiuj povas vojaĝi eksterlanden por tiaj renkontiĝoj. Per kantado de "La Espero" la kongreso oficiale fermiĝis.

### La Kongresa Bankedo

La Kongresa Bankedo (10/1) okazis en la grandspaca mangsalono de la Kolegio, kun 140 partoprenantoj. Elegantaj tabloj kun floroj kaj kandeloj kontribuis al romantika etoso. Presitaj Menukartoj sciigis en Esperanto la mangajojn kaj la ordon de la tostoj, kiuj alternis kun pladoj. Tostestro **Ken Linton** proponis la toston al la **Regino** kaj kun interspaco sekvis aliaj.

La toston al la Nov-Zelanda E-Asocio proponis Prof. R. Robertson, al kiu respondis S-ro **J. T. Allan** (Prez. de N.Z.E.A.) S-ino **Ruth McGrath** (Perth) proponis la toston al la japana esperantistaro: respondis S-ino **Y. Isobe**. S-ro **Ray Ross** (Brisbane) proponis la toston al la Usona Esperantistaro al kiu respondis D-ro **B. J. Balcar** (Monterey, Kalifornio).

La toston al la Eŭropa Esperantistaro proponis D-ro **Einihovici** (Perth), al kiu respondis S-ro **Emil Vokal** (Vieno). Li dankis al la L.K.K. pro la bonega aranĝo de la kongreso kaj kaptis la oportunon transdoni la "Oran Honor-Insignon" de la Aŭstria Esperantista

Federacio al Kongres-Sekretario Herbert Koppel pro ties multjara laboro por Esperanto, kiu komenciĝis en Aŭstrio antaŭ 40 jaroj. Li transdonis ankaŭ la insignon de la Aŭstria Societo de Esperanto-Amikoj al S-ino I. Einihovici pro la fakto ke ŝi skribis al Viena gazeto kaj petis enkondukon de Esperanto en la mallongondan radio-servon. Leginte tion la aŭstria ĉefministro, Bruno Kreisky, instigis ke la ĉefo de tiu servo elsendu ankaŭ en Esperanto.

La toston al la Aŭstria E-Asocio proponis S-ro Ralph Dearnley, kaj post respondo al tiu, A.E.A. Prezidanto Prof. R. Robertson anoncis ke li devas plenumi agrablan taskon — nome, transdoni laŭ la rekomendo de la Honoriga Komisiono", tri honorinsignojn: al S-ro Ken Linton, kiu persone akceptis; al D-ro C. Caldera (Perth), pere de S-ino Ruth McGrath kaj al S-ro Ralph Harry, C.B.E. (nuntempe en Nov-Jorko) kiun li informos per letero. Fine, S-ro Herbert Koppel, iniciatinto de la Dramo-Trofeo, transdonis tiun al S-ino Eunice Graham, kiu akceptis ĝin en la nomo de la Manly Esperanto-Klubo.

## La 20-a Aŭstria Esperanto-Kongreso

Du tagojn antaŭ la Pacifika Kongreso de Esperanto okazis inter la 2-a kaj 4-a de Januaro, en iom "koncentrita" formo la 20-a Aŭstria Esperanto-Kongreso, kiu konsistis ĉefe el du gravaj aferkunsidoj, sed ankaŭ el malpli pezaj distraĵoj.

Cirkaŭ la te-tasoj (21/1) la jam granda kongresanaro interfratiĝis, inspektis la ekspoziciaĵojn kaj esploris la librostandojn de Tom Elliott. Vespere okazis "Variatea Vespere" al kiu kontribuis S-ro P. Schwerin per ŝercrakontaĵoj, la Brisbananoj (sub direkto de S-ino S. Martin) per kantato — kvarope kaj hore — S-ro Emil Vokal (Aŭstrio) per emociiga legado de poemo de Teo luno, S-ro Les Scott (Manly) per buŝharmoniko kaj Tessa Hodson per amuza monologo, kiu iom rilatis al la instruado de Esperanto. La programo finiĝis per vigla, iom burleska kaj por multaj rememoriga, prezentado "The Old Bull and Bush", laŭ la stilo de malnovaj varieteaj programoj, fare de la "Manly" Esperanto-Klubo.

Prof. R. Robertson malfermis (2/1) la A.E.A.-Generalan Kunvenon kaj la ĉestantoj observis unu minuton da silento por la gesamideanoj mortintaj

dum la pasintaj 2 jaroj: Frank Acs (Orange), Bill Amies (Canberra), Frank Banham (Melbourne), Gerald Browne (Sydney), Desley Davies (Rockhampton), Lindsay Grant (Sydney), Fritz-Mueller-Sorau (Sydney), Gertrude Pollard (Perth), Meg Pritchard (Redcliffe), Florence Rawson (Melbourne) kaj Mitzi Zagorski (Canberra).

La Vic-Sekretario (S-ro Herbert Koppel) legis la protokolon de la lasta generala kunveno 1974 en Brisbano (akceptita).

Prof. R. Robertson raportis ke A.E.A. fine sukcesis trovi — en la persono de S-ro Alan Towsey (Tahmoor) — kapablan redaktoron, kiu estos preta akcepti la taskon kompili kaj prepari por eldono la "Lingvaj Notojn" de S-ro F. R. Banham. Tiun projekton proponis S-ro Ralph Harry, kiu mem komercis fonduson tiucele per donaco de \$50.

Inter la okazajoj dum la pasintaj 2 jaroj Prof. R. Robertson memorigis la jenajn: A.E.A. heredis \$2000 (U.S.), kiun testamentis S-ro W. L. Simpkins (vidu "A.E." Junio/Julio 1975). La du unuaj Honor-Insignoj de A.E.A. estis transdonitaj al S-ro F. R. Banham (postmorte) kaj al S-ro Herbert Koppel, en la kadro de la 1974-a Melburna Zamenhofa Festo. Ĉi-jare la Honor-Komisiono rekomendis tri pluajn membrojn pro elstara laboro por la Esperanto-movado en nia lando. Ties nomojn li anoncos poste dum la Kongresa Bankedo.

La Sekretario (S-ro Russ Baxter) raportis pri la agado de A.E.A. en 1974/75 (vidu aliloke) kaj la Kasisto (S-ro Les Scott) prezentis la Financan Raporton (vidu venontnumere). Ambaŭ raportoj estis unuanime akceptitaj de la membroj, kiuj esprimis dankon al la du oficiistoj.

Sekvis le elekto de la nova Estraro. S-ro W. Chandler gvidis la elekton por la nova prezidanto. S-ro K. Linton proponis Prof-on R. Robertson kiel Prezidanton (subtenis S-ro C. Lanyon), kiu estis unuanime reel/ektita. Estis 3 kandidatoj por la postenoj de 2 Vic-Prezidantoj: S-ro K. Linton (proponis S-ro Gueltling, subtenis S-ro W. Chandler), S-ro R. Baxter (prop. T. Elliott, sub. W. Chandler) kaj S-ro Maddern (prop. S-ino E. Giles, sub. S-ino D. Sinclair). Kiel 1-an Sekretarion Prof. Robertson proponis S-ron Simon Wickendon (sub. Les Scott). D-ro A. Einihovici proponis S-ron H. Koppel kiel 2-an Sekretarion (sub. A. Cocking). Kiel Kasiston S-ro T. Elliott proponis S-ron Les Scott (sub. S-ro J.

### Ĉe la Malfermo

De maldekstre dekstren: S-roj I. Maddern, E. Itoo, J. T. Allan (N.Z.), S-ino Y. Isobe, la Hon. Murray Byrne, Prof. R. Robertson, S-roj K. Linton, R. Dearnley (N.Z.), H. Koppel.



The zinc plates for these Congress photos were generously given by the Apex Engraving Co. Pty. Ltd., Melbourne, as a mark of sympathy with our movement, through our Vice President, Mr. K. G. Linton.



### Parto de Transmaraj Vizitantoj

De maldekstre dekstren: Sidas: C. Fettes (Irlando), F-ino A. Nilsson (Svedujo), S-ino M. Takagi, F-inoj S. Matsusaki, T. Hamada (ĉiuj Japanujo). Staras: S-roj B. Išizaki, E. Itoo (Japanujo), S-inoj E. Ernst, (Belgujo), Y. Isobe (Japanujo), S-roj E. Vokal (Aŭstrio), Morchiši, D-ro S. Koga (Japanujo), S-ino J. Dinnel S-ro J. Stitz, S-ino G. Ross, S-ro G. Carlton, D-ro B. J. Balcar, Kapt. W. Millson, S-ino D. Stitz (ĉiuj Usono).



Matasin). S-ro J. Matasin proponis S-ron T. Elliott kiel Libro-Servanton (subt. N. Gamble). Kiel Redaktoron de la asocia gazeto S-ro Linton proponis S-ro H. Koppel (subt. Russ Baxter). S-ro T. Elliott proponis S-ron K. Linton kiel Cef-Ekzameniston (subt. V. Gueltling). Car S-ino R. McGrath deziris ekŝigi de la "Honoriga Komisiono", S-ro H. Koppel proponis S-ron Ray Ross (Brisbane); subtenis S-ino W. Greenhalgh.

La ĝisnuna Kaskontrolisto S-ro G. Thatcher intencis ekŝigi; S-ro Les Scott proponis S-ron Russ Baxter (subt. S-ino Betty Cleminson). La membraro voĉdonis kaj elektis la sekvantan novan Estraron:

Prezidanto: Prof. R. Robertson (Manly)  
Vic-Prezidantoj: S-ro K. Linton (Melbourne) kaj S-ro I. T. Maddern (Morwell).

1-a Sekretario: S-ro S. Wickendon (Leumeah, NSW)

2-a Sekretario kaj Redaktoro: S-ro H. Koppel (Melbourne).

Kasisto: S-ro L. Scott (Manly).

Libro-Servo: S-ro T. Elliott (Matrville, NSW)

Ekzamenoj: S-ro K. Linton (Melbourne)  
Honoriga (Komisiono: S-roj V. Gueltling V. J. Timmins (Sydney) Ray Ross (Brisbane).

Kaskontrolisto: S-ro R. Baxter (Malua Bay, NSW).

Korespondaj Kursoj: vakas

Publikaj Rilatoj: vakas

S-ro Les Scot atentigis, ke pro la plialtigo de la preskostoj kaj afranko por "Australian Esperantist" nepre necesos altiĝi la membro-kotizojn. Li proponis ke la jara kotizo por individuaj membroj, por kluboj kaj Federacioj estu \$10.00. Por pensiuloj kaj junuloj la kotizo estu \$5.00. Okazis vigla diskuto pri la kotizoj. S-ro K. Linton fine proponis kaj S-ro R. Ross subtenis la akcepton de la novaj kotizoj, kiun la membraro akceptis kontraŭ la voĉoj de 2 membroj.

La plialtigon de la Korespondaj Kursoj proponis S-ro T. Elliott (subtenis V. Gueltling). Same S-ro Linton proponis plialtigon de la Ekzamen-Kotizoj (subt. M. Leereveld). Legu aliloke pri la nunaj prezoj.

La dua A.E.A. Kunveno okazis sabato, 3/1 per mallongaj raportoj de la Federacioj. Raportis por Kvinlando S-ino Doris Sinclair, por Nova Sud-Kimrujo S-ro Arthur Cocking kaj por Viktorio S-ino Adrienne Paling.

Nur unu urbo kandidatis por la honoro aranĝi la 21-an Aŭstralian Esperanto-Kongreson en Januaro 1978.

Juna fraŭlino Edith Gibson surpaŝis la podion kaj proponis Launceston kiel venontan kongresurbon. S-ro H. Koppel raportis ke li ĉeestis en Novembro 1975 Tasmanian E-Konferencon en Launceston kaj ke li trovis la membrojn de la nova klubo de Launceston viglaj kaj bonaj organizantoj. D-ro Einihovici indikis ke volonte li faros la longan vojaĝon el Perth por ĉeesti kongreson en Launceston, ankaŭ S-ro R. Ross (Brisbane) pensis same. S-roj V. Gueltling, J. Matasin kaj T. Elliott subtenis la proponon, kiuj estis unuanime akceptita.

S-ro K. Linton alvokis la membrojn subteni transmaran proponon fari donacon al D-ro Ivo Lapenna pro ties laboro por Esperanto en la pasinteco. La ĉeestantoj montris sian aprobon per donaco de proks. \$100.

Samvespere oni aŭskultis kun plezuro la belsonan, bonstilan Esperanton de S-ino E. Ernst, kiu prezentis faktojn kaj rakontojn kun belaj lumbildoj pri Belgujo kaj la urbo Bruselo. Sin sekvis S-ro Emil Vokal (Vieno), kiu post historia skizo, per komentario kaj interesaj lumbildoj gvidis nin ĉirkaŭ sia hejmurbo Vieno.

La Kongresa Komitato deziras esprimi sian plej koran dankon al Arthur kaj Eileen Oliver (The Esperanto Publishing Company, 9 Maycock Place, Orelia, W.A., 6167) pro la donaco de 13 ekzempleroj de "Kanakano el Kananam", kiuj estis donacitaj al transmaraj kontribuintoj al la Kongres-Programo.

## PACIFIKA POST-KONGRESO EN SIDNEJO

Multaj kongresanoj — eksterlandanoj kaj aliŝtatanoj aŭstraliaj — forveturis (12/1) de Melburno al Sidnejo por partopreni en postkongreso tie. Ili vojaĝis diversmaniere, sed pluraj aliĝis al aŭtomobila karavano por pli bone konatiĝi kun la komparo kaj iom esplori survoje la nacian ĉefurbon Canberra, pri kiu lasta entuziasme raportis en letero belga S-ino E. Ernst, pasaĝero en la aŭto de S-ro Volo Gueltling. Kunpasaĝero estis Aŭstriano Emil Vokal. Tranoktante unufoje en Yass, la trio alvenis en Sidnejo vespere de mardo (13/1), do, en bona tempo por la sekvontaj kongresaj aranĝoj.

Post libera antaŭtagmezo (14/1), vizitantoj, sub gvidado de Prof. Robertson, esploris la imponan Operdomon. Skribis S-ino Ernst: "Estis angleparolanta gvidantino, sed oni flustre tradukis esperantlingve", pri tiu "grandioza, aŭdaca konstruaĵo, kun, ne nur impona ekstera aspekto, sed ankaŭ tre plaĉa interno."

En la vespero, Ges-roj Matasin akceptis en sian domon 54 gesamideanojn kaj malavare regalis ilin. En etoso de internacia familia rondo ili gaje interfratiĝis, dum, tra grandaj fenestroj, ili ĝuis la noktan panoramon trans Middle Harbour.

Raportis S-ino Edna Giles: "Denove la mateno (15/1) estis je libera dispono, sed akurate je la 12.30-a ĉiuj jam kolektiĝis sur la pramo "Captain Cook" por lunĉo kaj rondveturado de la mond fama haveno." Klarigo per la mikrofono pri la vidindaĵoj survoje estis en angla lingvo, sed abundis E-istaj interpretistoj. Reveninte, la vizitantoj marŝis al la malnova "Roka Kvartalo" kaj esploris la vendejojn por antikvaĵoj.

La vespera rendezvejo estis la Esperanto-Domo de Sidnejo, kiu fariĝis plena de gesamideanoj, por aŭskulti prelegojn kun diapozitivaj prezentitajn per bonstila Esperanto de S-ino E. Ernst el Bruselo kaj E. Vokal el Vieno.

Vendredon (16/1) okazis akcepto en la Urbdomo de Manly, aranĝita de Skabeno Frank Preacher, kiu prezentis al la Urbestro kaj 5 Skabenoj A.E.A. Prezidanton Prof. R. Robertson. Ĉi tiu siavice prezentis la eksterlandajn gastojn, kaj S-ro Arthur Cocking humurplene parolis pri la Pacifika Kongreso kaj montris kaj klarigis la "Migrantan Premion" — (la "Draman Sildon") ĵus regajntan de la loka klubo. Fotografisto de la loka ĵurnalo "Manly Daily" ĉeestis, kaj poste aperis en tiu gazeto artikolo kun bildo — bona propagando por Esperanto. Nome de la eksterlandaj gastoj, S-ino E. Ernst esprimis dankon al la Urbestro.

Vespere denove la gesamideanaro renkontiĝis en la hejmo de S-ino Ruth Carruthers kaj ĝuis pianludadon, komunkantadon kaj paroladon pri konkoj kun kompreneble ankoraŭ unu regalo.

Semajnfine jam multaj vizitantoj forveturis, sed bone improvizita ekskurso tuttaĝa al Ku-ring-gai Chase kaj Palm Beach okazis dimanĉon (18/1) kun pikniko. La Postkongreso finiĝis per reciprokaj kaj emociitaj dankesprimoj kaj la espero baldaŭ denove renkontiĝi.

## A.E.A.-RAPORTO 1974-1975

Konsiderinte, ke ni trapasis inflacian periodon, ke kostoj pligrandiĝis, kaj ke nia kotizo kreskis je nur 66% dum pli ol dek jaroj, oni povas raportiri, ke A.E.A. restas sufiĉe forta kaj sana.

Aliflanke, dum la venontaj du jaroj elspezoj nepre daŭre altiĝos. Represado de "Freedom of Speech" kaj la Populara Kurso (ambaŭ havindaj, eĉ havendaj iloj) necesos en 1976. Kvankam nian kost-situacion mildiĝos nia nepagata presanto Tom Elliott, tamen la kostoj de materialoj ege kreskos. Plia sekvo de kontinua inflacio estos la pligranda kosto de la gazeto.

La nombro da A.E.A.-membroj (krom en "Reader's Digest"-reklama periodo) restas pli-malpli konstanta. La Populara kaj Mezgrada Kursoj daŭris esti multe petataj. Estas menciinde, ke pligranda nombro da studentoj komencis Superan Kurson en 1974-75 ol dum iu simila periodo.

Dank' al la kunlaborado de la Kursgvidantoj mi neniam ricevis eĉ unu plendon kontraŭ ili. Mi deziras aparte mencii s-rojn Wre Chandler, Tim Timmins kaj John Moore. Estas notinde, ke John Moore provizis al ni kelkajn novajn kursgvidantojn.

Ĉe la Kongreso en 1972 ni havis "R. D."-reklamon. Ĉe la lasta Kongreso ni havis la kutimajn verdkartojn. Nuntempe, ni havas novajn kartoĵojn, utilajn por legemuloj pro la formo, utilajn por klub-membroj pro la plano. La Estraro vokas al vi, bonvole portu ilin, disvastigu ilin (inter viaj najbaroj, ie, ĉie), donu ilin al via Klub-estraro. La pasinteco pruvis, ke la verdkartoj estas nia plej bona disponebla reklamo.

En 1974 ni penis utiligi ABC "ACCESS" - programon - sensukcese. Poste mi rigardis programon pri simboloj por internacia komuniko. Ĉu iu povas klarigi tian strangan aĉadon?

Ankaŭ en 1974 nia aminda amiko s-ro Reg. Banham, Redaktoro de "The Australian Esperantist", mortis. La pezan respondecon de redaktado tuj akceptis nia Vic-Sekretario, s-ro Herbert Koppel. Dank' al li nia gazeto daŭre aperis, kvankam, pro la kosto, nur okfoje jare. S-ro Jack Fallu ankoraŭ prizorgas la dissendon de la gazeto; al li ni kore esprimas dankon.

**NIA LIBROSERVO:** Kapabla, agrabla Tom Elliott daŭrigis ĝin administri dum pli ol ses jaroj. Ni ĉiuj ŝuldas al li varman dankon pro lia sindonemo.

**FINANCOJ:** Raporton prezentos S-ro Les Scott, nia kasisto dum ses jaroj. Nia kunlaborado, glata kaj feliĉa meritas mencion. Pro la jam menciitaj presotaj "F. of Sp." kaj Populara Kurso, vi komprenos, ke ni nepre devas atendi kotizo-altigon. La granda donaco de s-ro Simpkins, preskribita en AE, meritas niajn laŭdon kaj dankon.

Post kvar jaroj kiel via sekretario mi devas ekŝigi. Pro mia laboro kaj pro tio, ke mi transloĝiĝis al la kamparo mi ne plu povos doni al la ofico sufiĉan atenton. Inter la kandidatoj mi mencias s-ron Simon Wickenden. Mi volonte transdonus tiun oficon al li. Li sin dediĉas al du celoj, sia laboro (urboplanismo) kaj Esperanto. Estas menciinde, ke ankaŭ lia edzino estas Esperantisto. Bonvole subtenu lin.

Dank' al la helpo de nia Prezidanto, Prof. Robbie Robertson, la ofico donis al mi plezuron.

Dum multaj jaroj via asocio restis en zorgemaj, sinceraj manoj. Tom, Les kaj John estas elstaraj ekzemploj tiurilate. La Estraro ege deziras, ke ĉiuj kunlaboradu—kluloj, federacioj, individuoj. La 30an de Decembro, 1975.

—Russ Baxter, Sekretario.

### ATTENTION ALL MEMBERS

New Subscription Rates for A.E.A. and for the Correspondence Courses were confirmed at the Congress in Melbourne, in January. These new rates include a posted copy of "The Australian Esperantist", printed almost every month. They are:

Individual or Family Subscription	\$10.00
Pensioners or Juniors	\$5.00
Popular Correspondence Course (Elementary)	\$12.00
Intermediate Correspondence Course	\$16.00
Advanced Correspondence Course (Supera)	\$24.00

(Students holding correct textbooks may deduct \$2.00)

Test Fees: Elementary, \$3.00; Advanced \$5.00.

All subscriptions, donations, course or examination fees, or **any cash whatever** for the Australian Esperanto Association, **other than** for the Libro-Servo, should be paid **only** to either, (1) **The Secretary:** S-ro Simon Wickenden, "Esperantujo", 498 Pembroke Road, LEUMEAH, N.S.W., 2560. or (2) **The Treasurer:** S-ro Les Scott, 34 Ocean Road, MANLY, N.S.W. 2095.

Please, **under no circumstances, pay any cash for A.E.A. to any of the following:**

- (1) S-ro K. G. Linton (Chief Delegate in Australia for U.E.A.), 11 Poplar Street, South Caulfield, Vic. 3162.
- (2) S-ro H. Koppel (Editor of "The Australian Esperantist"), G.P.O. Box 2122T, MELBOURNE, Vic. 3001.
- (3) S-ro T. Elliott (A.E.A. Libro-Servo), 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036.

If you send A.E.A. money to any of the above, or even hand it to them, they have to send it on to the Secretary or the Treasurer. This not only causes extra work and expense for these great workers, but it delays prompt attention to your payment and/or requests. **All correspondence** should be addressed to the **Secretary**. Would you please put this issue of the magazine in the "**Special**", **Easily Referred To Location**.

If all members and prospective members will follow these guidelines, it will be a tremendous help. We are all very busy people, working in the best interests of Esperanto in Australia and, with your co-operation, we shall be able to provide an even better service.

—Les Scott, Treasurer.

### A.E.A. EKZAMENOJ

**Elementa kaj Supera:** Parto A. (Skriba) \$2.00; Parto B. (Parola) \$2.00; Diplomato \$2.00.

**Kfereca:** Parto A. (Tezo) \$4.00; Parto B. (Skriba) \$4.00; Parto C. (Parola) \$4.00; Diplomato \$4.00.



**PERTH:** La Generala Kunveno de la Ligo okazis la 3-an de Decembro en Nedlands. Laŭ la raporto de la Sekretario la Ligo havis en 1975 okdek kvin membrojn (74 en 1974). Laŭ la raporto de la Kasisto la Ligo enspezis \$294 pli ol ĝi elspezis. La kotizo por 1976 restos sama kiel en 1975, nome \$5 por plenrajtaj membroj kaj \$2.50 por Studentoj kaj kamparaj membroj.

La nova estraro konsistas el: Prez: S-ro. R. Smeets; Vic-Prez: S-ro J. Hawks, Sekretario: S-ro W. H. Howard; Kasisto: S-ro O. Loneragan; Ekzamenoj: S-ro R. McGrath; Publikeco: S-ro E. Thew;; Bibliotekisto: S-ro R. Brittain.

La Zamenhof-Festo okazis je 15/12 en la Komunuma Centro ĉe Shenton Park. Specialaj gastoj estis F-ino E. Parker, urbestro de Subiaco kaj S-ro M. Knight, (U.N.O. organizo). Post tre kontentiga vespermanĝo sekvis la programo, aranĝita de D-ro Einihovici. S-ro Bertonazzo kantis en itala, jugoslava, angla kaj Esperanto-lingvoj kaj S-ino Dawn Antulov kantis kaj orgene akompanis sin. S-roj R. Smeets kaj Chris Dean prezentis skeĉon kaj S-ro Eric Thew faris la festparoladon.

Je 3-a Decembro okazis ĉe la lernejo en Floreat Park Esperanto-Koncerto, en kiu partoprenis 120 geknaboj el 10 lernejoj. La infanoj prezentis skeĉojn, bone kantis kaj ludis teatraĵojn. Fotoj aperis en "West Australian" kaj en la T.V. - Programo "Today - Tonight" (Kanalo 2).

S-ro Taylor, la estro de la Floreat Park Lernejo parolis pri la sukceso de Esperanto en la lernejo kaj prezentis 3 premiojn al la 3 plej kapablaj studentoj. Inter la gastoj estis S-ro Menzaros, Ministro por Evoluado, kiu estis impresita pri la rimarkoj faritaj de S-ro Taylor.

**MELBOURNE:** La Zamenhofa Festo okazis la 6-an de Dec. en la halo de la Skoltina Asocio. S-ro H. Beechey, Prez. de la Melburna E-Societo salutis la 42 ĉeestantojn kaj rememorigis, ke la Esperantismo estas sen politikaj kaj religiaj aliĝoj. "Ni metas nian Esperantisman antaŭ politikaj konsideroj, fakte, tutan semajnon antaŭe", li ŝerce aldonis, aludante la plifruigon de la festo por eviti la tutaustralian voĉdonadon de la 13-a. S-ino Sanders ludis la pianon, anoj de la Malvern-grupo ludis amuzan skeĉon "Senpaga Eniro" kaj hore kantis. Bekfluta dueto de S-ino kaj F-ino Sanders, skeĉoj de la Oakleigh-grupo, poemdeklamo de S-ro H. Koppel "Paco estas en la koro" kaj revuo pri la agado dum 1975 de S-ro A. Baldwin estis aliaj programeroj.

Festparolanto estis Pastro James Midgley, kies titolo "Esperanto — Dia aŭ Diabla" aludis la uzadon kaj misuzadon de lingvo internacia. "La homaro ne unuiĝos per lingvo" emfazis S-ro Midgley, "Esperanto ne celas AL, sed estas rimedo POR interfratiĝo de la homaro". Li substrekkis sian aserton pri la vera Esperantismo aludante la vortojn de D-ro Zamenhof tiurilate en la Deklaracio de Boulogne-sur-Mer.

Sekvis "La Espero" kaj la kutima refreŝiga regalo.

**SYDNEY** kaj **MANLY** kune festis la Zamenhofan naskiĝdaton je la 13-a de Dec. Ĉeestis ankaŭ S-ro N. Gamble el Kanbero. Kiel festparoladon, S-ro Volo Gueltling legis leteron, skribitan de D-ro Zamenhof al rusa amiko, en kiu, i.a., li klarigis la bezonon por neŭtrala lingvo. S-ino Marjorie Duncan plurfoje gvidis komunan kantadon, kaj, el letero, priskribis marvojaĝon de "Manly" anino, Ann Gash, kiu velveturis sola trans la Hindan Oceanon survoje al Eŭropo. D-ro Kevin Smith parolis pri D-ro Lapenna kaj proponita dankesprimado, pro lia granda laboro, pere de fonduso diskutota ĉe la venonta Kongreso en Melburno. S-ro Arthur Cocking detaligis aranĝojn por la Post-kongreso en Sidnejo, kaj poste parolis angle laŭ la temo "Was Zamenhof right?" Li ankaŭ deklamis la poemon "Clancy of the Overflow", kies E-lingvan tradukon en "The A.E." legis S-ro Wre Chandler. Transdonante salutojn de Kanbera-anoj, S-ro Gamble parolis pri projektita monumento honore al Walter Burley Griffin, planinto de la urbo, Kanbero. La programon konkludis prezentado, "The Old Bull and Bush" laŭ la stilo de malnovaj muzikhaloj, fare de "Manly" anoj, Marjorie Duncan, Kay Morrison, Eunice Graham, Betty Cleminson, Arthur Cocking kaj Edna Giles.

E. Giles — M. Chaldecott

**ST.LUCIA:** Nia ĝenerala kunveno okazis la 3-an de decembro kaj la novelektita estraro estas: Prez. kaj Libro-Peranto: S-ino W. Greenhalgh; Vic-Prez. kaj Sekretario: S-ino M. Jones Kasistino: S-ino D. Degan; Bibliotekistino: S-ino J. Munro; Komitatanoj: S-inoj A. Spencer, M. Dickenson, E. Taylor, E. Cooney, V. Chamberlin kaj N. Cuskelly. Tri kursoj daŭros en 1976 ĉe la hejmo de Winsome Greenhalgh, ekde 4-a de februaro.

Ciuj anoj ĝuis lunĉoran Zamenhofan Feston je lo-a Dec. ĉe "Coronation Motel" Restoracio. Ni bonvenigis S-inon Ivy McElwee.

—W. Greenhalgh

La 16-an de novembro mortis en Redcliffe S-ino Meg Pritchard. Si estis membro dum multaj jaroj; estis sekretario, prezidanto kaj instruisto de la grupo.

Kiam fondiĝis la Esperanto-Federacio de Kvinlando Meg Pritchard fariĝis ĝia unua kasisto kaj multe helpis al la federacio.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Treasurer (Kasisto): S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 145 (225)

MELBOURNE

Marto, 1976

## MORTIS KOLOMANO KALOCSAY

(Budapest, 27-2-76)

" . . . . . la granda veteran'  
Foriris, por eterne ripozi en traakvilo."



Verkinte tiun belsonan, esprimivan frazon okaze de la morto de Akademia Prezidanto, Theophile Cart (vd. en "Streĉita Kordo" aŭ "Parnasa Gvidlibro"), la hungara literatura "koloso" tiel postlasis vortojn nun kortuŝe aplikeblajn al li; kaj daŭrigante senĉese sian herulan laboron por la Esperanto-literaturo kaj lingvo, li konstruis propran monumenton apenaŭ supereblan.

Kolomano Kalocsay naskiĝis 6-10-1891 en Abauzsanto; lernis en Miskolca gimnazio kaj studis en Budapeŝta universitato. Li varbiĝis al Esperanto en 1913, proksimume 3 jarojn antaŭ ol li doktoriĝis pri la medicino, kvankam lia ekinteresiĝo pri la lingvo okazis iom pli frue, kiel li mem rakontis al intervjuisto L. Halka por la eldonaĵo "Argenta Duopo".

"En la jaro 1911, dum la somera ferio, promenante sur la ĉefstrato de Miskolc kun mia amiko . . . mi ekvidis Esperantan lernolibron en montrofenestro de librovendejo. Ni aĉetis la libron; ekplaĉis al ni la afero . . . Sed plene mi lernis la lingvon nur dum la sekvanta ferio, kiam mi faris en Miskolc kurson por po 20 gedisĉiploj."

Kalocsay plue konfesis, ke en 1912 li studis ankaŭ Idon sed li "neniam partoprenis en la Ido-movado, nek verkis ion en Ido: mia interesiĝo estis pure

lingva kaj ĉesis post la ellerno de mia Ido-Libro." Li fariĝis Esperanta verkisto, kiam li "provis traduki hungaran poemon kaj trovis tion ebla."

Kiam en 1933-34 estis eldonita la duvoluma "Enciklopedio de Esperanto", lia agado jam fariĝis temo por 3-kolumna priskribo verkita de Gaston Waringhien. Cetere, al tiuj du volumoj, en si mem monumenta tasko tiutempa, Kalocsay faris ne malgrandan kontribuon.

Kiel kuracisto, li servis 3 jarojn sur la batalkampo dum la unua mondmilito, sed en 1929 jam enoficiĝis kiel ĉefkuracisto en urba hospitalo por infektaj malsanoj. Samjare li fariĝis docento ĉe la medicina fakultato kaj ankaŭ edziĝis. Sajne nek la ekzino nek la flino de tiu unuigo iel aktive partoprenis en la esperantista vivo, rilate kion, je la kontraŭo, spite de ampleksa sindediĉo al la profesia medio — li verkis multajn prifakajn artikolojn kaj lernolibrojn — la partopreno de Kalocsay mem estis mirinde multflanka, dum lia kontribuo al la Esperanto-lingvo kaj literaturo senŝprige grandioziĝis.

En esperantistaj rondoj Kalocsay pruvigis bonega parolanto kaj elstaris ankaŭ kiel deklamartisto kaj aktoro. Li aktivis kiel ano de grupo, kiu, en la fruaj dudekaj jaroj, forte penadis plialtigi la nivelon de klubprogramoj per literaturaj vesperoj, diskutoj, teatraĵoj, kaj baldaŭ famiĝis kiel la "Budapeŝta Skolo". Tiun grupon, skribis Marjorie Boulton, konsistigis Konstelacio da talentuloj, kies "plej brila stelo estis

Kolomano Kalocsay" Aldone al siaj klerercaj programoj, la grupo fondis eldonejon kun la nomo "Literatura Mondo" kaj tiel ebligis publikigon de multaj Esperanto-libroj, i.a., tiuj de Kalocsay. Samtempe la entrepreno eldonis regule altnivelan samtitolan revuon, kies ĉefredaktoroj, dum du periodoj de ĝia ekzistado, estis Kalocsay kunlabore kun la alia hungara "koloso", Julio Baghy. Tiel, dum du jarkejoj da fervora laboro kaj verkado instrua, konsila kaj pure literatura, nia lingvo vaste rikoltis, ne nur rekte de lia plumo, sed ankaŭ pere de la kontribuoj de multegaj aliaj diversnacianoj, tiom pro la forto kaj kuragiĝa instigo de lia influo, kiom pro la praktika bezono, kiun plenumis la eldonejo Literatura Mondo. Kaj, kiam fine, pro politikaj kaŭzoj, Literatura Mondo devis ĉesi, tio neniel signifis kuŝon por la plumo en tiu "senripoza man", kiel atestas pluraj gravaj verkoj, kiuj sekvis — i.a., "Reĝo Lear", "Vojaĝo Inter la Tempoj" — krom senombraj artikoloj antaŭparoloj kaj enkondukoj al la verkoj de aliaj.

"Kalocsay", skribis Edmond Privat, "ĉefe uzis sian potencon plumon por la tradukado de belaj el la hungara literaturo, kiel Grabowski kaj Kabe faris el la pola" — ni povas aldoni "ankaŭ el multaj aliaj lingvoj". Tamen estis per siaj originalaj poemoj en "Mondo kaj Koro", ke li unue altiris akklamon, kaj per la dua kolekto "Streĉita Kordo" en 1931, li montris plej rave la plenan kapablon de la Esperanto-lingvo kiel esprimilon "por ĉiuj sentoj de la homa koro". Per tiu volumo, emfazis William Auld enkonduke al "Esperanta Antologio", la Esperanto-poezio atingis maturecon kaj nivelon egalan kun tiuj de la naciaj literaturaj lingvoj."

Tributoj laŭdaj al tiu intelekta giganto, kaj tributoj dankaj pro ties inŝpiro kaj helpo, amasiĝis tra la jaroj kaj torente verŝiĝis festene pri jubileaj datoj (vd. ekzemple en "Argenta Duopo" kaj "Ora Duopo"), sed, kiel resumon pri la agado kaj efiko de Kalocsay por la E-movado, mi trovis superba tiun de D-ro Lapenna en "Hungara Vivo", salute al lia okdeka naskiĝtago.

"Kalocsay estas unu el la plej multflankaj kleruloj iam renkontitaj, kies naturan genion kompletigas giganta intelekta aktiveco kaj senlaca strebado al perfekteco. . . . per siaj majstraj tradukoj kaj originalaj verkoj li riĉigis la Esperantan literaturon kaj donis esence novan kulturen enhavon al la Internacia Lingvo. . . . tra tiu impona arta kreado li samtempe malkovris —

en la vera senco de la vorto — ĉiujn kaŝitajn esprimeblecojn, kiujn la genio de Zamenhof enmetis en la lingvon parte konscie, parte intruicie. Kalocsay sukcesis transformi jam vivantan, sed ankoraŭ iom krudan lingvon, en delikate nuancitan artan esprimilon. La fakta paralela riĉigo de la Internacia Lingvo mem trovis adekvatajn klarigojn kaj analizojn en liaj unuarangaj lingvosciencaj verkoj. . . . (liaj) meritoj vaste transpasas la sumon de lia verkaro kaj entute de lia enorma kontribuo al la Esperanta literaturo kaj al la lingvoevoluo. . . . Li ne nur transdonis al la nova generacio de verkistoj maksimume perfektan lingvoinstrumenton, sed ankaŭ inspiris ilin al plua poezia kaj proza literatura kreado."

**Originalaj kolektoj:** "Mondo kaj Koro" (1921); "Streĉita Kordo" (1931); "Rim-portretoj", originalaj humuraĵoj (1931); "Izolo" (1939); **tradukoj**, i.a.: "Kantanta Kamparo", traduko de 101 hungaraj popolkantoj (1923); "Johano la Brava", versa popolfabelo de Petoŝi (1923). "La Tragedio de l'homo", drama poemo de Madach (1924); "Morgaŭ Matene", triakta dramo de Karintho (1924); "Eterna Bukedo", internacia poemantologio el 22 lingvoj (1931); "Romaj Elegioj kaj la Taglibro", poemoj de Goethe (1932); por "Hungara Antologio", la tuta poezia parto krom 11 poemoj (1933); "Infero", epopeo de Dante (1934); "Arthistorio de Heckler" (1934); kaj lastatempe el la angla lingvo, "Reĝo Lear", "Somermernokta Sonĝo" kaj "La Tempesto", ĉiuj de Sekspiro; **lingvosciencaj studoj:** "Lingvo, Stilo, Formo", originalaj lingvaj eseoj; kontribuo al la "Simpozio Ata/Ita"; "Vojaĝo Inter la Tempoj" **kunlaboris ĉe:** "Enciklopedio de Esperanto"; "Parnasa Gvidlibro"; "Plena Gramatiko".

Krom la propra nomo, Kalocsay uzis du konatajn pseŭdonimojn: C. E. R. Bumy kaj Kopary. Sciante, ke la litero "y" estas ofta finaĵo ĉe hungaraj nomoj, legantoj facile interpretos. Lastatempe esploremaĵ literaturaj kapabluloj, serĉinte por la nova presota "Enciklopedio de Esperanto" pli da informo pri la poeto, George E. Maura, devis veni al la konkludo, ke tiu verkisto neniam ekzistis, dum en ties versoj estas perceptebla forta simileco al multaj de Kalocsay. Poemoj de Maura unue aperis en 1934 en la volumeto "Dekdu Poetoj", kaj enkondukajn frazojn pri tiu "hispano", same kiel pri la aliaj dek unu, verkis Kalocsay. Pli ampleksa kolekto de la poemoj de Maura eldoniĝis libroforme ĉe Stafeto kun la titolo

"Duonvoĉe", sed poste tiu verkisto ŝajne malaperis en la aeron (ĉu hungaran?), lasinte nenian postsignon.

Ankoraŭ unu (ĉu vere du?) sink-aŝema poeto fariĝis temo por konjektado. Tiu estas Peter Peneter, aŭtoro de "Libro de Amo". En la versoj ankaŭ de ĉi tiu, nia pasinta redaktoro, F. R. Banham, elfaris similecon al la stilo de la hungara majstro. Eble iam ni scios la veron, kiel ni jam scias rilate la duon, Sturmer/Robinson, pri kiu Kalocsay ŝerce verkis por "Rimportretoj".

La lasta adiaŭo de Kolomano Kalocsay estis aranĝita por la 25a de marto en Mariabeseno apud Godollo. Kune kun la tuta Esperantista Mondo ankaŭ ni funebras.

"Li pasis, ve, li pasis, sed RESTIS lia Ago!" — Fay Koppel.

Al la jam menciitaj verkoj estas aldonendaj la jenaj: "La Paĝo de la Reĝino", komedio tradukita el la hungara (1922); "Bulgara Antologio", traduko de la poezia parto (1925); "Ni kantu", popolokantoj tradukitaj el la hungara (1928); "Vivo de Arnaldo" de B. Mussolini, biografio tradukita el la itala (1934); "Ezopa saĝo," originalaj fabeloj (1956); "La Floroj de l'Malbono", poemaro de C. Baudelaire, tradukita el la franca, kune kun G. Waringhien kaj aliaj (1975); "Kantoj kaj romanoj" de H. Heine, tradukita el la germana (1969); "Liberio kaj Amo" de S. Petofi, tradukita el la hungara (1969).

## EĀOJ PRI LA KONGRESOJ

"Antaŭ ĉio mi esprimas mian sinceran gratulon pri la brila sukceso da la 1-a Pacifika E-Kongreso kaj ankaŭ elkorajn respekton kaj dankojn por via grandega laboro dediĉita por ĝi. Apartajn dankojn por via afabla prizorgado pri mi speciale en tiu terura okupiteco, en kiu vi devis zorgi pri ĉio grava kaj eĉ ne grava." (Eizo ITOO, Direktoro de Oomoto, Kameoka, Japanujo).

"Mi deziras danki al la Melburnanoj pro belega semajno dum la Pacifika Kongreso. Ĝi estis bonega semajno." (Kapitano Wally F. Millson, San Diego, Kalifornio).

"La edzino deziras, ke mi esprimu al vi niajn plej korajn dankojn pro la efika organizado de la kongreso, kaj la bonkora prizorgado de la vizitantoj. Ni multe ĝuis nian restadon en Melburno kaj nian viziton al Aŭstralio ĝenerale." (Ralph Dearnley, Vic-Prez. N.Z.E.A.)

". . . . mi ĝuis ĉiujn aranĝojn, kaj estas certa ke niaj eksterlandaj vizitintoj raportos en multaj landoj la elstaran sukceson de la 1-a P.K.E. Gratulon pro la sukceso de la 1-a; antaŭen ĝis la 2-a!" (A.E.A.-Prezidanto Robby Robertson, Sydney)

". . . permesu ankaŭ al mi esprimi mian profundan dankon kaj gratulon pro grandega sukceso de la Kongreso." (D-ro A. Einihovici, Perth)

"Kiel aktiva membro de la Estraro de A.E.A. mi devas denove gratuli kaj multe danki vin pro alia tre sukcesplena Kongreso." (A.E.A.-Kasisto Les Scott, Manly).

". . . . mi volas diri ke mi ĝuis la kongreson. Mi opinias, ke la kongreso estis tre bone organizita kaj ĉiuj estis tre kontentaj." (S-ino Jean E. Bomford, Bendigo)

"Mi devas danki pro la bonega, sukcesa kongreso. Nun mi vere scias la signifon de la vorto "Esperantujo". Mi ankaŭ devas danki vin pro la Drama Sildo, kiun ni fiere prizorgos en Manly dum la venontaj du jaroj." (Eunice Graham, Manly).

"Ververe, ege ĝuplena Kongreso" (V. J. Timmins, Sydney).

". . . . mi multe ĝuis la Kongreson kaj gratulas pri la grandega laboro. Mi ŝatis ĉion . . ." (S-ino Idyss Einihovici, Perth).

"Mia lingva kapablo pliboniĝis . . . forte mi diras ke la kongreso estis granda sperto, la kongres-estraro faris bonegan laboron." (Jean Lehane, Prez. Toowoomba E-societo, Kvinlando).

## Alvoko de la Komisionestro pri Ekzamenoj.

De post la morto de S-ro F. R. Banham, mi traserĉis ĉiujn ĝis nun ricevitajn respondarojn, numeris, registris, ordigis, kaj fine starigis kartotekon, sed mi trovis, ke mankas iom da informo, precipe pri tiuj, kiuj gajnis la Superan Diplomon kun honoro, ĉar tiuj rajtas ekzameni kandidatojn en la parola parto de la Elementa Ekzameno. Mi jam registris la nomojn de S-ino A. M. Brunton, S-ro E. W. Chandler, S-ino M. Duncan, S-ro J. Gibson, S-ino I. P. Hanks, S-ino R. McGrath, S-ro R. Moir, kaj S-ro J. B. Moore. Se estas aliaj, kiuj gajnis la

Superan Diplomon de A.E.A. aŭ la Diplomon de B.E.A. kun homoro, mi petas tiujn skribi al mi kiel eble plej baldaŭ. Ken G. Linton.

## NIA HISTORIO ARTHUR MAURICE HYDE N-ro 10 1891 - 1965

Maurice Hyde naskiĝis en Melburno, 5/4/1891, kaj mortis en Toowoomba, Kvinslando, 14/1/1965, 75-jara. Li aliĝis al la Melburna Esperanta Klubo, 30/8/1907; rapide fariĝis sportulo en la lingvo, kaj multe laboris por la movado en Melburno. Li estis ankaŭ flua preleganto en la angla, kaj ofte prelegis al aliaj grupoj pri la grava valoro de la internacia lingvo.

Kiel registara kont-kontrolisto, li transloĝiĝis el Melburno al Kanbero, kaj poste al Nov-Gvineo, kie li starigis en 1919, Esperanto-kurson inter la Ĉinoj tie. Poste, li laboris multajn jarojn en Kvinslando, kaj li fariĝis Prezidanto de la Brisbana E-Klubo dum pluraj jaroj. Li estis Prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio en 1921 kaj ankaŭ la unua redaktoro ne la Asocia gazeto tiam nomita "La Suda Kruco", 1920-1921.

Li estis ankaŭ verkisto, kaj verkis en 1918, nian unuan lernolibron por Esperanto, "The Esperanto Guide". Ni havas ekzempleron de ĉi tiu lernolibro en la "William Drummond Memoriga Muzeo" en Morwell. Li uzis la pseŭdonimon "Antoni Delsudo", kiam, kunlabore kun Lauri Laiho el Finnlando, li verkis la unuan Esperanto-libron pri nia lando, "Aŭstralio, Lando kaj Popolo", en 1927.

—I. T. Maddern.

### Se oni vojaĝas . . .

Dum mia mondvojaĝo en 1967 mi revenis al mia naskiĝurbo Berlin; tie mi vizitis multajn lokojn, kiujn mi konis en mia juneco. Unu el ili estis la stacio de la altigita fervojo, de kiu mi dum ok jaroj ĉiutage veturis al mia lernejo. Tiam tie ekzistis sub la ŝtuparo, kiu kondukas de la kajo malsupren al la stratnivelo, eta kuk-vendejo. En ĉi tiu vendejo — amiko kaj mi, dek-dujaraj — ofte post reveno el la lernejo aĉetis kukon, . . . ĉiam la saman specon . . . kiun la vendistino tie tratranĉis por ni en du egalajn porciojn. Tio ripetigis tiel ofte, ke finfine ni nur eniris la butikon, sen diri iun vorton, kaj la vendistino faris ĉion kutiman kvazaŭ etiketo, ni pagis kaj eliris.

Do, memorante tion, mi vizitis la stacion post intervalo de 60 jaroj. Sed la butikoj ne plu estis sub la ŝtuparo, anstataŭe tie troviĝis la fervoja bileto-giĉeto. Mi volis ekscii, kiam la interĉanĝo okazis, aliris al la giĉeto kaj jena, iom stranga konversacio kun la juna oficistino okazis:

Ml: "De kiam vi estas ĉi tie?"

Si: "De post la naŭa matene."

Mi (iom embarasite): "Ne, mi volas scii, kiom longe vi estas en ĉi tiu loko."

Si: "Ĝis la sesa vespere . . ."

Ho, nun mi ekkomprenetis, ke laŭ ŝia opinio mi volas aranĝi rendevuon kun ŝi. Do, mi devis detale klarigi al ŝi la tutan aferon. Kompreneble ŝi estis tro juna, por scii ion pri la iama stato. Kaj poste ni ridis kune pri la miskompreno.

—P.E.S. 25/1/73 - 28/1/76.

## Gramatike-

Estas ne nur interese kompari vortojn, sed necese por bone kompreni la signifojn. Ekzemple: Ni komparu la vortojn: "argumenti", "diskuti" kaj "disputi". Unue ni trovu la signifojn en P. V. ARGUMENTI: prezenti rezonan pruvon; provi demonstri per rezona pruvo. DISKUTI: interparoli, ekzamenante opinion kaj argumentante pri ĝia praveco. DISPUTI: Malpaci, akre diskutante. Nun ni povas vidi la esencan diferencon. Oni povas prezenti argumenton per bildo aŭ per ellaborita tezo aŭ disertajo, sed se oni prezentas tiun argumenton per interparolo, ĝi fariĝas diskuto; kaj se ni malpacas en tiu diskuto, ĝi fariĝas disputo.

Simpla komparo estas inter "almenaŭ" kaj "apenaŭ", ĉar "almenaŭ" signifas "ne malpli ol" kaj "apenaŭ" signifas "Ne pli multe ol", sed pli interesa komparo estas inter "jam" kaj "ankoraŭ", ĉar analizo montras al ni, ke "jam" signifas, ke ŝanĝo okazis, dum "ankoraŭ" signifas, ke nenia ŝanĝo okazis. Se ni dirus: "Li jam ne studas", tio signifus, ke ŝanĝo okazis, kaj do antaŭe li studis, sed nun li ne studas, dum, se ni dirus "Li ankoraŭ ne studas, tio signifas, ke antaŭe li ne studis, kaj nun li ne studas, ĉar nenia ŝanĝo okazis. En tre malofta okazo ni povas meti "ne" antaŭ la vortojn "jam" aŭ "ankoraŭ", ĉar "ne jam" signifas "ankoraŭ", kaj "ne ankoraŭ" signifas "jam".



**AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIŬ**

Financa etato por la dujara periodo  
1974-75

**Enspezoj:**

Kreditsaldo 1/12/73	\$1456.29
Kotizoj 1974-75	\$3544.99
Kotizoj antaŭpagitaj 1976	20.00
	3564.99
Profito el la Brisbana Kongreso	609.15
Populara Kurso	773.52
Mezgrada Kurso	498.50
Altgrada Kurso	254.62
	1526.64
Minus Elspezoj	431.40
	1095.24
Ekzamenoj	53.00
"A.E." Abono	4.00
Donacoj: Publiciga Fonduso	119.30
Testamento S-ro W. L. Simpkins	1578.47
Honorigaj Insignoj	100.00
F. R. Banham	
Memoriga Fonduso	135.09
Diversaj	104.10
Luado d eskribaŝino al Sydney University	28.50
Diversaĵoj	103.91
Minus Banka Alĝustigo	50.00
	53.91
Banka Interzo	149.72
	\$9051.76

**Elspezoj:**


"The Australian Esperantist", Presado kaj Afranko	\$3652.12
Minus repago vendimposto — Freeman & Read	29.70
	3622.42
Generala Afranko	110.16
Presaĵoj kaj Papaeraĵoj	101.51
Publiciga Fonduso	99.46
Minus repago—Neuzita reklama sumo, Libroservo	50.50
	48.96
Adresaro	66.54
UEA-Kotizoj por Asociaj Membroj	134.76
Skribaŝino (Kosto dividita kun Libroservo)	79.00
Brisbana E-Instruada Instituto	200.00
Honorigaj Insignoj	49.67
Diversaĵoj	159.32
Kreditsaldo 30/11/75	4479.42
	\$9051.76

Prezentita de les Scott, A.E.A.-Kasisto  
Kontrolita kaj atestita de Geo. Thatcher,  
Kas-Kontrolisto

**44-a Internacia Foiro  
de Barcelono**



1-a-10-a junio 1976



La Internacia Foiro de Barcelono, same kiel en la lastaj 17 jaroj, sinsekvaj, ankaŭ ĉi-jare eldonis la oficialan afiŝon pri la Foiro en la Internacia Lingvo. Krome estas la 10-a jaro, ke la Direkcio de la Foiro disponigas al la Hispana E-Instituto standon kiel in-formejon pri Esperanto.

Ankaŭ la **Centrала Specimenfoiro de Milano**, kiu okazos de la 14-a ĝis la 23-a de aprilo 1976, denove eldonis afiŝon en Esperanto.

La 28-a Kongreso de la **Internacia Federacio de Esperantaj Fervojistoj (IFEF)** okazos inter la 12-a kaj 18-a de junio 1976 en la sveda urbo Skelleftea.

**RECENZOJ**

**LA NOVA ADRESARO**

Dank' al la energia laboro de Tom Elliott aperis la nova A.E.A.-Adresaro. Jen kelkaj korektendaj eraretoj:

**Honora Diplomo-Komisiono:** S-ino R. McGrath rezignis dum la Melburna Kongreso Elektiĝis S-ro Ray Ross, 41 Agnes St., Sunnybank, 4109.

**Kanbera E-Klubo:** S-ino J. Torr jam deponit jaroj loĝas en Southport, Q'ld.

**Toowoomba:** S-ro Don Pollock mortis la 26-an de aŭgusto, 1975.

**Redcliffe:** S-ino Meg Pritchard mortis la 16-an de novembro, 1975.

**Melbourne:** Brig. J. Munro, 163 Bay St., Port Melbourne, 3207

S-ro E. E. Thompson, c/o H. Frankhauser, Burwood Highway, Wantirna, 3152 Melbourne E-Society: Prez. S-ro S. Kanački, 72 Jubilee St., Mt. Waverley, 3149 (Elektiĝis nur post la presado de la Adresaro)

La preso estas klara kaj la ĝenerala aspekto multe pli alloga ol la 1974-a eldono.

## AUSTRALIA= =KRONIKO

**PERTH:** Ni spertis kvazaŭan "Post-kongreson" en nia urbo. F-ino Taki Hamada el nia ĝemelurbo Kagoshima alvenis el Melbourne, 11/1. Ŝi loĝis ĉe Ges-roj C. Dean en Fremantle kaj ĉiutage ŝi estis gasto de membroj de la Esperanto-Ligo.

La 15-an de jan. Taki estis prezentita al la Urba Konsilantaro kaj ŝi transdonis salutojn el Kagoshima al la ĝemela urbo Perth. Taki mem laboras por la konsilantaro en Kagoshima.

La komitato de la E-Ligo aranĝis piknikon por la gasto je 18/1. La venontan tagon, dua gasto, S-ino Elfriede Ernst (Belgujo) alvenis en Perth el Sidnejo. Ankaŭ ŝi loĝis ĉe Ges-roj C. Dean.

Gaja vespero okazis 22/1 en la hejmo de Ges-roj C. Dean. S-ino E. Ernst montris lumbildojn pri Belgujo kaj prelegis en bonstila Esperanto. Je 24/1, en la bela hejmo de Ges-roj A. Einihovici okazis festvespero por la du gastoj. Dimancmatene (25/1) Ges-roj Dean kaj S-ino Palmer adiaŭis S-inon Ernst kaj samvespere grupo da anoj kunvenis ĉe la aerhaveno por adiaŭi Taki Hamada.

**MELBOURNE:** Post la tiel sukcesaj 2 kongresoj membroj denove kunvenis en la Esperanto-Domo. La 2-an de februaro komenciĝis nova kurso por komencantoj gvidata ĉi-jare de 2 instruistoj. S-ino Barbara Podmore unue pritraktas la gramatikon, dum S-ro H. Beechey sekvas per konversaciaj ekzercoj.

Je 16/2 S-ro K. Linton aŭdigis sonbendigitan 30-minutan programon de Radio-Stacio 3ZZ, faritan de 9 L.K.K. anoj je vespero antaŭ la komenciĝo de la kongresoj. Amuzvespero okazis 23/2 S-ro Ken Linton montris diapozitivojn kaj parolis pri vizito al la Glaci-rivero Franz Joseph kaj Christchurch en Nov-Zelando.

**Oakleigh:** Vik: Elektiĝis la jena estraro: Prez: S-ro Jack Fallu; Vic-Prz: S-ro N. Butkunas; Sekr: S-ro R. Reed; 2-a Sekr: G. Burmeister; Kasisto: F-ino Ann Hearn; Libro-Servo: S-ino Ivy Fallu.

**Malvern, Vik.:** La ĝenerala kunveno okazis en la hejmo de Frank Halls, kiu montris filmon pri vojaĝo tra Etiopo. Poste la kunveno elektris la sekvantan estraron: Prez: S-ro Don Pescod; Sekr: S-ino B. Podmore; Kasisto: S-ino B. Pescod. Gruppvidanto: S-ino A. Paling.

**SYDNEY:** Ni komencis la jaron per jar-kunveno. Jen la nova estraro: Prez: David Gould; Vic-Prz: Wre Chandler, John Matasin; Sekr.: Margaret Chaldecott; Kasisto: Eve Matasin; Biblioteko: Elsie Curry; Kaskontrolistoj: Tom Perry, Phil Henderson; Instrustoj: Tom Elliott, Wre Chandler. Ni decidis aĉeti Kaset-Registron.

Je 9/2 ni diskutis la pacifikan kongreson. Ges-roj J. Stitz el Redlands (Kalifornio) estis niaj bonvenaj gastoj je 16/2 kiam la temo de diskutoj estis "La plej timiga sperto en mia vivo." Jim Harwood priskribis grimpadon sur "Ayres Rock. Volo Guelting rakontis pri aeratako dum la milito kontraŭ Hamburgo. S-ro Chandler havis plej timigan renkontiĝon kun venena serpento. Prof. Robbie Robertson demandis ĉu estas pli timige stari antaŭ leonoj, serpentoj, trafiko aŭ antaŭ grupo da studentoj.

**MANLY:** Tri kursoj komenciĝis en la Vespera Kolego de Manly: komencanta, diskuta kaj traduka. Prof. R. Robertson kaj S-ro A. Cocking faris sukcesan kaj amuzan prezentadon por reklami la kursojn al la publiko. (10/1).

Post pikniko ĉe Shelley Beach (15/2) okazis gaja amuzvespero en la hejmo de S-ino R. Carruthers. F-ino Taki Hamada (Kagoshima) vizitis la vesperlernejon je 24/2 Prof. Robertson kaj S-ino M. Duncan akompanis kaj adiaŭis ŝin ĉe la aerhaveno.

**BRISBANE:** Post reveno el la sukcesplena Pacifika Kongreso niaj membroj estas tre entuziasmaj kaj ni esperas fari grandan paŝon antaŭen dum 1976. Ni partoprenis en parado okaze de la "Aŭstralia Tago" kaj disdonis centojn da folioj pri Esperanto. Klaso por komencantoj okazas ĉiujaŭde en nia klubejo, dum la grupvespero okazas ĉiulunde. Nia kantgrupo, kiu ricevis fortan instigon ĉe la Kongreso, intencas daŭrigi sian aktivecon, dum alia grupo

sin okupos pri la kompilado de la historio de nia societo kaj ankaŭ de aliaj societoj en Kvinslando.

**TOOWOOMBA, Q.:** La ĝenerala kunveno okazis je 10/2 kaj elektis la jenan estraron: Prez. S-ino J. Lehane; Vic-Prez: F-ino M. O'Mara; Sekr.: S-ino Audrey Dahl; Kasisto: F-ino G. Morgan. 19 komencantoj anoncis sin por nova klaso en la Vespera Lernejo.

**ST. LUCIA, Q.:** Antaŭ nelonge la klubo bonvenigis Taki Hamada, ĉarman junan japaninon, kiu vizitis Aŭstralion por ĉeesti la Unuan Pacifikan Kongreson en Melburno. D-ro kaj Winsome Greenhalgh gastigis ŝin dum ŝia post-kongresa restado en Brisbano kaj aranĝis interesan kaj ĝueblan semajnon por ŝi. Ŝi ĉeestis la merkredan kunvenon de nia grupo kaj la klasanoj felice babilis kun ŝi pri Japanujo kaj ĝiaj kutimoj. Post la kunveno, Taki akompanis S-inon Margaret Jones al ŝia hejmo kie ŝi ĝuis tipan aŭstralian lunĉon, kaj poste vizitis la apudan lernejon por renkonti la infanojn.

Ce la klubo nun okazas du klasoj por komencantoj, kiuj kunvenas merkrede antaŭtagmeze kaj posttagmeze, unu mezgrada kaj unu altgrada grupo.

—M. Jones.

## EL LA FEDERACIOJ

**VIKTORIO:** La ĝenerala kunveno de la Federacio okazis 21/11/1975 en la domo de la Kvakeroj, 18 membroj de la grupoj de Malvern, Melburno kaj Oakleigh partoprenis kaj elektis novan estraron: Prez. S-ro Arnold Baldwin; Vic-Prez: S-ino A. Paling; Sekretario: S-ino Barbara Podmore; Kasisto: F-ino M. Sanders; Bulten-Redaktoro: S-ro H. Koppel

**KVINSLANDO:** La urbestro de Redcliffe prezidis la jarkunvenon, kiun ĉeestis deleĝitoj de Brisbano, Redcliffe, St. Lucia, Sunbrila Marbordo kaj Toowoomba. La Prezidantino (S-ino D. Sinclair) prezentis la raporton. La bankbilanco estas nuntempe \$248. Elektigis la jena nova estraro: Prez: S-ino D. Sinclair; Vic-Prez: S-inoj E. Jullie, U. Talbot; Sekr. S-ino S. Martin; Kasisto: S-ino E. Mathers; Publicisto: S-ino P. Ross, Redaktoro: S-ro R. Ross.

La venonta federacia konferenca okazos ĉe Emu Park, apud Rockhampton de la 1-a ĝis 3-a de majo. John Moore respondecas pri la aranĝoj.

## LA 41-a NOV-ZELANDA KONGRESO

Kvankam kompare malgranda kaj modesta, tiu kongreso, kiu okazis inter la 1-a kaj 3-a de januaro en Wellington, sukcesis dank' al la entuziasmaj kongresanoj kaj pro la ĉeesto de eksterlandaj vizitantoj el Irlando, Japanujo kaj Usono ĉiuj eksterlandanoj estis kongresanoj de la Pacifika Kongreso, kiuj uzis la oportunojn survoje partopreni la Nov-Zelandan Kongreson.

La solenan malfermon ĉeestis 33 gesamideanoj. Post mallonga salutparolado de la Prezdato (S-ro J. Allan), malfermis la kongreson S-ro Eizo Ito (Japanujo). S-ro Chris Fettes (Irlando), S-ro Carlton, S-ino J. Dinnel kaj Kapitano Millson (Usono) salutis en la nomo de sia landa movado.

Post la malfermo S-ro C. Fettes prelegis kun lumbildoj pri vojaĝo tra Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario kaj Orienta Germanujo kaj S-ro Ito Klarigis la tri celojn de Oomoto: Unu Dio — Unu Mondo — Unu Interlingvo.

La kongreso elektis la sekvantan novan estraron: Prez.: S-ro I. T. Allan; Vic-Prez: S-ro E. R. Dearnley; Sekr.: S-ro G. D. Raynor; 2-a Sekr.: S-ro D. A. McGill; Kasisto: S-ino M. Richardson; Informado: S-ro L. Rockell; Eduka Oficisto: Prof. C. J. Adcock.

La 42-a kongreso okazos venontan januaron en Auckland:

Granda kafekomercisto el Sao Paŭlo esploras la kultiveblon de la interna lando. Unu tagon, en la ŝtato Mato Grosso, li ekvidas vastan kampon, kun nur kelkaj bananarboj, kaj, sub unu el ili, dormetantan kampulon. "Diru, amiko, demandas la komercisto, montrante al la vasta senkultura tero, "Ĉu via grundo ne donas kafon?" "Ne, nenian kafon" "Ĉu kotonon" "Ne nenian kotonon". "Ĉu sukerkanon?" "Ankaŭ nenian". "Tamen, se vi plantus kafon, ĉu tio ne prosperus?" "Jes, kompreneble, sed nur se vi plantus ĝin".

**ON THE BALL:** If you are looking for football commentary in the off-season, tune your tranny to Radio Warsaw. Esperanto Sportscaster Jerzy Grum calls the European scores. Grum heads Radio Warsaw's Esperanto Section and is described by Pilo Press as 'the most competent sports reporter of the Esperanto movement'..

# NEWS - DIGEST

**DOCTORS IN THE HOUSE:** They were everywhere — Doctors of this and Doctors of that at the 1975 International Summer University. The University was conducted entirely in the international language and was held concurrent with the 60th International Esperanto Congress. The faculty was drawn from around the globe.

Esperantist Dr. Paul Neergaard led things off with his lecture: The Language Situation and Politics in Developing Countries. Dr. Werner Bormann followed up with: Women's participation in the Economy. Bojidar Leonov discussed: Women and Technological Progress. Michael Duc-Goninaz lectured on: Languages, Tribes and Language Politics; while Bruce and Judy Sherwood presented: Computers in Education.

UEA World President, Dr. Humphrey Tonkin spoke on: Utopia and Literature and Prof. Carl Stop-Bowitz described: The Natural Economy of the Sea. Prof. Toshida Kuwahara considered: The Science of Colour and its application to our lives.

A new feature of the latest International Summer University was a number of seminars held by the faculty for more intensive study of particular subjects.

**AMERICAN INTEREST:** Esperanto was one of the subjects considered last December at the San Francisco convention of the United States' Modern Languages Association.

**ELDERS GATHER:** Members of the Veteran Esperantists Club also got together at the World Congress. These elder citizens of the Esperanto movement now number 825 and represent 39 countries. A key topic of discussion was: How can the veteran Esperantists get young people interested in learning the language? President of the veterans is P. Giannelias of Lyon, France. He was born in 1881 and started speaking Esperanto in 1903—that's 72 years ago.

**UNESCO REMEMBERS:** In its list of important events for the year just past, UNESCO honoured the centenary of the birth of the Czech, Stanislav Kostka Neumann. He founded the

Prague Esperanto Club in 1902 and is renowned as a poet

**SAY THE WORD:** Popular Esperanto broadcaster for Radio Vienna, Emil Vokal, had to face the microphones again during his visit to Melbourne, Australia for the First Pacific Esperanto Congress. Vokal and local Esperantist Herb Koppel who jointly founded the "Harmonio" Group in pre-World War II Vienna, got together again to speak about Esperanto through station 3EA, the newly formed migrant information service, and 3ZZ, the public "access" station.

**SWEDISH WOMEN:** A brochure describing the status of women in the Esperanto movement was recently published in Sweden. Five thousand copies were printed with the aid of a subsidy from the service organisation SIDA.

**LET'S DANCE:** Put your dancing shoes on — and do a tango to the music of the Esperantist musicians Domingo Federacio and his group "Intima Tango". Federico and vocalist Ruben Maciel, can be heard singing numbers in the international language on a disc just cut in Argentina.

**SINGING WIFE:** The singing voice of the wife of the Director of the International Esperanto Museum, Dr. Walter Hube, was heard recently over Austrian television. She sang the Esperanto version of the song by Robert Stolz: "En Prater floras la arboj".

**WINNING WIFE:** Regular readers will remember, our mention of the competition for the Klara Silbernik Medal. The medal was to go to the little woman who most helped her hubby with Esperanto action in 1975. Well the prize was taken out by Mrs. Antonia Galvany de Criach. Two hundred guests of the Spanish Esperanto Museum at Sabadell saw the award, and an honorary medal went to Mrs. Teresa Massana de Hernandez.

**THE MOST:** Pilo Press also reports that the town of Prilep is the most "Esperantic" town in Yugoslavia. With a population of 60,000 it boasts a "Dr. Zamenhof" Clinic, an "Esperanto" restaurant, and a monument in the town centre to the good Doctor.

**NEWS DIGEST:** Hearty thanks PP and IEMW.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Kasisto: S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 146 (226)

MELBOURNE

Aprilo/Majo 1976

## URĜA ALVOKO

Laŭ peto de S-ino J. Lehane (Toowoomba) ni aperigas la jenan gravan informon:

Each January, the Darling Downs Institute of Advanced Education conducts a two-week summer-vacation school providing classes in various arts and crafts such as painting, pottery, weaving, creative writing, silk screen printing, drama etc. The tutors are top of their field and enrolments come from all eastern states.

This coming year, 1977, Esperanto could be one of the courses available, if sufficient early support is forthcoming. Information is required by the second week in May, to enable a firm decision in the matter. Several simultaneous courses are proposed: elementary, progressive and possibly Esperanto literature or translation. A.E.A. and PAPIE are being consulted re tutors, who would decide the courses in detail.

The Institute is only 10 years old, so accommodation (single rooms) and facilities are modern. It lies on the outskirts of Toowoomba (pop. 64,000), which is 80 miles west of Brisbane. The mid-course weekend would be free for sight-seeing around the Darling Downs, or Brisbane, or the Gold or Sunshine Coasts.

In these inflation-ridden times, firm figures are unavailable, but it is estimated that 10 days' tuition would be about \$80 and live-in accommodation \$100. These charges combined with travel and incidental expenses may at first glance seem heavy, but consider! What a golden unprecedented opportunity for concentrated study, combined with a visit to an interesting

corner of Queensland. Furthermore, the vacation school organiser is interested at the moment. Failure to avail ourselves of this proffered opportunity, would make it difficult, if not impossible, to arouse his interest again at some later date.

Please give this matter your serious and urgent consideration and advise me at latest by the second week in May whether you have any prospects of attending, and in which course you are interested: elementary, progressive or advanced, or whatever. (It is still a long time to Jan. 1977 — long enough to save that cash!).

Please tell your friends and associates. I am anxious to hear from them too. Local clubs and groups, how many of your members have good prospects of attending such a summer school, how many for each proposed course? This information is vital and urgent before the organiser can come to a decision: "To be or not to be".

My apologies for using English, but as someone or other once said, time is of the essence, and my Esperanto could possibly be misinterpreted, if hastily written. (I would certainly like to have the chance of 10 days' concentrated study under picked tutors).

Jean Lehane, President, Toowoomba Esperanto Society,  
Secretary—P.A.P.I.E.

Bedaŭrinde la supra informo atingis la redakcion tro malfrue por aperi en la pasinta numero. Tamen, se vi forte aprobas la ideon kaj pozitive intencas partopreni, nepre skribu al S-ino J. Lehane, 2A Harms St., Toowoomba, 4350.

### Ekzamenoj por la Normaj Diplomoj de A.E.A.

Dankon al la iniciativo kaj persistemo de D-ro C. J. Caldera, kiam li estis prezidanto, la Aŭstralia Esperanto-Asocio, jam kondukis siajn proprajn ekzamenojn dum periodo pli ol dudekjara, sub la normoj establataj de la Akademio de Esperanto, kaj estas dezirinde, ke kiel eble plej multaj el niaj membroj ekspluatu tiun avantaĝon per la entrepreno de tiu ekzameno, kiu konformas al ilia kapableco, tiel altigante la prestiĝon de nia Aŭstralia Asocio.

Ĉi tiuj ekzamenoj estas dividitaj en tri kategoriojn nomitajn la Elementa (la unua aŭ primara, kiu estas proksimume la ekvivalento de la iama Pyke-memoriga Ekzameno), la Supera (la meza aŭ sekundara, kiu estas proksimume la ekvivalento de la Atesto pri Kapableco de la Brita Esperantista Asocio) kaj la Klereca, kiu estas la fina aŭ terciara studio.

La Elementa Ekzameno konsistas el du partoj: la skriba kaj la parola. La skriba konsistas el simplaj gramatikaj testoj, mallongaj tradukoj el la angla en Esperanton kaj el Esperanto en la anglan, testoj, pri la signifoj de vortoj, traduko de mallonga Esperanta poemo, ne necese en versformon, kaj fine originala eseo kun elekto el ĉirkaŭ kvin temoj. La parola parto konsistas el la elparolo de la lingvo, pri la kompreno de tekstoj legataj de la ekzamenanto, kaj pri la kapableco esprimi siajn pensojn en simpla konversado.

La ekzameno por la Supera estas iom simila krom ke kandidato devas posedi pli grandan scion pri la lingvo kaj la kapablon traduki teknikajn kaj sciencajn tekstojn, dum la kandidato por la Klereca devas pruvi, ke li aŭ ŝi komplete regas la lingvon, kaj posedas ĝisfundan scion pri ĝia bazo, ĝia gramatiko, ĝia historio, kaj ĝia literaturo. Antaŭ ol entrepreni la Klerecan la kandidato devas prezenti tezon aŭ alian literaturan verkon, kiun la komisiono povas akcepti kiel indan kontribuon al la literaturo de Esperanto.

Ne necesas sukcesi en unu ekzameno antaŭ ol entrepreni la sekvontan, kvankam tio estas la kutimo. Ĉi tiuj ekzamenoj estas bazitaj sur la principo, ke estas pli bone kuraĝigi la studenton studi kaj esplori ĉiun aspekton de la lingvo, pli ol testi la kapablon enpusi en la menson scion por poste rememori pli aŭ malpli malprecizajn ideojn. Tial ni permesas al la kandidato du monatojn por respondi la demandojn kun plena uzo de libroj, el kiuj la kandidato devas prezenti sufiĉe precizajn

respondojn al tiu demando.

La kotizoj por la Elementa kaj la Supera estas \$6.00 por ĉiu, kiu sumo pagas por la skriba, la parola, kaj la diplomo mem. La kotizo estas sendenda al la kasisto de A.E.A., kiu sendas la kvitancon al la komisiono, kiu post registro, sendas ĝin al la kandidato kun la demando. La kotizo por la Klereca estas \$16.00, el kiu sumo \$4.00 estas por la tezo, \$4.00 por la skriba, \$4.00 por la parola, kaj \$4.00 por la diplomo.

K. G. Linton por la komisiono.

Mi tre ŝatus kapti la okazon laŭdi la laboron de membrino, kiu ĉiam silente sed tre efike servas nian asocion. Multaj rimarkis al mi pri la bonega raporto pri nia duobla kongreso, kaj kun granda plezuro mi ilin informis al kiu danki, sed tio ne sufiĉas, ĉar ĉiu membro rajtas tion scii. Vian dankon vi ŝuldas al nia ĉarma kaj talenta sed tre laborema Fay Köppel, kiu feliĉe por mi estas mia koleginino en la Ekzamena Komisiono. Ken G. Linton.

### Kuraĝulino

Membro de la Manly Esperanto-Klubo, Ann Gash tute sola velveturiginte sian 26-futan boatonon "Ilmo" de Sydney norden laŭ la kvinlanda marbordo, kaj okcidenten al Darwin kaj Kristnaska Insulo, navigaciis trans la ŝtorman Hindan Oceanon.

De Durban en Suda Afriko ŝi skribis dankante la multajn gesamideanojn, kiuj sendis bondezirojn poŝtkarte dum la Zamenhof-Vespero en Sydney. Je la 24-a de decembro Ann envenis Durban Havenon, kaj pasigis feliĉan Kristfestan Tagon kun aliaj marvojaĝantoj, kiuj invitis ŝin partopreni festmanĝon.

Ann raportis ke unu tagon kiam ŝi alproksimiĝis al Kristnaska Insulo ŝi ekfunkciigis sian kasetaparaton por aŭskulti muzikon. Imagu ŝian grandan ĝojon, kiam, pro la muzika harmonio, amase naĝis al ŝia boato de delfenoj saltantaj kaj dancantaj. Dum mallonga restado en Maŭricio ŝi petis hindan lavistinojn lavi ŝiajn 28 etajn tolaĵojn. "Volonte", respondis la lavistino. "kontraŭ \$13." Ann tuj sidigis kun 3 siteloj da akvo kaj mem lavis la tuton. Ann estis eble la unua avino, kiu sola veturinis jahton trans la Hindan Oceanon. Dum tuta semajno la vetero ŝtormiĝis kaj ĉiuj vestaĵoj de Ann malsekiĝis. Ŝi glitis sur la malseka kajutplanko kaj falis. Ŝi vidis multajn steletojn kaj sentis doloron. Feliĉe ke la aŭtomata gvidilo bone funkciis! (Laŭ informo ricevita de S-ino Marjorie Duncan, Manly.)

**ALVOKO:** Ĉiuj kiuj admiras la kuraĝon de S-ino Ann Gash, bonvolu saluti kaj gratuli ŝin antaŭ la mezo de julio ĉe "Yacht Ilimo", c/o Yacht Club, Falmouth, Anglujo. Tute sola Ann velveturis de Sydney al Capetown, de tie al Accra (Ghana) kaj estas nun survoje al Falmouth, ankoraŭ sola en sia 8-metra boateto. Bonvole ne petu respondi de ŝi.

### LOUIS PASTEUR

Unu el la plej eminentaj francaj sciencistoj de la pasinta jarcento estis Louis Pasteur. Dum la Internacia Esperanto Kongreso en Parizo (1932) la Kongresanoj ricevis inviton, viziti la faman Pasteur-Instituton; kutime oni ne permesas al laikoj, eniri la Instituton: ni dankis tiun escepton al la pola Esperantisto Prof. Bujwid, kiu iam estis kunlaboranto de Pasteur.

Louis Pasteur (1822-1895) origine estis kemiisto, poste li transiris al biologio, kie li eltrovis la mikrobojn, kiuj produktas fermentadon; per tio li kreis la mikrobiologion kaj tuj uzis ĝin, por mortigi malutilajn mikrobojn en vino, biero kaj en lakto.

En 1861, laŭ iniciato de la registaro li studis kaj venkis malsanon; kiu minacis detrui la silkraŭpan industrion. Studante aliajn infektajn malsanojn (antrakso de virŝafoj kaj holeron de kokinoj) li eltrovis la kulpajn mikrobojn kaj el ili kreis vakcinojn. Sed la plej grava faro lia estis la eltrovo kaj sukcesa aplikado de vakcino kontraŭ la rabio (1881). — Unu jaron poste estis fondita la Pasteur-Instituto, kies direktoro li fariĝis kaj al kiu la homaro dankas multajn vivsavajn produktojn kontraŭ infektaj malsanoj, precipe difterito. Ĉiuj grandiozaj eltrovoj faritaj en la Instituto, kies sciencistoj ricevas nur minimuman honorarion, estas donitaj al la tutmonda homaro sen iu ajn profito.

35 jarojn post la supre menciita Kongreso, en 1967, ni havis eblecon, viziti la Pasteur-Instituton en Bangkok, kie oni bredas venenajn serpentojn, eligas el ili la venenon kaj uzas ĝin por fabriki antidotojn.

Do, la nomo de la genio Pasteur radias brile sur la tuta terglobo, kie la vorto "pasteŭrizi" fariĝis ĉiutaga esprimo. — P.E.S.

Loĝanto de Rio de Janeiro, revenante el longa vojaĝo, jam ĉe la haveno renkontas amikon: "Mia edzino ne scias, ke mi alvenis. Mi tuj iras surprizi ŝin". "Kun kiu?"

# AŬSTRALIA= =KRONIKO

**SYDNEY:** 15/3 S-ino M. Chaldecott legis priskribojn pri Sydney de vizitantoj kaj loĝantoj dum la jaroj ĉ. 1850-1860, el libro kun skizoj faritaj en la sama periodo. Oni laŭdis niajn largajn, rektajn: stratojn sed plendis pro la manko de sunŝirmiloj sur la butikoj. Dank' al Kodak, ŝi ankaŭ montris kelkajn fruajn bildojn pri Sydney.

22/3: Tom Elliott, en siaj fruaj jaroj, pensis ke poezio ĉu angla aŭ Esperanta estas teda; kiam li ekkonis la verkojn de Raymond Schwartz, liaj ideoj ŝanĝiĝis. 29/3: "Mia plej ŝatata vojaĝo". Por Volo Guelting, la plej ŝatata vojaĝo estas tiu, kiu okazas ĉiutage post la horoj en la "sklavejo". Por David Gould, lia vojaĝo en 1966 el Anglujo ĝis Aŭstralio per 'Indiaman' estas memoriginda. John Matasin ĉiam deziris iri al Hindujo. Li iris tien en 1949. Elsie Currie parolis pri ŝipvojaĝo sur 'Oriental Queen', al Nov-Zelando, Tahiti kaj Tonga. M. Chaldecott, kun amikino el Srilanko, revizitis lokojn en la okcidenta parto de Anglujo.

5/4: David Gould montris filmon kiun li faris dum vojaĝo al Centra Aŭstralio. Geferiantoj enbusiĝis en Sydney en malvarma, pluva tago, sed post kelkaj tagoj brilandis la suno kaj prezentiĝis kolorplenaj pejzaĝoj ĝis la reveno al malvarma, malseka Sydney. 12/4 Vizitanto el Nederlando, S-ro C. Verlinde, parolis pri siaj spertoj kiel denaska blindulo. Li preparis sian paroladon per Brajlo sed tajpos ĝin por 'Telopeo'. Lia familio helpis lin multe. Li iĝis muzikisto pri piano kaj orgeno, sed dum la milito post bombado de la preĝejo, laboro ne estis trovebla. Tamen nun aferoj por la blinduloj pliboniĝis. Lia edzino havas nur duonan vidkapblon, sed ilia filino estas tute normala, sana knabino. Kiam li lernis muzikon, li ankaŭ studis la francan kaj germanan lingvojn kaj per la scipovo de Esperanto li havas plumamikojn ĉirkaŭ la mondo. —M. Chaldecott.

**PERTH:** Dimanĉon, 1-an de februaro okazis tuttaga Esperanto-Seminario en la Murdoch-Universitato, kiun partoprenis 24 membroj de nia Ligo. Membroj detale diskutis estontan agadon kaj la instruadon de Esperanto en lernejoj. El la testamento de Getrude Pollard

la Ligo ricevis \$5362.48; ni nun havas \$7679.48 en la banko. La Ligo ĵus akcitis novan multobligilon "Roneo-Vickers" por \$485.

La unua pikniko en 1976 okazis dimanĉon, 4/4, ĉe Lago Leschenault. 25 membroj partoprenis kaj ĝuis la belan veteron kaj trunkvilan ĉirkaŭaĵon.

**MELBOURNE:** La jarkunveno okazis 1-an de marto. Kasisto Brig. J. Munro raportis, ke elspezoj superis enspezojn je \$9.44. Laŭ la raporto de la sekretario (H. Koppel) klubanoj kunvenis ĉiun lundon (krom festotagoj) kaj varia programo estis prezentita. Membroj estis krome plenplene okupitaj per la pre-parlaboroj por la Pacifika Kongreso. Estraro por 1976: Prez: S-ro S. Kanaĉki; Vic-Prez: S-roj M. Cohen kaj J. Midgley; Sekr: S-ro H. Koppel; Kasisto: Brig. J. Munro; Bibliotekisto: S-ino F. Koppel.

Je 15/3 S-ro H. Beechey parolis pri "Kinetiko". S-ro H. Koppel raportis, 22/3, pri novaĵoj el Esperantujo, inkluzive raporton pri la morto de D-ro K. Kalocsay, pri kies vivo kaj verko S-ino F. Koppel aldonis detalojn. Okaze de la amuzvespero de la 29/3 S-ro Ken Linton prezentis diapozitivon pri pasintaj aŭstraliaj E-kongresoj, celante informi kaj instigi novajn anojn. Poste S-ino F. Koppel skizis la multjaran fidelan servadon de S-ro Linton por Esperanto kaj informis pri lia ĵus-pasinta 70-a naskiĝtago (27/3). Ŝi deziris al li feliĉajn datrevenojn kaj esperis por la movado pluajn jarojn de tia servado. Prezidanto S. Kanaĉki, nome de klubanoj, esprimis gratulon kaj transdonis binoklon.

**MORWELL:** La jarkunveno okazis en la hejmo de Ges-roj Wybenga je 6/4. La nova estraro estas: Prez: S-ino Mabel Wybenga; Vic-Prez: Henk Schepers; Kasisto Ivan Maddern; Sekr: Ada Schepers; Kas-Kontrolisto: Brian Kelly. Ges-roj Wybenga estos for de Morwell dum kelkaj monatoj, ĉar ili partoprenos la Univ. Kongreso en Ateno.

**CANBERRA:** Nia klubo reviviĝis kaj ni havas ĉiam pli ol dek ĉeestantojn ĉe la viglaj mardaj kunvenoj ĉe Barbara Amies. Jim Davidson revenis kaj li instruas 30 lernatojn ĉe la Forrest-lernejo, dum Marilyn Noonan similan nombron ĉe Melrose-Altlernejo.

La jarkunveno elektis novan estraron: Prez: Barbara Amies; Vic-Prez: Jim Davidson; Sekr. kaj Informado: Noel Gamble; Kasisto Dan Price; Kontrolisto Colin Johns. Lastatempe ni ricevis ĉekon de membro en Nov-Jorko por

dumviva membreco. — N.F.G.

Aperis nova gazeto "Canberra Community News", en kiu Noel Gamble aperigas de tempo al tempo novaĵojn el la Esperanto-movado.

**BRISBANE:** Kunvenoj daŭras ĉiulunde ĉe Martin Chambers. La lastan lundon monate, okazas la ĝenerala monata kunveno, post kio estas kantado. La kantgrupo kunvenas merkejde ĉe la hejmo de Harold Buckler. La 1-3-an de majo, membroj partoprenos la semajnfinan konferencon de la E-Federacio de Kvinlando ĉe Emu-Park apud Rockhampton. La 12-14-an de junio, okazos la unua studsemajnfino de 1976 ĉe Monto Tamburino.

Prezidanto Ray Ross instruas 5 komencantojn jaŭde, kaj kelkaj aliaj esprimis intencan partopreni la klason post eldono de nia letero pri pioniraj Esperantistoj en "Leteroj al la Redaktoro" en du tagjurnaloj, en kiu ni petis detalojn pri niaj fruaj membroj por la historio de la Societo, kiun ni verkos ĉi tiun jaron.

#### Forpasis Stan Milligan

Kun bedaŭro ni anoncas la morton de Stanley Hugh Milligan, 13-an de aprilo, 1976, nur 5 tagojn antaŭ la 75-a datreveno de la naskiĝtago (18.4.1901).

Stan Milligan ekinteresiĝis pri Esperanto, kiam, deĵorante ĉe sia laborejo Radio Stacio 3UZ (Melbourne) li aŭskultis intervjuon de ĵurnalisto kun F-ino Lorna Samblebe, ĵus reveninta post partopreno en la U.K. en Zagreb (1953). Stan aliĝis al la Melburna E-Societo kaj dank' al lia entuziasmo ankau la edzino Irene esperantigis.

Krom Esperanto Stan aktivis en du aliaj "hobisferoj" — la Skoltismo kaj la amo al miniaturaj lokomotivoj. En la unua li multe penadis esperantigi la junulojn kun kiuj li aktivis, dum pri la dua li ne nur partoprenis regulajn kunvenojn de lokomotivamantoj, sed mem konstruis modelojn kaj, en la hejma korto, propran fervojon, sur kiu tiuj veturis, ofte kun feliĉaj infanpasageroj.

Kiam okazis en Melburno (Aŭg./Sept. 1955) Internacia Ekspozicio pri Komercoj kaj Modeloj, Stan sukcesis, ke tiu organizo uzu sur sia plurlingva broŝuro ankaŭ Esperanton por reklami transmare kaj samtempe havigis al lokaj Esperantistoj la rajton senkoste starigi Esperanto-Standon en la Ekspozici-domo. (Vidu en "La Rondo", Jul./Sept. 1955). Dank' al lia teknika sciĝovo kaj la ekipaĵo de 3UZ alia reklamo farita de M.E.S. — anoj estis sendita al Radio Roma kaj disaŭdigita



en Esperanto-programo. Stan kaj Irene estis ankaŭ entuziasmaj vagantoj per domveturilo, rezulte de kio Melburnanoj ĝuis pli ol unu informplenan prelegon, lerte ilustritan per mapoj kaj diapozitivaj.

En la jaroj 1963/64 Stan servis kiel Prezidanto de la Oakleigh E-Grupo, kie li kaj Irene ankaŭ instruis kaj en 1967 li fariĝis U.E.A. Delegito por Melburno. Li servis ankaŭ kiel aŭstralia peranto por la Skolta E-Ligo. Post 1972 li devis ekŝigi kiel U.E.A. Deligito, pro kormal sano, kiu pli kaj pli limigis lian agadon ĝis la morto en aprilo. Al Irene, la filo, Ian, kaj ties familio A.E.A. esprimas plej sincerajn kondolencojn. — Fay Koppel.

## Gramatike-

Por daŭrigi mian parolon pri la sufikso, "ig", ni devas memori, kompreneble, ke ni povas aldoni tiun sufikson al preskaŭ ĉiu vorto aŭ sufikso. Ekzemple: ni povas "blankigi", "altigi", "nuligi" kaj "pli-bonigi", sed la plej ofta eraro okazas inter "anstataŭi" kaj "anstataŭigi". "Anstataŭi" signifas roli, agi, funkcii, anstataŭi iu aŭ io alia; "anstataŭigi" signifas kaŭzi, ke iu aŭ io rolu, agu aŭ funkcii anstataŭ iu aŭ io alia. Jen ekzemploj de ambaŭ:

1. Ĉar la direktoro estis malsana, lia helpanto anstataŭis lin ĉe la konferenco.
2. Oni anstataŭigis la direktoron per lia helpanto.

Leganto demandis al mi, ĉu estas korekte uzi adverbos aŭ adjektivos post la verbo, "aspekti". La respondo estas, ke ambaŭ estas korektaj. Ĉe verboj, kiaj "esti", "ŝajni", mi preferas la predikatan adjektivos; ekzemple: "esti bona", "ŝajni granda", kaj "aspekti bela" (ŝajni, ke ĝi estas granda; aspekti, ke ĝi estas bela). Se ni uzas la adverbos, ĝi tiam modifas la verbon. "Ŝajni grande" (grande ŝajni) kaj "aspekti bele" (bele aspekti) havas preskaŭ la saman signifon, do ne multe gravas. Tamen mi preferas uzi la adjektivos. — K. G. Linton.

Riĉa brazilano, timigita de la okazajoj en la 1942-a Londono, ŝipiras hejmen, kun sia papago, kompreneble. La Atlantiko iom tumultas, kaj la papago eksentas marmalsanon. "Nu, kara, diras la virino, la ĉefa afero estas tute ne pensi pri la maro. Por distri vin, se vi volas, ni faru ludon". "Jes", respondis la papago. "Bone. Atentu. Mi

kalkulos ĝis tri, kunfrapante miajn manojn, kaj tiam ni komencos la ludon. Ĉu vi estas preta?" "Jes". "Unu, du", sed je tiu momento la ŝipo renkontis flosantan germanan minon kaj eksplodis ĉielen. Kiam ĉiuj pecoj refalis sur la maron, la papago, senplumigita, kaj kun ŝveliginta palpebro, alkröcis sin al naĝanta trabo, kaj komentis: "Kaj kio estos ŝia venonta ludo?"

### Diplomoj

Kun granda plezuro ni anoncas, ke 3 membroj gajnis la Norman Superan Diplomon kun honoro, nome, Prof. R. G. Robertson, S-ro Trevor Steele, kaj S-ro R. Felby, do tri ŝtatojn ili reprezentas, ĉar apartenas, respektive al Nova Suda Kimrio, Kvinlando kaj Suda Aŭstralio.

**Deziras korespondi:** S-ro W. Milewski, Osiedle 700, Lecia 2/9, 88-140 GNIEW-KOVO, Pollando.

S-ro Stanislaw R. Kubiak, Manifestu Lipoowego 23/57, 27-210 STARCOWICE, Pollando.

### Turismaj Diapozitivaj

Kiam mi petis por diapozitivaj en la aŭgusta numero de A. E., mi tro evidente ne sufiĉe klarigis la bezonon. B.E.A. celas starigi bibliotekon el diapozitivaj por turismaj celoj, kaj petas nian helpon. Mi ricevis plurajn belajn diapozitivajn, sed ili havis kluban karakteron, anstataŭ turisman. Ekzemple: por Pertanoj mi sugestas vidajon de la urbo el King's Park, vidajon de Narrows Bridge el la sama loko; por Sidnejanaj vidajon de Circular Quay de sur la ponto, vidajon de "Spit-Bridge" el Seaforth, ŝaŭmondrajdadon ĉe Bondi, la Operan Doman; Hobartanoj povas kapti sian belan Mt. Wellington trans la haveno; Brizbano, Adelajdo kaj Kanbero povas kapti similajn vidajojn. Mi prizorgos Melburnon. — Ken Linton.

### NIA HISTORIO No. 11 HENRY MAYNARD LANYON 1876-1967

Henry Maynard Lanyon plejparte pasigis sian vivon en la kamparaj regionoj de Viktorio, kiel ŝtat-instruisto, individua Esperantisto, izolita de la esperantaj grupoj en Melburno.

Li naskiĝis en Millbrook, apud Ballarat, Viktorio, 8/3/1876, kaj mortis en Melburno en 1967, preskaŭ naŭdek-jun-jara. Li edukigis je la Boort lernejo, kaj poste en Geelong, kie li ankaŭ komencis sian karieron kiel instruisto. Li sciigis pri Esperanto en 1907 kiam li estis direktoro de la lernejo en Corryong. Li

gajnis diplomon en Esperanto en 1911, kaj en 1913, komencis la instruadon de Esperanto al siaj lernantoj post la lernejoj horoj. Li preparis esperantan elmontraĵon por la edukada ekspozicio en Melburno, en 1922, jubilea jaro de la Viktoria Edukada Departamento.

Li estis la sola inter niaj plej gravaj esperantaj pioniroj, kiu postlasis esperantan posteulon. Lia filo Cecil Lanyon estis Prezidanto de la Malvern Esperanto-Grupo en Viktorio.

— I. T. Maddern

#### F. R. Banham Memorial Fund

Previously acknowledged .....	\$105.09
Mrs. Fay Koppel .....	\$15.00
Mr. Aubrey Banham .....	\$50.00
Former Teachers Association ...	\$92.93

Total so far: \$263.02

Please give generously.

Tiuj membroj, kiuj intencos viziti Reykjavik por la 62-a Univ. Kongreso venontan jaron, bv. komuniki kun S-ro W. Chandler, 57 Northcote St., Naremburn, 2065, kun la celo aranĝi karavanon je rabatita prezo.

#### LA HONOR — INSIGNO DE A.E.A.

Okaze de la 1970-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Perth, A.E.A. establis Honor-Insignon por Esperantistoj, kiuj elstare laboris por A.E.A. kaj por Esperanto ĝenerale. Trimembra komisiono proponas al la A.E.A. Estraro nomojn de tiuj, kiuj, laŭ ĝia prijuĝo, meritas distingon.

Ĝis nun kvin Esperantistoj ricevis la insignon. En Brisbane 1974 S-roj F. R. Banham kaj H. Koppel estis nomitaj por insignoj kaj en 1976 en Melburno S-roj C. Caldera, Ralph Harry kaj Ken Linton.

Honorigitoj rajtas uzi post siaj nomoj la literojn F. A. E. A. ("Fratulo de A.E.A.") Jen mallongaj biografioj de la kvin honorigitoj.

#### FRANK REGINALD BANHAM



naskiĝis en Lowerstoft, Suffolk, Anglujo 11-an aprilo 1898. Li alvenis en Melburno en decembro 1914. Li esperantistiĝis en 1922. Dum 44 jaroj (1919-1963) li servis kiel kopiisto, provajkorektisto kaj ĉefkorektisto por la taggazeto "The Age". Li memlernis E-on sen instruisto kaj diplomigis honore de B.E.A. en 1926. Li aliĝis en 1930 al

la Melburna E-klubo, kie li ekvidis sian estontan edzinon (F-ino Hilda Dawes). En majo 1929 li fariĝis redaktoro de "La Suda Kruco" ĝis la ĉesigo (pro financaj kaŭzoj) en 1934; fondis 1940 "La Rondo"-n, poste "Aŭstralia Esperantisto", kies redaktoro li restis ĝis sia morto, 30-an aŭgusto, 1974.

#### D-ro C. J. CALDERA



naskiĝis ĉe Brusoleno (Torino) je 19-a de dec 1886. Doktorigis en 1910 ĉe la Universitato de Torino. Kapitano en militsanitaria servo en 1-a mondmilito. Servis kiel ĉefakulo dum 4 jaroj ĉe hospitalo en Verona, poste Profesoro en la universitato en Pavia. Pro la faŝista reĝimo en Italujo fugis al Aŭstralio en 1926. Enmigris unue Kvinslandon, poste al Okcidenta Aŭstralio. Aliĝis al la E-movado en 1939 ĉe la tre malgranda O.A. Esperanto-Societo. Kune kun S-ro Isor Masel kreis la novan E-Ligon. Fariĝis sekretario de A.E.A. en 1946 kaj fariĝis Prezidanto en 1950. Diplomigis ĉe B.E.A. en 1942, Dank' al lia strebado establiĝis A.E.A. Ekzamena Komisiono. Li mem gajnis la unuan Klerecan Diplomon en 1958.

#### RALPH L. HARRY, C.B.E.,

nask. 1917 Geelong. Studis en Launceston kaj Hobarto. En universitato de Tasmanio (LL.B.) lernis Esperanton 1937 gvidite de Pastro C. C. Cowling. Membro de E-klubo de Hobarto. Gajnis stipendion "Rhodes", studis ĉe Oksfordo (B.A.) Eniris Diploman Servon. 1949 Nov-



Jorko tradukis "Deklaracion de Homaj Rajtoj" en Esperanton. 1950 kunfondinto de E-Klubo de Kanbero. 1953-56 aŭstralia ĉefkonsulo en Genevo. Tradukis "la Carton de UNO" en Esperanton. Instruis E-on en la Internacia lernejo de Genevo. 1956-57 instruis klason en Singaporo. 1958-59 A.E.A.-Komisiito por la Zamenhofa Jaro A.E.A. Prez. 1960/61. 1965-68 Ambasadoro en Bruselo: prelegis per E-o en Belgujo. 1968-70 reorganizis E-movadon en Suda Vjetnamio. 1971-75 Ambasadoro en Bonn.

Verkis 1972 "Saluton Amiko"-Konversacio inter Sportuloj por la Olimpiaj Ludoj. Komisiis (1974) "Aŭstraliaj, Koncizaj faktoj." 1975 Ambasadoro ĉe UNO en Nov-Jorko, membro de E-Ligo de Nord-Ameriko, Dumviva membro kaj Honora Patrono de U.E.A. Dumviva membro de A.E.A.

**HERBERT KOPPEL**, nask. en Aŭstrio, kie li (okt. 1935) esperantiĝis. 1936-38



Presoficisto de Aŭstria Esperantista Federacio. Loĝis 1940-48 en Kanado. Enmigris Aŭstralion junio 1948. Organizis unuan postmilitan A.E.A.-Kongreson en jan. 1950. A.E.A. — Sekretario 1950-67. Vic-Sekretario de A.E.A. 1968 ĝis nun. Ankaŭ organizis aŭstraliajn kongresojn

en 1958, 1964, 1972 kaj la Pacifikan Kongreson 1976.

**KENNETH G. LINTON**, nask. 27/3/1906. Komencis lerni E-on en majo



1931 kaj aliĝis al Melburna E-klubo en aŭgusto 1931. Gajnis Pyke-Memorigan Ekzamenon kun honoro en nov. 1932. Diplomo de B.E.A. kun honoro junio 1933. 1952-55 A.E.A. Prezidanto; 1953 U.E.A. Delegito por Melburno. 1955 U.E.A. Ĉef-

Delegito. 1956-57 A.E.A. Kasisto. 1960 eldoniĝis en Angluo lia libro "Kanaĉo el Kananam". 1961 gajnis Klerecan Diplomon kun honoro. 1968-1971 A.E.A. Prezidanto. 1976 Komisionestro de A.E.A. Ekzamenoj.

### LA PLEJ BONA INSTRUANTO DE KNABO

Ŝajnas al mi, ke estas unu kialo por la generacia breĉo de hodiaŭ, kialo pri kiu la plejmulto el ni preferas ne priparoli — la fakto, ke la patro de knabo jam ne estas lia instruanto.

Antaŭ kvindek jaroj, kiam tiel multe da familioj loĝis sur farmbienoj aŭ en malgrandaj urboj, kaj devis labori kiel teamo por teni sin varma kaj sata, knabo ne povis ne bone koni sian patron. Oni diris, ke la plej bona amiko de knabo estas lia patrino, sed ĉiu scias, ke lia plej bona instruanto estas lia patro.

Mi bone scias, ke estis vera edukado esti kune kun mia parto, kiam li faris sian tagan laboron. Multe de la lertecoj, kiujn li instruis al mi, estas iom neutilaj hodiaŭ: aferoj kiaj meti jungilaron sur ĉevalon, kiu ne deziras jungiĝi; kiel melki bovinon, kiel sarki, fosi, aŭ sterni sterkajon meze de forta vento. Jam ne gravas, ke mi sciu kiel kreskigi avenon, sekalon, pizojn, fazeolojn, aŭ kiel trakti gravedan bovinon, kies ido estas retroire enironta la mondon.

Sed estas aliaj lecionoj, kiuj ankoraŭ bone utilas. Ekzemple: la digno de laboro farita per la propraj manoj — ju pli malfacile, des pli kontentige, se konsciencie farite. Plej grave, li instruis al mi tiun lecionon, kiun la komputiloj kaj akademiuloj ŝajne ellasis el sia instruplano de la hodiaŭa lernejo — la signifon de respondeco kaj la kontentigan senton, ke vi iom meritas tiun respondecon.

Ne pensu, tamen, ke la patro instruis al mi nur pri laboro. De li mi lernis la nomojn de la birdoj, kiuj revenis al ni ĉiun printempon. Mi lernis la nomojn de la floroj, de la plantoj, kaj pri iliaj utiloj. Li instruis min rigardi kaj vidi, kaj esti konscia pri la senfina variececo sub ĉiu paŝo. Antaŭ ĉio li instruis al mi tiun agon, kiu levas la homon pli proksimen al Dio: la agon miri.

Mi bone memoras vintran nokton jam estingita, kaj ĉiu krom la patro estis antaŭ tre longe. La lasta lampo estis jam endormiĝinta. Subite li saltis el la lito kaj kuris al la fenestro. Kelkajn momentojn poste li ellitigis ĉiujn.

"Eksteren!" li kriis. "Ne malŝparu tempon por vesti vin. Envolv'u vin per lankovrilo, sed rapide."

Jam ekstere ni ne povis vidi ion krom froston kovrantan ĉion per blanka vataĵo kaj milionon da diamantoj ekbriligitaj per la klara luno.

"Aŭskultu!" li diris.

Penante silentigi niajn klakantajn dentojn, ni streĉis niajn orelojn kaj rigardis ĉielen, kien li rigardis. Jes, nun ni povis aŭdi ilin. Sovagaĵoj anseroj flugas preter la luno.

"Devas esti almenaŭ mil," asertis Paĉjo.

Poste, dum li rekondukis nin al niaj litoj, li aldonis: "Mi opinias, ke tio meritis minuton da tremado."

Iom tragiĉe, ŝajnas al mi, ke ni havas nek la tempon nek la emon por tiu speco de patra rilato hodiaŭ. Tragiĉe ankaŭ estas, ke la jaroj, kiuj tiel rapide nin preterpasas, jam ne tenas tiom da minutoj.

El la angla trudukis Ken G. Linton.

# NEWS - DIGEST

**HAWAIIAN HELLO:** News of an interesting new use for the international language comes from primary school teacher Mike Azevedo in Hawaii. In America's mixed-race state they've been teaching children the rudiments of Esperanto since 1968 in their English classes.

In 1975 the course was taken up by educators on the mainland. Operating under the name of "Operation Aloha", it is being taught in schools in both California and Tacoma.

Mike Azevedo says that learning Esperanto stimulates the students and helps them to grasp English and other foreign languages.

**NO BALONEY!** Train travellers in Italy will find stickers advertising Esperanto courses in Bologna and Rome pasted up at every railway station in the capital. There will even be one in the Ministry of Transport building. Thanks for this go to Italy's State Rail System's Social Dept. which not only arranged for the space to be made available for the local Esperantists, but also financed the printing of the stickers.

**CRASH COURSE:** Another unusual test for the international language is a high-speed instruction course being given at Holland's University of Nijmegen. Guinea-pig students who attempted the course had to work at a cracking pace. The organiser was Dr. T.J.M. van Els, chairman of the Faculty of Languages. The students worked at learning Esperanto six hours every day for the five days ended April 16th.

Dr. van Els says he designed the course to test not only Esperanto's learnability, but also its practicability in relation to short-term learning. It will be interesting to learn the results.

**FOOD FOR THOUGHT:** Herr Kalinke, a West German, has been publicising the international language in the streets of Paderborn. The 66-year-old enthusiast marches up and down the thoroughfares of the city in a pair of sandwich-boards which he made himself. They carry the message. **PADERBORN ESPERANTO CAPITAL — FIRST IN EUROPE!** Herr Kalinke says people like to talk to him. "I am not

selling anything, I don't collect signatures", he says. "I am simply trying to collect sympathy for Esperanto — it is the most rational solution to the language problem". Anyone who does stop for a chat is given a coupon good for one free trial lesson in the language of hope.

**MACEDONIAN WORDS:** This July, the first Macedonian-Esperanto dictionary will be published in Prilep, Yugoslavia. Joint compilers, Metodi Galeski and Giogi Pop-Atanasov, say it will be a one-volume book and will include a concise Esperanto grammar.

**ESPERANTO ECHO:** Australian Esperantists will be interested to know that Austria's Esperanto broadcaster, Emil Vokal, was favourably impressed with our country. He still thinks there are opportunities here for migrants, but most probably in the country. Listeners to Radio Vienna heard him tell of his car journey from the Pacific Congress in Melbourne to the post-Congress in Sydney with Volo Guelting at the wheel.

**HAPPY BIRTHDAY!** They would have had to put twenty-five candles on the cake at the Saarland Esperanto League. They completed their quarter-century on February 18th.

**CHILD'S PLAY:** The German Esperanto Teachers' Association has designed an interesting experimental course for primary-school children. They use Korte's textbook: "Sub la verda standardo". It has spread into nearby countries and 336 children in all are participating. They are at Dollbergen, Froebelschule Peine, Balge (in West Germany); Saint Gerary (Belgium)! Hennebont, Le Mans, Sainte Colombe (France); Athens (Greece—two classes); Waalwyk, Soest, and Wormer (in Holland).

**POP ALONG:** A workshop of "Esperanto and popular music" was held at Trenčín, Czechoslovakia from April 23rd to 26th. There were singers and musicians from several countries who took part.

**ROOM FOR ZAMENHOF:** A reading room designated the L. L. Zamenhof Room was inaugurated at the Goiana, Brazil, Municipal Library on December 13th last year.

**CREDITS:** This issue to Pilo Press and Heroldo de Esperanto.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2053

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Kasisto: S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 147 (227)

MELBOURNE

Junio, 1976

## ESPERANTO IN ROCKHAMPTON SCHOOLS

A total of 544 pupils at 11 schools in Rockhampton and district are taking part in an introductory course in the international language Esperanto. This language, as well as being useful in itself — giving direct contacts in many lands — has been proved valuable as an early practical introduction to linguistics.

The 12-lesson course, originated by Mr. Ivan Maddern of the Australian Independent University, and further developed by Mr. Ron Ritchie of Nambour High School, has been supplied through the Rockhampton Esperanto Society in collaboration with the Board of Adult Education.

Originally broadcast from radio stations in Victoria and Southern Queensland, it is now registered on cassette. In each lesson, a five-minute tape session is supplemented by material for 25 minutes of written work, each step leading easily to the next.

Lesson 1 teaches the phonetic pronunciation and how to count up to — a million! By the twelfth week, the interested student should have a fair knowledge of grammar, a useful basic vocabulary, and — hopefully — a desire to know more. (Several follow-up courses are available.)

Schools taking part are: Moura State Primary and High School, Mt. Morgan High, Bajool Primary, Range College, Port Curtis Junction Primary, St. Joseph's Convent, Glenmore High, Raglan Primary, Boldercombe, St. Ursula's Yeppoon, and Rockhampton Boys' Grammar.

—John Moore.

## KIAM, KIEL kaj KIAL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Kiel lernanto en la gimnazio, mi iĝis skolto, kaj avide tralegis la libron "Scouting for Boys" de Baden-Powell. Ĝi instruis min pri multaj utilaj teknikoj, ekzemple, kiel ligi la ŝulaĉojn, kiel pretigi taŭgan fajron por kuiru manĝaĵojn, kiel eviti inundon se pluvegas dum oni ripozas en tendo, k.t.p. Inter aliaj interesaj artikoloj, mi trovis la sugeston, ke skoltoj povus komuniki kun eksterlandaj skoltoj, se ili lernus la internacian lingvon, Esperanton. Mi tuj komprenis, ke tiu estas bona ideo, kaj skribis al B.E.A. por havigi lernolibron.

Verda libreto baldaŭ alvenis, kaj mi zorge studis ĝin, sed la unua falilo estis la litero "ĉ"; mi ne povis kompreni, kial la elparolmaniero, malfacila por mi, estas necesa. Sen instruisto, la vorto "scias", laŭ mia supozo, estis preskaŭ ekster mia kapablo. Post kelkaj jaroj, mi legis "Heartbreak House", teatraĵon verkitan de G. B. Shaw, kiu ege interesiĝis pri la fonetiko. Li instruis la ĉestantaron en la teatro, kiel elparoli la polan nomon "Szczepanowska". Oni devas diri laŭvice "fish-church, sh-ch, shchepanovska". Simile oni povas diri "nest-seers, nestcias, mi ne scias"; sed mi lernis tion post multaj jaroj. Tiam

en la lernejo mi estis ege okupata pri la abiturientaj ekzamenoj, kaj devis forlasi la studadon de Esperanto dum multaj jaroj.

Mi sukcesis en la ekzamenoj kaj gajnis du stipendiojn, por studi ĉe la Oksforda Universitato. Estis la malfeliĉa tempo de la granda deprimado, inter la du mondmilitoj. Mia patro estis simpla metiisto; li vendis sian motorciklon por aĉeti taŭgan vestaron por mi, kaj mi komprenis, kvankam tio neniam estis esprimita, ke mi devos labori senĉese por gajni sufiĉe altan gradon, kaj ne malŝpari la ŝancon. Do, neniuj hobiaj nek flankokupoj interesis min dum kelkaj jaroj, kaj mi finfine gajnis licencion kiel inĝeniero; sed baldaŭ komenciĝis la dua mondmilito. Mi iĝis volontulo, kaj ĉirkaŭiris la tergloton kiel militmaristo.

Ĉie mi spertis lingvajn malfacilaĵojn, kaj ofte pripensis tiun verdan libron kaj la evidentan solvon de la monda lingvoproblemo, sed nenie mi renkontis esperantistojn, eĉ ne en Novgvineo, lando de la kanako.\* Do, mi supozis, ke tiu bona inventaĵo estas forpasinta.

Post la fino de la mondmilito, mi reiris hejmen; naskiĝis familion; enmigris Aŭstralion, kaj gajnis postenon en la nova universitato de NSK. Tie mi laboris 15 jarojn, sed iom post iom malsaniĝis, kaj finfine eniris malsanulejon, por ke kirurgo fortranĉu tumoron el la spino. Dum kelkaj monatoj en la lito, mi uzis la tempon por pripensi denove multajn ideojn kaj idealojn, pri la mondo kaj pri la paco en la estonteco, forĝitajn dum la studado, la milito, la edziĝo, la enmigrado kaj la peniga grimado al mia pozicio en la mondo.

Okaze mi vidis reklamon en la loka ĵurnalo pri Esperanto-kurso, kaj elirinte la malsanulejon, ne tute sana sed sufiĉe bonfarta por entrepreni studadon, mi aliĝis al la komencanta kurso.

La instruisto prezentis la lingvon al ni per la rekta metodo, kaj nia progreso estis vere kuraĝiga. Ĉe la gimnazio en Anglujo, oni prezentis la francan, la germanan kaj la italan lingvojn al ni; mi intence ne diras, ke instruistoj instruis nin. Efektive, ili eniugis kaj ĉagrenis nin per tedaj lecionoj, ĝis ni ĉiuj decidis formeti fremdajn lingvojn porĉiame. Ni facile persvasid nin, ke "la anla estas la vera internacia lingvo", por ke ni ne estu torturitaj per la studado de aliaj.

En la Esperanto-kurso ni ĉiuj parolis la lingvon ekde la komenco de la unua leciono, kaj post nur tri semajnoj, la instruisto postulis: "Skribu leterojn al eksterlandaj samideanoj. Mi donos al vi sufiĉe da adresoj de korespondemuloj." Mi supozis, ke li estas naiva, sed mi

sendis leterojn al Pollando, Italio, Ĉekoslovakio kaj Francio. Ho, kia bela surprizo! Post kelkaj semajnoj mi ricevis respondojn, kaj memevente ĉiuj miaj respondintoj komprenis mian freŝbakitan Esperanton. Kompreneble mi skribis nur simplajn frazojn, kiaj

"Mi estas komencanto, mi loĝas en Sidnejo, la klimato estas bona, la suno brilas . . ." k.t.p. Estis kuraĝiga komenco. Mi iĝis certa pri la utileco de la internacia lingvo.

Je la fino de la komencanta kurso, mi aliĝis al la Manly-klubo, kaj penige tra legis multajn ekzemplerojn de la ĵurnalo "Praktiko", la ĵurnalo, kiu instruis kaj amuzis. Plej rekompencaj estis mallongaj ŝercaj historioj, precipe kun bildoj, kaj iom post iom mi progresis.

Januaron 1966 mi ĉeestis la Kongreson en Kanbero, sed ĉiuj kongresanoj parolis tiel flue, tiel rapide, kaj tiel senerare, laŭ mia tiama opinio, ke mi ne kuraĝis diri eĉ unu vorton en la kongresejo. Post du jaroj, ĉe la Manly-Kongreso, mi aŭdacis paroli unu sentencon ("mallongan frazon enhavantantan ĝeneralan moralan principon", laŭ P.V.). Temis pri neŭtraleco, se mia memoro estas ĝusta.

Ĉe la Pert-a Kongreso mi prezentis raporton pri la agado de la Federacio de NSK, kaj parolis dek minutojn. Jen progreso, kaj, post du jaroj, en Melburno mi estis elektita prezidanto de AEA, kvankam, laŭ mia opinio, mi ankoraŭ ne estis sufiĉe kompetenta. Kredeble, tio iĝis min prezenti paroladojn kaj prelegojn; multe da laboro plibonigis mian scion pri la lingvo.

Tiamaniere mi eklernis Esperanton, sed kial? Tiu estas pli malfacila demando. Unue mi deziris flankokupon, interan hobion ekster la ĉiutaga laboro, sed kial mi elektis tiun flankokupon anstataŭ ludi ŝakon aŭ briĝon? Efektive, mi ne interesiĝas pri ludoj, nek endomaj nek plenaeraj, post kiam mi forlasis la lernejon kaj ĉesis ludi rugbean futbalon, akvopoolon kaj judon, kartludon "duke unu" kaj pokeron, damludon kaj ŝakon. Do, kial mi ne lernis alian nacian lingvon?

Mia malgajiga sperto pri naciaj lingvoj en la pasinteco malinklinitis min entrepreni tion, kaj mi opiniis, ke unu internacia lingvo, kiel dua lingvo por ĉiuj nacioj, estas pli logika solvo kaj pli simpla studobjekto.

Kiam mi eklernis Esperanton, kaj eĉ post kiam mi aliĝis al la klubo, mi tute ne sciis, ke granda internacia organizaĵo ekzistas. Mi supozis, ke Esperanto estas nur unu el multaj eblaj internaciaj lingvoj, proponitaj de diversaj lingvistoj.

Mi hazarde aŭdis pri Esperanto-kurso, do, mi lernis Esperanton. Se mi estus trovinta Idojn kurson, aŭ Volkapukan kurson, mi estus lerninta tiujn lingvojn. Kompreneble mi baldaŭ eksciis, ke Esperanto havas tutmondan organizaĵon, sed la aliaj tiel-nomataj mondlingvoj havas preskaŭ neniun organizaĵon, kaj efektive pereis.

Mi opiniis, ke la vera avantaĝo de Esperanto estas la organizaĵo, por propagandi, por instrui, por subteni individuajn samideanojn kaj por ebligi la praktikan uzon de la lingvo. Post kelkaj jaroj mi povis ekkompreni, ke la lingvo mem posedas necesajn elstarajn kvalitojn por atingi finan sukceson. Tiu fina sukceso estas certa, se la samideanoj laboros ĉiutage, ĉiusemajne, kaj ĉiujare por daŭrigi la uzadon de la lingvo kiel vere vivanta lingvo, kun literaturo kaj poezio, kun parolantoj kaj korespondantoj, kun kluboj kongresoj, montrante Esperanton al la tuta mondo kiel la solvon de la lingva problemo.

\* "... el Kananam", kompreneble.  
—"Robbie" Robertson, Prez. A.E.A.

## NIA HISTORIO

No. 12 D-ro SAMUEL McBURNEY  
1847-1909



Samuel McBurney estis doktoro en la fako de muziko. Li naskiĝis 30/4/1847 en Glasgow, Skotlando, kie lia patro estis gimnazia instruisto—doktoro en la fako de literaturo. Li studis en la Universitato de Glasgow, 1864-1866, kaj migris en Viktorion en 1870. Li instruis vice en Kyneton, South Melbourne, Sale kaj Portland. En 1876, li reiris al Britujo kaj interesiĝis pri la tonik-solfaja metodo en la instruado de muziko. Ree en Aŭstralio en 1877, li estis la unua muzikisto kiu enkondukis tiun metodon en Aŭstralio, lerninte ĝin de la inventisto, John Curwen, 1816-1880.

Li aliĝis al la Melburna Esperanta Klubo 21/12/1906, kaj estis ĝia vicprezidanto en 1908. Li mortis en Melbourne, 9/12/1909.

Por la Esperanto-Mondo, li komponis la melodion kaj verkis la vortojn de kanto tre ŝatata de Esperantistoj — "Kie Estas Nia Lando?". Ĉi tiu kanto kantiĝis dum la Unua Aŭstralia Kongreso (Adelaide 1911) kaj la Dua en 1912 (Melbourne). Por la 20-a Aŭstralia

Kongreso, 1976, la Morwell Esperantaj Kantistoj revivigis ĝin. Speciale, ni dankas al F-ino Ruby Ledger en Benalla, esperantisto ekde 1908, ĉar ŝi sendis al ni ekzempleron de la muziko kaj de la vortoj de la kanto. Jen la vortoj:

### Esperanta Lando.

1. Kie estas nia lando, nia Esperanta Land?  
Ĉu Rusujo pacienca, baraktanta al la lum;  
Ĉu Svisujo, montarlando, kun la liberecarfum?  
Grandaj estas tiuj landoj, sed pli vasta nia land'.
2. Kie estas nia lando, nia Esperanta Land?  
Ĉu Anglujo tiel rega en la region' de l' mar;  
Aŭ la malproksimaj lokoj de la ŝia filinar?  
Grandaj estas tiuj landoj, sed pli vasta nia land'.
3. Kie estas nia lando, nia Esperanta Land?  
Ĉu Francujo kun spriteco, kun fraterna ideal;  
Germanujo kun pensema kaj persista special?  
Grandaj estas tiuj landoj, sed pli vasta nia land'.
4. Nia lando estas ĉie kie restas homa pland',  
Kie premas manon mano kune kun samidean',  
Aŭ saluto aŭdigata, aŭ la stela talisman'  
Diras, "Jen Esperantujo, nia Esperanta Land'.

—I. T. Maddern.

### PRI KONGRESAJ RAPORTOJ.

Konsentite estas, ke oni ne tro malŝparu valoran spacon por reciproka dorsogratado. Tamen, por eviti eblan maljuston, certa membrino, kun danko al kolego K. G. Linton, pro liaj komentoj en la pasinta numero, deziras iom korekti impreson nur parte pravan. La raporto pri la Pacifika kaj la jusokazinta AEA-kongresoj estis nur daŭrigo de plurjara sistemo, laŭ kiu la Mastro, kiel decas ĉe la virsekso, respondecas pri la pezaj, pli gravaj ŝarĝoj, kiaj aferkunsidoj kaj decidoj, dum la ino pritraktas la malpli pezajn kaj distrajn. La tuton kompreneble iom spice interplektas manlaboro laŭ la kutima bokstrejna maniero de geedzoj.  
—Fay Koppel.

### EGRETOJ

de Judith Wright.

Dum mi promenis tra vespero milda,  
surprizis min laget' kun nigra bril',  
kaj transe densis sveltaj, blankaj arboj  
por mire sin rigardi en trankvil'.  
Nenio ja moviĝis krom la birdoj,  
egretoj tridek en vespero milda.  
Nur unufoje dum la vivodaŭro  
l' okulojn trafos ĉarme tia scen'.  
Dum multaj jaroj ŝajne mi atendis,  
silente mi rigardis ĝis korplen',  
jen akvo klare nigra, blankaj arboj,  
pli blankaj eĉ, vadantaj la egretoj.

Tradukita de Audrey Bruton.

### LA OKULVITRA UJO

Iutage, sur la kajo de stacio mi trovis ledan ujon por okulvitroj, sen io en ĝi. Mi metis ĝin apud mi sur la benkon, kie mi sidiĝis. Baldaŭ alia pasaĝero ekdisdis apude. Mi ekstaris kaj iris al eta fontano, por trinki. Kiam mi revenis al la benko, la alia viro demandis min, ĉu mi postlasis tiun ujon. Mi klarigis al li la aferon. Post ioma tempo lia vagonaro alvenis kaj li eniris ĝin. En tiu momento tria viro ekvidis la postlasitan ujon, rapide ekkaptis ĝin kaj postkuris la duan viron, por rehavigi la ujon al la supozita posedanto. Li atingis lin en la vagonaro nur, kiam la trajno jam ekveturis.

Kio poste okazis, mi ne scias . . . .  
—P.E.S. 25/1/73.

### LAPENNA DONACO

Ges-roj Lawrie, organizintoj de la kolektos por Prof. Lapenna, kiun mi prezentis al la membroj ĉe nia ĵus pasinta kongreso, sendis al mi kvanton da ekzempleroj de la libro "Hamburgo en Retrospektivo" kun la instrukcioj transdoni ekzemplerojn al ĉiu donacinto. Se ĉiu donacinto sendos al mi la sumon de 60 c por pagi la afrankon, mi kun plezuro sendos la libron.

—Ken G. Linton.

### LAŬDO POR RUSS BAXTER

La pasinta sekretario de A. E. A.

Dum la kriadore de la granda Kongreso forvelkas, ni ne forgesu dankon pri la netaksebla servo farita de la pasinta sekretario, Russ Baxter kaj lia edzino May. Ili tre bone prizorgis la funkciadon de nia Asocio dum la kvarjara periodo inter la du melburnaj kongresoj — januaro 1972 ĝis januaro 1976. Laborante apude kiel prizorgisto de la

financoj, mi bone scias la kvanton da detaloj plenumitaj de tiu sekretario, ĉiam afabla, ĉiam helpema al ĉiuj siam efika kaj kompetenta. Al Russ Baxter ĉiu membro de nia organizo ŝuldas dankesprimon. Bona tasko bone efektivigita!

Ĉe la kongreso ĉi-jare ni elektis novan sekretario, Simon Wickenden, kiu akceptis la gravan postenon. Kiel Russ antaŭe, li estas membro de la Manly E-Klubo. Kvankam li loĝas pli ol 40 mejlojn for, sude, Simon, kun helpema edzino, Saron, ekde la elekto, bone prizorgas la administracion. Estas bonŝance por la Asocio, ke Simon konsentis anstataŭigi Russ. Nun, estas la devo de ĉiu membro, kunlabori kun la nova teamo. Per tia helpo, ilia tasko estos pli facila kaj la Aŭstralia E-Asocio certe progresos. — Les SCOTT.

**Kongresano dankas:** Permesu al mi, pere de via gazeto, sincere danki al la multaj aŭstraliaj esperantistoj, kiuj helpis al mi kaj miaj amikoj dum mia kvinsemajna restado en via kontinento. En la Pacifika Kongreso gravaj paŝoj estis faritaj: sen la afableco de tiom da samideanoj, mi ne povintus topreni ilin.

Mi estas certa, ke mi denove iam renkontos multajn el vi pro niaj komunaj streboj por nia lingvo. Ĝis tiam sukceso atendu viajn laborojn! Refoje dankon. — Stefan MacGill.

## Gramatike-

En la novembra numero de Brita Esperantisto la fama klera angla Esperantisto, D. B. Gregor, parolis pri la verbo, "krokodili" kiun li nomis mistera, ĝis Gaston Waringhien, prezidanto de la Akademio de Esperanto, klarigis tiun misteron. Li skribis:

"En Pariza renkontejo, antaŭ pluraj jaroj, la junaj Esperantistoj, kiuj deziris ĉiam interparoli en Esperanto, protestis inter si kontraŭ grupo de maljunaj Esperantistoj, kiuj ĉiam parolis france; kaj unu el ili, uzante kutiman (en nian lingvon) metaforon, parolis pri "tiuj maljunaj krokodiloj", kaj de tiam nature venis la decido: "Almenaŭ ni, ni ne krokodilul!" Tiu metaforo rapide disvastiĝis en la internaciaj kunvenoj de junuloj. Jen la tuta mistero.

La fenomeno tiel nomita "krokodili" estas supezeble proprajo de Esperanto. La bezono naskis la vorton; kaj aku-



ŝistino estis, kiel ofte ĉe la naciaj lingvoj, la hazardo. Ni ne rifuzu tian spontanajn kreitaĵojn, kaj daŭre uzu ĝin en la plej ofta kunteksto, nome: "Ne krokodilu!" — K. G. Linton.

Dezirata korespondi, precipe kun membrino en Okcidenta Aŭstralio, 56-jara patrino kun ses infanoj, iama korespondantino por fremdaj lingvoj, scipovas ankaŭ angle france, kaj itale, interesiĝas pri agrokulturo, precipe pri irigacio de dezertoj. (Interesan leteron transdonos Ken Linton kontraŭ peto). S-ino Ilse Tobben, Roermonder Str. 61, D 4055, Niederkruchten, F. R. Germanio.

**KOREKTO:** Sur paĝo 27, kol. 1, en la lasta numero, enŝteliĝis eraro. S-ro K. G. Linton estis A.E.A. Kasisto inter 1956 kaj 1967. (Tio estas, 12 jarojn NE 2 jarojn).

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

• **SYDNEY:** 3/5, S-ro H. Verlinde pianludis por komuna kantado. Sekvis vortludo. 10/5, Jim Harwood paroladis pri koincidoj, inkluzive unu propran. Dum halto en Honolulu pro bremsdifekto en aviadilo, li konatiĝis kun du pasaĝeroj samprofesiaj. Post ses semajnoj, en alia aviadilo en Usono, li renkontis unu el la novaj konatoj. Post jaro li translokiĝis de Adelaide al Sydney kaj trovis en la nova laborejo tiun kunfluginton. Aliaj rakontis: Elsie Curry trovis epitafon en malgranda tombejo; post jaroj ŝi renkontis nepinon de la enterigita homo. La tri estroj de Tom Elliott (edzino, departementestro kaj granda ĉefo) ĉiuj naskiĝis la 5an de Decembro. John Matasin aldonis, ke iun nokton, sen kialo, li veturis hejmen laŭ nekutima vojo kaj alvenis al loko kie, antaŭ nur kelkaj minutoj, la filon trafis akcidento.

17/5, Jim Harwood montris lumbildojn pri la Melburna Kongreso; kaj poste ni aŭdis sorbendiĝitan intervuon faritan de Wre Chandler en Perth post la 60a I.E.A.-Kongreso. 24/5, Wre Chandler, pensinstige kaj timige, parolis pri "La Morto de la Maro". Plej granda fonto de la oksigeno, tiel necesa por la homa ekzistado, estas la mara planktono, kiun rapide detruas la daŭra polucio per hidrargo kc. fare de komercaj

entreprenoj. Laŭ Cousteau, la maroj mortos antaŭ la jaro 2,000, se la homoj nenion faros por eviti tion. 31/5, ni bonvenigis mondvojaĝintinon Shirley Fanos, kaj 'om Elliott pritraktis la multflankajn temojn "Naturo kaj Supernaturo". Poste li legis versojn el la poemo de William Auld — "La Infana Raso", esprimo de espero, bazita sur la naturo.

7/6, bona gasto estis S-ro Hall el Novzelando. Por la programo anoj alportis objektojn, kiuj havas historiojn. David Gould montris kaj priparolis kandelindon aĉetitan en Jerusalemo; Wre Chandler prezentis "magian" lanternon, kiu apartenis al praavo en 1851; Elsie Curry kunhavis cizelitan "marĉevalon" el Nov-Hebriidoj; Volo Gueltling malkaŝis subtelerajn paperojn el fama restoracio Gamle Kro en Odense kaj S-ino Chaldecott montris ŝtonon el la insulo Iona, kiu laŭ legendo verdiĝis post Sankta Kolumbo paŝis sur ĝin.

—M. Chaldecott.

• **MANLY:** Komenca kurso daŭras ĉiumarde. Membroj kunvenas por traduki skeĉojn, legi artikolojn kaj diskuti pri artikolaj temoj. 30/3 S-ino Gilda Franze montris diapozitivojn pri Sardinio, sia hejmlando.

Adiaŭaj vesperoj okazis 6/4 por Ges-roj Ross kaj 13/4 por Ges-roj A. Cocking, kiuj veturos transmaren. Dek kvin membroj ĉeestis, 27/3, la geedziĝon de Thora Richmond ĉe St. Stephens preĝejo.

Ĉe la hejmo de S-ino Mina Bedwell okazis 11/4 aferkunveno kaj societa posttagmezo kun teo kaj manĝo. Je la 4-a de majo nian societon honoris per vizitio eminenta Esperantisto, Prof. Ralph Lewin el San Diego, Prof. Lewin, kiu ofte prelegis ĉe la Somera Universitato de la Universalaj Kongresoj, alparolis nin pri sia marbiologia laboro. Li kaj lia edzino nuntempe loĝas en nia regiono.

Niaj membroj kolektis \$500 por la Ruĝa Kruco.

—Edna Giles

• **MELBOURNE:** S-ro Arnold Baldwin, 12/4, nomis 5 bazajn ilojn, de kiuj dependas la nuna civilizacio kaj tiel enkondukis skizon pri la evoluo de la plumo, kraĵono, tranĉilo, forko kaj kulero. Ĉe la amuzvespero de 26/4, S-ino May Frogley montris kolorbildojn kaj parolis pri lokoj vizititaj dum vado en Kanado kaj Usono.

S-ro H. Beechey, 3/5, parolis pri novelegita libro "Kiam mi diras NE, mi sentas min kulpa" kaj pritraktis ties 10-

principan leĝprojekton pri asertaj rajtoj. S-ro H. Koppel, 10/5, prezentis "Novaĵojn el Esperantujo" kaj S-ro S. Kanacki, helpate de granda mapo priskribis, 17/5, viziton en Parizo.

La amuzvesperon de 31/5 gvidis S-ro John Munro, Li parolis pri la Sav-Armea blazono kaj sia espero, ke la Armeo adoptos Esperanton por internacia agado.

• **LAUNCESTON, Tas:** La Launceston E-Klubo havis sian ĝeneralan kunvenon en februaro kaj elektis novan estraron: Prez: Barry Squires; Sekretario: Phillip Connor; Kasisto S-ino Lynn Carswell. Okazas 2 klasoj. Tiun por komencantoj gvidas S-ino Helen Connor (proks 7 studentoj), dum progresintoj kunvenas en "Stud-Cirklo".

La prepar-laboroj por la 21-a Aŭstralia E-Kongreso bone progresas. Elektigis komitateto sub gvidado de S-ro Mac Le Fevre. La kongreso okazos en la nova kaj tre moderna "Instituto por Altaj Studoj", de kie kongresanoj ĝuos belan vidajon de la Tamar-Rivero. Nur 90 ĉambroj (unulitaj) estos haveblaj, do rapidu kaj aliĝu al la kongreso. Ĉambrozervoj estas \$10 kaj la kongres-kotizo ĝis 1-a de julio 1977 estas \$11 (\$6 por pensiuloj). Sendu vian ĉekon, kune kun afrankita respondkoverto, al S-ro Mac Le Fevre, 22 Bellevue Ave., Launceston, 7250.

• **ST. LUCIA (Brisbane)** Dum la lastaj tri monatoj la kunveno de nia klubo okazis ĉe la loka halo de la "Metodista Preĝejo". El Usono parencoj de S-ino Greenhalgh vizitis nian kutiman kunvenan lokon.

Ni adiaŭis S-inon Annie Spencer, kiu vojaĝos al "Bona Espero", la esperantista kolonio en Brazilo. Ŝi esperas renkonti D-ron kaj S-inon Einihoviĉi (Perth), kiuj ankaŭ partoprenos la 11-an Seminarion de Esperanto de la 15-17-a de julio.

—Winsome Greenhalgh.

• **Kaprikorna Marbordo:** La klubo nun havas 15 membrojn, kaj klasoj okazas vespere dufoje en ĉiu semajno, marde kaj vendrede. Ni sukcese gastigis la majan konferencon de la Federacio. (vidu detalan raporton aliloke).

La nova sekretario de nia societo estas: Julie Hock, Esplanade, ZILZIE, Q'ld. —John Moore

Ekspedisto — Despatch Officer  
S-ro JACK FALLU  
10 Sumersett Ave.,  
Oakleigh South, 3167

## EL LA FEDERACIOJ

• **N.S.W.:** Je sabato, la 15-a de majo okazis Federacia Forumo kaj societa aranĝo. La Prezidanto bonvenigis vizitantojn el Brizbano: Mal kaj Val Robinson kun filino

La unua ero en la programo estis forumo, dum kiu estis proponite, ke okazu minimume 2 piknikoj, 2 forumoj kaj 2 konferencoj dum la jaro. Sekvis diapozitivoj pri Sumatro kaj Malajzio, kun prelego tiutema fare de Jane, la filino de Eunice Graham, kiu lastatempe vizitis tiujn landojn. Ĉiuj ĉeestantoj admiris la bildojn kaj la paroladon. Dum la te-maĝo Jane aŭdigis indonezian muzikon.

La aranĝo finiĝis per komuna kantado laŭ lastatempaj tradukaĵoj de Marjorie Duncan. Poste ĉiuj ronde staris por danci "Hoki Popi" esperantlingve.

—Eunice Graham.

• **KVINSLANDO:** La nova Esperanto-Klubo de la Kaprikorna Marbordo estis la gastiganto de la maja konferenco de la E-Federacio de Kvinslando, 1-3 de majo. 41 personoj ĉeestis la konferencan ĉefmaĝon, kie la prezidanto de la Livingstone Shire Council oficiale malfermis la konferencon. Klubanoj de Emu Park gastigis la vizitantojn de Brizbano, Rockhampton kaj la Sunbrila Marbordo, en privataj domoj. Ili plejparte alvenis per trajno, ĉar temis pri 700-km vojaĝo. — John Moore.

La vetero dum la tuta semajnfino estis sufiĉe agrabla, spite de vento post frua ciklona vetero. Sabate okazis la kutima konferenca kunveno kun salutoj de la diversaj klub-reprezentantoj. Post la vespermaĝo okazis distra vespero. Kantis la Brizbana Kantgrupo; S-inoj S. S. Martin kaj G. Phillips kaj R. Ross prezentis skeĉon. Trevor Steele rakontis 2 historietojn kaj Hilda Daniels instruis kaj gvidis ĉeestantojn pri la arto de "Kvadrata Dancado".

Dimanĉe ĉiuj kunvenis en la hejmo de Ges-roj Moore por konversacia rondo; Trevor Steele instruis komencantojn per rekta metodo. Per aŭtoĵ la konferencanoj veturis al "The Causeway", kie okazis pikniko. Denove la tago finiĝis per distra vespero, vere ĝuplena.

Lundmatene la konferencanoj veturis al la "Botatnikaj Ĝardenoj" de Rockhampton, por ĝui la unikecon kaj belecon de tiuj ĝardenoj.

• **VIKTORIO:** La Federacio aranĝis tre sukcesan aŭtobusan ekskurson je 13-a de marto. Post vizito al Monto Dandenong kaj arbaro Sherbrooke, la 51 partoprenantoj lunciĝis ĉe la rezervejo "Badgers Creek". Post la lunĉo la aŭtobuso kondukis nin al la monaĥejo de la Cistercianaj Monaĥoj apud Yarra Glen. Post inspektado de la tereno kaj la nova preĝejo, la monaĥo kiu prizorgas gastojn, invitis al posttagmeza teo. Entute, neordinara aranĝo, kiu pro tio plaĉis al ĉiuj.

La ĉiujara Seminaris okazis sabate, 29-an de majo en la domo de la Kvakeroj en Toorak. 41 esperantistoj de ĉiuj Melburnaj kluboj kaj Morwell, ĝuis tutagan programon el preleĝoj, instruado kaj distro. S-ro Marcel Leereveld gramatike ekzercigis la anojn. S-ino Fay Koppel prelegis pri "La Lingvo-Akademio de Esperanto" kaj pri du fruaj membroj de tiu institucio. Skeĉoj de la anoj de la Oakleigh-grupo, preleĝo de Ann Hearn pri vizito al Eŭropo kaj preleĝoj kun diapozitivaj de S-roj D. Pescod kaj H. Schepers kompletigis la programon.

**GRATULOJN** al Trevor Steele kaj Edith Fischer, kies geedziĝo okazis la 24-an de aprilo en Brizbano. Ni deziras al ili multajn feliĉajn jarojn kiel "pacaj batalantoj".

## RECENZOJ

### DU LIBROJ POR INFANOJ

**GRETE KAJ JEP:** Tradukis el la dana lingvo Gudrun Riisberg; presis Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, Aabyhoj. Jen verketo por tre junaj infanoj. Per rakontoj pri infanoj, en tre simplaj frazoj, ĉi tiu libro tute en Esperanto instruas la ĉiutagan lingvajon de geetuloj en la hejma kaj lud-medioj. Ĉiun scenon aŭ incidenton akompanas taŭga bildo, kiu povas instigi al kompreno kaj al posta demand-respond-ekzercado. Ilustris Kirsten Jensenius, kies bildojn infanaj manoj povos sufiĉe facile kopii (ĉi kolorigi) por aldoni proprajn skrib-ekzercojn—nepre stimulo al lernado. Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo.

**ESPERANTO POR INFANOJ:** Verkis G. Gladstone Solomon; eldonis The Esperanto Publishing Co. 9 Maycock Place, Orelia, W.A. 6167. Ke ĉi tiu

verko jam atingis represon de la sesa eldono, ŝajnas ĉio direnda por emfazi ĝiajn utilon kaj popularecon. Sen fortimiga grandeco, tamen tre ampleksa laŭ enhavo, ĉi tiu lernolibro prezentas, per mallongaj (komence nur unu-paĝaj) ĉapitroj, utilajn lecionojn, kiuj per simplaj reuzeblaj frazoj kaj akompanaj desegnoj, instruas laŭvice ĉiujn facetojn pri la familia vivo en la hejmo kaj ĉirkaŭaĵo, des pli alloga por infanoj ĉar la roluloj estas musoj. Konstanta, sed neniel enuiga, ripetado faciligos parkerigon, dum la okultrafa divido de atentindaj vortoj por montri radikon disde finaĵo, sufikso ktp. kontribuos al instruado pri la gramatiko. Alian helpon provizas "lernejaj lecionoj", kiuj detale pritraktas gravajn erojn, demandoj kiel instigo al buŝa ekzercado kaj sugestoj por skriba—mallonge, ĉia stimulo al lernado, ĉia helpo al instruado. Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo (80c). —Fay Koppel.

Studentino dez. koresp. pri muziko, literaturo: U.S.S.R., Eesti NSV, 203-600 PARNU, Haapsalu mnt. 33, F-ino Rumen Tiiv.

### LA 42-a NOV-ZELANDA ESPERANTO-KONGRESO

okazos en Auckland inter la 4-a kaj 8-a de januaro 1977. Eksterlandaj vizitantoj NE bezonas pagi kongreskotizon. Ĉiuj kongresanoj loĝos kaj manĝos en "Halo Grafton", moderna studenta domo. Vizitu belan Nov-Zelandon kaj samtempe subtenu per via ĉeesto la movadon en Nov-Zelando. Rezervu vian ĉambron, sendante \$10, al S-ro Fred Wood, 24 Stewart Road, Mt. Albert, Auckland 3, N.Z.

**SWITCHED ON PROF:** Professor Uwe Lehnert appears to have set something of a record. But first a word about the Prof. He heads the Berlin Pedagogical School, works at the Institute for Cybernetics, and is the President of GPI, Germany's Association for Programmed Learning. At the beginning of April, Prof. Lehnert did Dr. Helmar Frank's summer course in the international language; moving on to Herrmann Behrmann's: "Programmed Esperanto". Three weeks later he wrote to Behrmann (who incidentally is the President of the Europa Esperanto Club in Paderborn) saying, "I am now an enthusiastic Esperantist. Please send me an instructional program and records"

# NEWS - DIGEST

**AUGSBURG EXPOSITION:** Prof. Leo Fischer, opened the German Esperanto Exposition in Augsburg on April 24th. Sixteen days later, 2,421 visitors had looked over the Exposition, which was housed in the Augsburg Town Hall. It was organized by the Augsburg Esperanto Group, the Munich Esperantist Railwaymen's Group, and the Nuernberg Esperanto Information Centre.

They had booked 600 sq. metres in the Town Hall and ran 49 trial lessons for 313 potential students. One of the organizers, Mrs. Margarete Schmid said, "Our results were better than those from a Congress". Twenty-five people have signed on for further instruction, and more than thirty visitors to the Esperanto Exposition bought textbooks and dictionaries. "Could this be a new way?" Mrs. Schmid wondered.

Organizers calculated that the media coverage generated was worth more than \$7,500 and that more than 500,000 people were reached via the press, radio and television. Apart from the local Bavarians, there were also visitors from the United States, Japan and Indonesia. Augsburg councillors had to pass through the Exposition on their way to meetings; and at one of those meetings, the Councillors decided to name one of Augsburg's residential streets: L. L. Zamenhof, after the creator of Esperanto.

**SPRING IN THE BALTIC:** A stroll along the Baltic coast and supper-time "sausage sizzle" were part of the extra-curricular programme during the week-long seminar: "Esperanto Springtime by the Baltic". The seminar was jointly arranged by the Polish Esperanto Association and the Koszalina Socio-Cultural Society. The serious part of the seminar was a course in "tuning up your language skills" which was conducted by Polish Esperantist, A. Pettyn who was elected to the Academy of Esperanto in February, three months before the seminar.

**KIWI SPEAKS:** If you were at the First Pacific Esperanto Congress held in Melbourne, chances are you would have met Stefan MacGill. The cheerful young school teacher from New Zealand

recently spoke over Radio Vienna, while en route to Oslo where he was to start a speaking tour of Scandinavia. Stefan told his audience that 280 boys and girls in their early teens learnt Esperanto at school in New Zealand last year.

At the end of his speaking tour, Stefan heads for Rotterdam where he will work for a year at Esperanto world headquarters.

**FRIENDLY FAMILY:** The British Esperantist family headed by headmaster Raif Markarian, was featured on BBC1 television in connection with International Friendship Week. Brian Barker was also interviewed on radio for the Week which is held during the last full week in February of each year.

**MACEDONIAN GROUP:** Sixty Esperantists got together in Macedonia's second largest city on March 14th to found the Bitola Esperanto Society. The fledgling society, the eighth in Macedonia, was welcomed into the fold by the President of Macedonian Esperanto League, and former Cabinet Minister, Mr. Dime Bojanoski-Dize. First major activity for the Bitola Esperanto Society will be hosting visitors from the 20th Yugoslavian Esperanto Congress being held in Pilep at the end of July.

**FINNISH WEEK:** An international study will be held in the Finnish maritime town of Vaaski from July 10th to 18th. Hemmo and Veera Tietta will aim to build up a working knowledge of Esperanto in the studies, and will be assisted by Else Rasmussen of Denmark, and Milvi Myyrisepp of Estonia.

**GET THIS:** A new German-language brochure for teachers can be purchased for DM1.00 from the Ludwig Pickel "Libroservo". Professor Max Mangold of the Saarland University wrote it. There are twelve pages, and it is titled "Sprachwissenschaftliche Ueberlegungen zur Frage der leichten Erlernbarkeit des Esperanto". Got that?

**LIT UP IN ATHENS:** A dazzling reception awaits Esperantists going to the 61st International Congress in Athens this year. The mayor, alderman John Papatheodoru, promises that the Greek capital will be specially lit up at night during the Congress.

**CREDITS:** News Digest thanks Pilo Press, and W.E.M's International News Letter.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



---

REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

---

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Kasisto: S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

---

N-ro 148 (228)

MELBOURNE

Julio/Aŭg. 1976

---

## THE UNHEALTHY STATE OF THE WORLD HEALTH ORGANIZATION

Speaking before the Assembly of the World Health Organization on 20th May, 1975, blind Sir John Wilson, President of the World Organization to combat Blindness explained that a very modest investment could save the sight of millions of people. The cure for trachoma, chief cause of blindness in the world costs only 1.25 Swiss Francs (about 40 cents) per person. Protection for the eyes of children threatened by Xeroftalmology (chief cause of blindness in children) costs no more than 0.30 Sw.F. (about 11 c) yearly per child; in India sight was restored to 12 million people suffering from cataract at a cost of 12.50 Sw. F. (about \$4) per operation. Isn't it scandalous that the money necessary for the fight against these diseases and the restoration of sight to millions of people cannot be raised?

Delegates from 145 states listened impassively, no doubt regretting the inability to raise the necessary money for the amelioration of these sufferings.

But on the 28th May, 1975, these same delegates accepted two resolutions granting to Arabic and Chinese the status of "working languages", which decision will cost the World Health Organization 12,500,000 Swiss Francs (\$4,000,000 — Document A 28/50), enough to save the sight of 10 million people afflicted with Trachoma.

It is as though we are witnessing a prestige show: Are you willing to care for the welfare of people? Money is NOT available. Do you wish to pay interpreters, translators, and for tons of paper? Presto! Money is available.

This almost magic disappearance and reappearance of funds prompted linguist-psychologist teacher at Geneva University, Claud Piron, to direct an open letter to the Director General of the W.H.O., which we summarize as follows:

The international organizations are suffering from a mental illness called BABEL, which swallows a large percentage of their financial resources to the disadvantage of the goal for which they were created. For instance, the WHO cannot find S.F. 65000 to obtain pure water for a poor country and to create a sewage system, but it is prepared to spend S.F. 12,500,000 for a purely administrative purpose. However, hygiene is the basis for public health and water the key to hygiene.

At Esperanto World Congresses university professors of many countries lecture about their special subjects. They prove that BABEL has been conquered. It is to be hoped that those responsible for the health program of the world will be saved from their mental blindness.

---

## LA 61-a UNIVERSALA ESPERANTO - KONGRESO EN ATENO

Dimanĉon, la 1-an de aŭgusto komen-  
ciĝis la kongreso en la luksa hotelo  
"Hilton" Post salutvortoj de la UEA-  
Prezidanto, D-ro Humphrey Tonkin,  
salutis la urbestro de Ateno S-ro Johano  
Papateodoro. Sekvis reprezentantoj de  
la greka registaro kaj salutoj de diplo-  
matoj. Tiel finiĝis la inaŭguro aŭ unua  
parto.

Samloke okazis en la posttagmezo la  
dua parto la malfermo, de la kongreso.  
Kiel kutime paroladis la reprezentantoj  
de la landaj asocioj kaj la aŭstralia re-  
prezentanto, S-ro K. Linton, estis la unua  
parolanto. Sekvis la kongresa parolado de  
la prezidanto de UEA, D-ro Tonkin. Li  
skizis la sukcesojn de UEA dum 1975 kaj  
raportis ke la asocio havis profiton de  
26.000 guldenoj. Li diris ke la ĝenerala  
strategio de UEA montriĝis esence prava  
laŭ tri vidpunktoj:

La unua estas plifortigi la internan  
funkciadon de la asocio. La dua estas  
sisteme labori por la unueco de la E-  
movado kaj la tria pli klare kaj emfaze  
prezenti Esperanton al la ekstera mondo.

Aliĝis al la kongreso 1100 personoj.  
La komitato de UEA pritraktis amplek-  
san tagordon. La UEA akceptis la aliĝ-  
petojn de la landaj asocioj de Suda  
Koreujo, de Slovakio kaj de la Germana  
Demokratia Respubliko.

S-ro Linton raportis ke partoprenis  
entute 9 aŭstralianoj. La kongreso de-  
cidis ke la kongreso en 1977 okazu en  
Reykjavik (Islando) kaj en 1978 en  
Varna (Bulgarujo). Venis oficiala in-  
vito de Lucerne (Svislando) por 1979  
kaj oni anticipas, sed ankoraŭ ne firme  
decidis, ke okazu kongresoj en Brasilia  
1980, en Helsinki 1981 kaj Stockholm  
1982.

## NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto  
Bun'ichi Iizaki)

La 50-a kongreso de KIUSU (suda  
parto de Japanujo) okazis je 24-a kaj  
25-a de aprilo en la urbo FUKUOKO.  
Proksimume 60 samideanoj partoprenis  
kaj aŭskultis kun intereso prelegon de  
S-ro Josikazu Takiuci pri la temo  
"Esperanto-movado en Takacuki Osako."

La 24-a KANSAI-Kongreso okazis je  
29-a kaj 30-a de majo en Kyoto. Kun  
plezuro oni bonvenigis eksterlandajn  
gastojn: Ges-rojn E. Woessink el  
Nederlando, S-ron George Krizan el

## LA 49-a S.A.T. - KONGRESO (De nia sveda korespondanto Henry Lindkvist)

La 49-a kongreso de Sennacieca  
Asocio Tutmonda okazis de la 24-a ĝis  
la 30-a julio en la sveda urbo Goten-  
burgo. Aliĝis 335 laboristaj esperantistoj  
el 21 landoj, el kiuj efektive ĉeestis 301.  
La inaŭguro okazis en la universitato  
kaj salutparolis reprezentantoj de diver-  
saj Laboristaj Esperanto-Asocioj kaj  
kiel reprezentanto de U.E.A. S-ino Ulla  
Luin el Svedio. Aŭstralia ne estis  
reprezentita.

La sveda ĉefministro Olof Palme sen-  
dis salutleteron kaj la ministro por ekster-  
landaj aferoj Sven Andersson apartenis  
al la honora komitato. Ciu kongresanoj  
rajtis senkoste vojaĝi per tramoj kaj  
aŭtobusoj. La socialdemokrata partio kaj  
la sindikatoj montris eksterordinaran  
intereson al la kongreso. La centra  
organizo de la sindikatoj aranĝis ves-  
peron por informi kongresanojn pri la  
svedaj sindikatoj kaj poste regalis la  
partoprenantojn.

La titoloj de la prelegoj estis "Geno-  
cido en Burundio", de Justin Minani kaj  
"Lingvo kaj realo" de Simon Aarse.  
Kongresaj ekskursoj okazis al la arki-  
pelago norde de Gotenburgo kaj al  
Skagen, plej norda urbo de Jutlando  
(Danio).

La kongreso akceptis Gvidrezolucion,  
kiu i.a. esprimas solidarecon kun la  
sindikatoj, kondamnas uzadon de per-  
forto en interrilatoj de popoloj, kon-  
damnas genocidon, konstataj kun beda-  
aŭro ke en multaj landoj rasismo daŭre  
venenas la publikan vivon kaj kon-  
stataj kun bedaŭro ke pluraj membroj  
ankoraŭ spertas malhelpon en siaj trans-  
limaj kontaktoj, malgraŭ la subskribo de  
la finakto en Helsinko.

(Aŭstralia S.A.T.-Peranto estas S-ro  
Volo Gueltling, 9/45 Alt St., Ashfield,  
2131)

Kanado, kaj aliajn. Okazis ampleksa  
programo, oratora kaj deklama kon-  
kurso, ĝajaj vesperoj por gejunuloj, de-  
bato pri "Esperanto nuntempe kaj en la  
estonteco". Prelego de S-ro Tacuo Fu-  
zimatō temis pri la Esperanto-movado  
en Eŭropo kaj en Japanujo, egaleco, dis-  
vastigo kaj paco. Samtempe okazis tutis-  
maj vizitoj en Kyoto kaj programo por  
komencantoj en japana lingvo.

La 25-a KANTOO-Kongreso okazis  
je 26-a kaj 27-a junio en kunveno  
Kasumiqaseki, Tokio, la centro de la ĉe-  
furbo. Entute ĉeestis 150 personoj; gasto  
el Jugoslavio salutis la kongreson kaj

S-ino Isobe tradukis la saluton. S-ro Pompilio, iama konstanta kongresa sekretario de U.E.A., prelegis. Parolis ankaŭ S-ro Sasaki, fama televida aktoro.

En la norda parto de la japana insularo okazis la 40-a HOKKAIDO-Kongreso. Ĝi okazis je la 25-a kaj 26-a de julio en la centra urba halo de la ĉefurbo Sapporo.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Jam de post kvar monatoj ni ne plu ricevis raportojn el Perth. Ni aŭdis ke la Ligo ne plu antaŭaranĝas la klukprogramojn. Vic-Prezidanto Jack Hawks estas transmare, Sekretario Bill Howard survoje al Kvinlando, Bibliotekisto Robert Brittain ne ĉeestis la komitat-kunvenojn dum la tuta jaro kaj Eric Thew, la oficisto por publikaj rilatoj, rezignis. Ges-roj Einihovici vojaĝas tra Suda Ameriko. Por ke la komitato havu kvorumon, oni kooptis Chris Dean kaj Olive Larter en la komitaton.

● **MELBOURNE:** S-ino Fay Koppel, 7/6, parolis pri "Stranga Geedziĝo", la jara inundo ĉe la unuigo de la Blua Nilo kun la Blanka, apud Khartoum (Sudano). S-ro H. Beechey, 21/6, pritraktis ankoraŭ unu pensinstigan verkon pri moderna Don Juan — ne amanto de belulinoj, sed profundpensa, maljuna meksika indiano kaj filozofo, kiun la verkisto Carlos Castaneda (laŭŝajne) renkontis, kiam li estis studento pri antropologio ĉe la universitato de Kalifornio.

Por signi la finon de la unua jarduono, F-ino Ann Hearn organizis, 28/6, art-prezentadon. Membroj de la 3 kluboj de Melbourne alportis bildojn (fotojn, pentraĵojn aŭ scenojn el arĉeloj aŭ brodaĵoj) kaj rakontis mallonge pri siaj ekspoziciaĵoj. Premion pro la plej interesa bildo gajnis S-ino A. Aling, per sceno pri eleganta salono en amsterdama domo de geavoj. Aparta pentrotekniko de ĉiel alloga pejzaĝo gajnis al S-ro H. Beechey la 2-an premion, dum ekzemplo pri meksika arĉela arto kaptis por F-ino Helen Menzies la trian. Por plej bona Esperanto-priskribo oni aljuĝis la unuan premion al S-ro Don Pescod, dum nova studento F-ino Schubert gajnis la duan.

Dum la amuzvespero je 26/7, S-ino Barbara Podmore montris diapozitivajn kaj priskribis vagadon tra Granda Britujo.

● **MANLY:** Improvizita renkontiĝo okazis ĉe la teatro en Neutral Bay por niaj eminentaj vizitantoj Prof. Ralph Lewin, marbiologo el Kalifornio, kaj lia edzino, Lanna Cheng. Hazarde, la gepatroj de Lanna ankaŭ vizitis Sidnejon, kaj povis kune ĝui la prezentadon.

Niaj vizitantoj esprimis la deziron vidi aŭstraliajn birdojn, do Wre Chandler kaj grupo de niaj membroj spertis agrablan, informoplenan tagon. (4/7) Kelkaj el niaj membroj veturis transmaren. S-ino Duncan veturis al Anglujo por viziti parencojn, Kay Morrison kaj Betty Cleminson flugis al Ateno, por partopreni la Universalan Kongreson. —Edna Giles.

● **ST. LUCIA:** Tre interesan leteron ni ricevis de nia mond-vojaĝantino Annie Spencer. Ŝi skribis el "Bona Espero", la esperantista kolonio en Brazilo, kiu estas ducent kvindek kilometrojn for de la ĉefurbo Brasilia. Tiu loko, laŭ Annie Spencer, estas tre simila al Monto Tambourine en Kvinlando, sed ne havas multajn enloĝantojn. Brazilanoj el diversaj rasoj parolas la portugalan lingvon, sed la statuto de "Bona Espero" postulas ke nur Esperantistoj loĝu en la distrikto (1150 kvadrat-kilometroj laŭ areo), sed oni devas permesi ke portugallingvanoj envenu por labori.

Annie loĝis en la domo de Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, la direktoroj de "Bona Espero".

— Winsome Greenhalgh

● **TOOWOOMBA.** Kunsidoj daŭras monate ĉe la hejmej de anoj. Ĉi tiuj okazis ĉe F-ino Borghardt kaj S-ino Lehane. 14/6: Vizitanto, S-ro D. Bawtree, paroladis pri viv-asekuro. Dum temaniĝeto, estis vigla diskuto pri viv-asekuro kaj pri lingvoj en Niĝerio. S-ro Bawtree loĝis en Niĝerio kelkajn jarojn kaj laboris multe kun la indiĝenoj. 12/7: Vizitanto, F-ino Gordon, el turista oficejo paroladis pri turismo kaj mond-vojaĝado, inkluzive de siaj spertoj en multaj lokoj. Inviti ilin paroli al nia klubo gajnis multajn poentojn al ni por la Komunuma Kluba Premio-Kampanjo (C. C. A. Campaign) Numero 2.

La Komunuma Kluba Premio-Kampanio celas instigi komercon en la regiono. Iu radio-stacio iniciatas la kampanjojn firmoj kaj butikoj subtenas la aferon finance, kaj konkursantoj kolektas fak-

turojn, kvitancojn, etikedojn, ktp, laŭ plano, dum ordinara aĉetado. Kelkaj butikoj, oficejoj, ankaŭ havas registrojn kaj subskribantojn ricevas poentojn. Estas semajnaj premioj, kaj post 13 semajnoj, estas grandaj premioj. Kaj, eĉ se klubo ne gajnas premion (kiel la nia!) estas malgranda ĉeko pro daŭrigo ĝis la fino. Dum la unua kampanjo, lastan jaron, T'ba E.Societo gajnis \$40 kaj aĉetis pluajn librojn por la kluba biblioteko. Ĉi-foje, la ĉeko estis nur \$26, sed sufiĉe por la kolektado de "pecoj de papero", ni konsentas.

—J. Lehane.

● SYDNEY: Eve Matasn montris lum-bildojn pri Nov-Zelando, de neĝkovritaj montoj ĝis bolanta koto; klaraj riveroj kaj ĉeloj. (12/7).

19/7: Ni informiĝis ke Alfreda Browne, vidvino de Gerald, mortis en la pasinta semajno. Dorothy Hasluck parolis pri la legendoj, ruinoj kaj historio de Glastonbury kaj diservo, kiun ŝi ĉeestis tie. Apud Glastonbury estas ŝufabrikejo, fondita de kvakera familio Clarks en la jaro 1925. Malnova reklamo por iliaj ŝouj montras la "Glastonbury Tor" -on (turo).

26/7: La studentoj de Tom Elliott "rompis la glacieron": Ili parolis pri propraĵaj interesoj. Joan kolektas pupojn, precipe el Japanujo. Glen parolis pri siaj gefiloj. Graham diskutis la olimpiajn ludojn.

2/8: Jim Harwood gvidis diskuton pri la temo "Leĝojn ofte malobeatajn oni devas ŝanĝi. Grava fakto en niaj traktatoj kun enmigrintoj estas ke la leĝoj de unu lando ne taŭgas ĉie. Je 9/8 Wre Chandler parolis pri "Niaj Subteraj Aŭstralianoj." Per ĉarma legendo li priskribis la devenon de la kvar vombataj specioj: la "Hara Vombato", la "Insula Vombato" de Tasmanio, la "Harnaza Vombato" kaj "Vombato kun ebena frunto". — Margaret Chaldecott

## FEDERACIO DE NOVA SUD-KIMRUJO

Je 17-a kaj 18-a de julio okazis en historia Coolangatta, apud Berry, konferenco de nia Federacio. Dudek ok membroj partoprenis. James Harwood, la prezidanto, raportis pri la agado de la Federacio kaj Prof. Robertson raportis pri la stato de la tutaŭstralia movado.

Sabatvespere okazis amuzvespero kun kantado kaj montrado de lumbildoj. Marjorie Duncan gvidis vortludojn. Dimanĉe okazis pinkniko dum malvarma vetero.

—Edna Giles.

## NEKROLOGOJ

● ALFREDA BROWNE: Ke la vivo sen la amata Geraldo fariĝis jam ne elportebla por nia kara Alfreda, ne miras ŝiaj amikoj. Apenaŭ jaron post la morto (vd. "A.E.", Sept.-Okt., 1975) de tiu kun kiu ŝi ame kaj trankvile alfrontis la batojn de l'sorto, dum 56 jaroj, kaj kun kiu ŝi partoprenis kaj subtenis laŭeble la E-Movadon en Sud-Afriko kaj Aŭstralio, ŝi kviete forglitis (12/7 en Sidnejo) por funebri (ĉu testi?) kune la datrevenon. Ripozu eterne en paco tiu noblanima paro.

Al la familio sincere kondolencas la Redakcio de "A.E."—F.K.

● LESTER THERMAN BANKSTON 65-jara, mortis subite post koratako en la hejma ĝardeno. Naskiĝinte en Dolores, Kolorado, Usono, Lester kun edzino Meryl venis al Aŭstralio en 1966 kaj decidis resti, ekloĝante en Adelaide. Eksocieto de la Pacifika Misilpafejo ĉe Point Muga, Kalifornio, kie li laboris de 1960 ĝis 1964, li estis Atmosfera Fizikisto kun Diplomo Bakalaŭra pri Meteorologio, kaj la Usona Registaro aljuĝis al li premion pro inventaĵo pri jetmovigo. Krom diversaj gravaj oficoj, li deĵoris kiel teknikserĝento por la Armeo en Eŭropo kaj lastatempe en Irano.

Lester interesiĝis pri E-o frue en 1970, kaj konvinkiĝis pri la bezono por pli granda publika subteno de la instruado pri E-o en lernejoj. Kiu partoprenis la Pacifikan Kongreson en Melburno, pasintan Januaron, sendube rememoros tiun nepretendeman eksusonanon. Lin forte inspiris tiu Kongreso. Adelajdanoj, al kiuj jam dolorige sentiĝas la perdo, tenos lin en la memoro pro bonhumoro kaj fidelo pri la estonteco de E-o, kiel internacia lingvo, kaj elkre kondolencas al lia vidvino, kiu subtenis lian Esperanto-agadon. — W. Addis.

## Jodi kaj la Bombo

Mi skribas ĉi tion je la kvara matene sidante en hospitala atendejo. En liteto nur deksep metrojn for de mi kuŝas mia trijara filino, Jodi. Jodi dormas kun siaj manoj ligitaj al ŝiaj flankoj, por ke ŝi ne tuŝu la cent kudrerojn en sia vizaĝo.

Tio okazis, ĉar Jodi faris teruran eraron antaŭ kelkaj horoj. Ŝi fidis al la mondo de plenaĝuloj.

Simile al miliono da aliaj trijaruloj en la tuta mondo, ŝi prenis la manon de sia patrino kaj eliris por ludi en la parko.



Ili preterpasis konstruaĵojn, kie juna aktivulo ĵus metis dek-kvincolan tubobombon. Eta Jodi faris tiun eraron, ke ŝi ne bone mezuris sian tempon, ĉar ŝi preterpasis la konstruaĵojn, ĝuste kiam ia bombo eksplodis.

La eksplodo sendis flugantan pluvon da vitrejo en ŝian etan vizaĝon. Nu, ni ĉiuj scias, ke tiu aktivulo ne intencis vundi Jodi-n Ho, ne! Kion li serĉis, estis justeco. Mia eta filino obstrukcis lin. Iuj dirus al vi, ke Jodi, estante trijara membro de la estabio, estas memkulpa, ĉar kiam aktivulo klopodas ĝustigi la justecon de la mondo per bombo, tiu kulpas, kiu lin malhelpas.

La revolucioj en ĉi tiu mondo dirus al vi, ke la viro, kiu tien metis la bombon, nur elektis sian metodon por aŭdigi. Multaj personoj povas doni al ni multajn bonajn kialojn, laŭ sia opinio, por ĵeti bombojn, por mortigi policanojn, por bruligado, por tumultado, kaj por ĝenerala malamo.

Ĝuste antaŭ ol mi komencis skribi ĉi tion, mi enpaŝis en la fakon, kie kuŝas Jodi. Ŝi ridetis al mi per siaj ŝiritaj lipoj kaj flustris: "Paĉjo, mi kuris kaj falis".

Konstatu, ke Jodi ne komprenas kio estas bombo aŭ kion ĝi faras; ŝi opinias, ke ŝi falis kaj sin vundis. Mi komencis klarigi al ŝi, sed tuj mi komprenis, kiel ridinde estas, do mi faris ion, kion mi ne faris de post mi estis infano. Mi ploris.

Kiel klarigi bombon al trijarulo? Kiel rakonti al tia infano, ke viro prenis dinamiton kaj pecojn da fero, kaj tiel faris bombon, kiu eksplodis kaj ŝiris ŝian vizaĝon? Ke li faris tion en la nomo de justeco kaj libereco.

Kiel vi povas klarigi tion? Mi ne povas.

El la angla tradukis Ken G. Linton.

## RECENZOJ

LINGVO: Eldonis (1974-76) Landmark Press Pty. Ltd., Princes Highway, Drouin, Australia.

Impona laŭ koncepto, amplekso kaj aspekto estas ĉi tiu verko — efektive verkaro — de Angelina De Fazio, juna, tre talenta instruistino de Melburno. Planita kiel dujara preparado al pli detala studado pri iu ajn fremda lingvo en pli altaj klasoj, la kurso celas la nuntempe multlingvan lernejararon en la unuaj du jaroj ĉe la gimnazioj en Aŭstralio — do, plejparte en la angla

lingvo — kaj prezentas tute novan metodon enkonduki kaj gvidi la studadon pri lingvoj.

Laŭ ia teorio de la aŭtorino, la studado pri iu ajn lingvo bezonas taŭgan preparadon, inkluzive instruadon pri la deveno kaj evoluo de lingvo ĝenerale kaj pri la strukturo kaj uzo de propra lingvo, flank-al-flanke kun komparo — rilate similecojn kaj diferencojn — de pluraj aliaj. La verkaron konsistigas unu tutehava gvidlibro por ĝeinstruistoj ("Teacher's Manual"), kaj volumparo por ĉiu el la du jaroj por studentoj, A. ("Student Workbook", kun informo, ekzercoj kaj testoj; B. "Student Resource Book", kun historieto, elementaj gramatikaj kaj ekzercoj pri 6 diversaj lingvoj).

Troviĝas entute materialo por 12 lingvoj, el kiu Esperanto estas nur la lasta, sed gravas, ke la aŭtorino elektis sian titolon el la internacia lingvo. Gravas ankaŭ la informo (laŭ "Teacher's Manual"), ke oni jam eksperimente provis la dujaran programon ĉe Lake Bolac High School kun tre kuraĝigaj rezultoj rilate entuziasmon, interesigon kaj kapablon pri fremdlingva studado kaj lingvo-komunikado ĝenerale.

La verkoj estos unuope haveblaj ĉe vendejoj por edukaj libroj: "Teacher's Manual", \$4.50; libroj por studentoj po \$4.79. Krome por pligrandigi la intereson kaj helpi al prononcado, estos haveblaj diskoj kaj/aŭ "cassette"—bendoj por ĉiu aparta lingvo po \$8.50.

— F. Koppel.

### La plej-aĝa viva estaĵo

La plej-aĝaj vivaj estaĵoj kaj la plej altaj estas la Mamutarboj (Sequoia sempervirens) en Kalifornio. Kelkaj el ili ankoraŭ kreskas en la sama loko, kie ili komencis vivi antaŭ ĉirkaŭ kvin mil jaroj.

Tiuj gigantaj arboj apartenas al la Koniferoj, same kiel niaj pinoj, piccoj kaj abioj, kaj iliaj fruktoj estas konusformaj.

Kelkaj el ili antaŭe altecon de cent kvardek metroj kaj iliaj belaj, vertikale kreskintaj trunkoj havis ĉe la grundo periferion de dudek sep metroj. Sed ne ekzistas multaj tiaj. Iliaj folioj estas malgrandaj kaj aspektas kiel skvamoj, kiuj part-kovras sin reciproke sur la branĉoj kaj branĉetoj.

En iu arbareto de tiaj kolosoj oni faris tunelon tra la trunko de unu, tiel ke aŭtomobilistoj povas veturi tra tiu nekutima arkaj-vojo. En la sama loko kuŝas alia, tiel nomata "patro de l'

arbaro", kiu estis cent kvardek kvar metrojn alta kaj tridek kvin metrojn periferie; ĝi estas kava kaj oni povas iri internen ĝis distanco de kvindek sep metroj.

Estas miriga penso, ke el unu eta semo povas kreski tia alta kaj forta monstro. — P. E. Schwerin.

## NIA HISTORIO

No. 13 Edith Alleyne Sinnotte  
(S-ino Mumford)  
1870 - 1947

Edith Alleyne Sinnotte naskiĝis en Liverpool, Anglujo, en 1870 kaj edukigis en Anglujo kaj en Eŭropo, kie sendube komenciĝis ŝia intereso pri lingvo-studado.

Ni ne scias kiam ŝi alvenis en Aŭstralio, sed ŝi aliĝis al la Melburna Esperanto-Klubo 29-8-1905, nur sep monatojn post la fondiĝo de tiu klubo en februaro 1905. Ek de tiam ŝia nomo ofte aperis en la protokolo de la Melburna Esperanto-Klubo, montrante ke ŝi tre aktive partoprenis en Esperanto-aferoj. Ekzemple ni legas en la protokolo por 28-2-1913:

"La membroj kantis ESPERANTA LANDO (Mc Burney) per la helpo de F-ino Sinnotte kiel akompanisto ĉe la piano".

Ŝi estis kasisto de la Melbourne Esperanto-Klubo 1908-10, membro de la Komitato 1911-12 kaj Vic-Prezidanto en 1913. Poste ŝi fondis E-grupon en la Orientaj Antaŭurboj.

Sed probable ŝia plej granda triumfo kaj plej granda sukceso por Esperanto en Aŭstralio estis ŝia verkado de la unua Esperanto-libro vendita en Esperanto en Aŭstralio, la romano "LILIO", eldonita en 1918.

Ŝi aliĝis al la Zamenhofa Monda Ligo en 1904, sub membro-numero 16415.

Unu el ŝiaj plej feliĉaj memorajoj estis renkontiĝo kun D-ro Zamenhof en 1906, dum la 2-a Universala Kongreso en Genevo. Probable ŝi estis la unua aŭstralia Esperantisto kiu partoprenis Universalan E-Kongreson.

Ŝi kelkfoje vojaĝis transmaren, unu el ŝiaj plej memorindaj travivaĵoj estis vojaĝo al Japanujo, kie ŝi loĝis kun japanaj Esperantistoj.

Ŝi edziniĝis malfrue en la vivo — je la aĝo de 60 jaroj — al S-ro William Mumford de Melburno.

Ŝi mortis en Balwyn, Melburno, Viktorio je 15-a de novembro 1947. La nekrologo, kiu aperis en "La Rondo" de januaro 1948 estis verkita de S-ro William Drummond, Esperantista kolego dum 30 jaroj. —I. T. Maddern

## OFICIALA INFORMILO

### Novaj Anoj:

Palmer, S-ino P. A., Glen Iris, Vic.  
Johnston, S-ro C., Innaloo, W.A.  
Hayes, S-ro G., Cronulla, NSW.  
Hayes, S-ino D., Cronulla, NSW.  
Mueller, F-ino H., Petersham, NSW.  
Newton, S-ro S., Mount Eliza, Vic.  
Campbell, S-ro C. B., Coff's Harbour, NSW.

Kanaĉki, S-ro C., Mt. Waverley, Vic.  
Ballango, S-ro S., Northbridge, NSW.

### Ĝenerala Fonduso:

Pollard, S-ro C., Warrawong, \$5.00  
Krimmer, S-ro S., Dubbo, NSW, \$5.00  
Lindsay, F-ino J., Nedlands, W.A., \$5.00  
Williams, F-ino B., Camberwell, Vic. \$10.00

Koppel, S-ro H., Reservoir, Vic. \$5.00  
Coastable, S-ino M., Nth Rockhampton, \$2.00.

McBride, S-ro J. Ennoggera, \$10.00

### T.G.M.F.:

Krimmer, S-ro S. Dubbo, NSW, \$5.00  
Teachers Assn (V. Timmins), \$92.93.

### F. R. Banham M.F.:

Teachers Assn. (V. Timmins) \$92.93  
Hasluck, F-ino D., Cheltenham, NSW. \$10.00

Banham, S-ro A., Melbourne \$50.00

### "Freedom of Speech" Represo:

Woodruff, Ges-roj E., Moree, NSW, \$5.00.

## JUNULA TENDARO POR ESPERANTISTOJ

El Launceston venis anonco, ke oni organizos tendaron por Esperantistaj gejunuloj. La tendaro, kiu esperas bonvenigi eksterlandajn vizitantojn, okazos de la 28-a decembro 1977 ĝis 1-a januaro 1978, tuj antaŭ ol la 21-a Tut-aŭstralia Kongreso.

Oni starigos la tendaron en kamparo apud Launceston (Tasmanio). La programo inkludas tablotenison, naĝadon, kantadon, k.t.p. La inkluziva kosto estos nur \$25 Aŭst.

La organizantoj esperas, ke la ĉeestantoj kontribuos al la programo, instruante siajn lertecojn kaj kulturon. Aliĝo estos kontraŭ antaŭpago de \$10 Aŭst. aŭ ekvivalento. Interesatoj skribu al

**Junula Tendaro por Esperantistoj**  
**P.O. Box 638, Launceston, 7250,**  
**Tasmanio, Aŭstralio.**

## CORRECTION — ESPERANTO IN ROCKHAMPTON SCHOOLS (June issue)

Ivan Maddern tells me that not he, but Mabel Wybenca is the author of this excellent little course "Bonan

Tagon". Thanks, Mabel. The many-sided work of preparation and making contacts — 38 schools — were contacted for the 11 affirmatives — was done in Rockhampton by Gil Shonhan, Joyce Turner, Palma Guy and other Rockhampton club members. Adult Education did the roneeing, and the Qld. Esp. Fed. paid material costs, \$73. My own part was the mechanical copying, during which I discovered the excellence of this little jewel of a self-contained, easy introduction to Esperanto and to linguistics.

Anyone wanting to try it out, please write — John Moore, Pelican Street, EMU PARK, Qld. 4703.

## Gramatike-

Jam dum tuta jaro mi kondukis ĉi tiun rubrikon, sed mi ricevis tiel malmultajn demandojn, ke mi demandas al mi, ĉu tiu temo vere interesas la majoritaton de la legantoj? Sendube iuj interesiĝas, kaj sendube ili trovis problemojn, pri kiuj ili deziras klarigon. Mi tre deziras ricevi tiujn demandojn, ĉar ili farus mian taskon des pli facila.

**EKZEMPLE** — Ni ĉiam uzas vortojn, kiuj similas al niaj anglaj vortoj, sed malemas uzi tiujn vortojn, kiuj similas al neniuj angla vorto. Du bonegaj Esperantaj vortoj estas "knali" kaj "knari", sed ĉar ili ne similas al anglaj vortoj, ni emas ilin malatenti. Serĉu tiujn du vortojn en via vortaro, kaj klopodu uzi ilin en propozicioj kiaj la jenaj:—"La motoro de la aŭto forte knalis" (backfired); "La knalo de la vipo timigis la hundon"; "La ruĝa baloneto subite knale eksplodis."; "La konstanta knarado de la difekta ŝutro malebligis al li dormi"; "Metu oleon sur tiun knarantan ĉarniron"; "Lia ĉarumo knare preterpasis mian fenestron."

Aliflanke ni povas uzi malĝustan vorton, ĉar ĝi pli similas la anglan ol la ĝusta vorto. Ekzemple:—"Pri kongreso mi legis raporton, kiu diris, ke la solena malfermo okazis en granda halo de la universitato". La vorto, "halo" estis ŝajne malprave uzita (ĉar ĝi pli similas la anglan vorton, "hall" ol la ĝusta vorto, "aŭlo". — Ken G. Linton.

"Mi estas lia edzino," ŝi respondis. "Mi ne estas lia vidvino."

"Per kiom ni vetu, Sinjorino, ke vi ne estas lia vidvino?"

La dektrijara Tomaso malfruis ĉe la lernejo, do lia patro skribis ekskuzan noton: "Mi vin petas, Sinjoro Profesoro, pardoni la malfrumon de Tomaso pro tio, ke ni havas tri filinojn, sed nur unu spegulon."

Kiam mi estis en la hospitalo por la nasko de nia filo, mi dividis ĉambron kun juna patrino, kies obstetrikisto estis iom ne parolema, sed tre praktika. Dum unu el liaj vizitoj por peni lin konversigi ŝi diris: "Sinjoro Doktoro, oni certe vin laborigas, ĉu ne?"

"Jes," li respondis sen malatenti siajn notojn. "Ŝajnas, ke mi havas tro da viroj laborantaj por mi."

Kion vi deziras:

Mi vin petas, Sinjoro, plialtigi mian salajron.

Kaj pro kio?

Mi edziĝis, Sinjoro direktoro.

Mi kondolas! Cetere vi ja scias, ke nia firmao laŭprincipe ne responsas pri akcidentoj ekstere de nia entrepreno.

Sinjoro: Mi certigas, ke la virtemaj virinoj ĉiam estas enuigaj.

Sinjorino: Ĉu vi tion riskas aserti vidalvide al mi?

Sinjoro: Pardonu, ĉarmulino, ĉe vi mi neniam enuis!

**WHISPER FROM WESTMINSTER:**

The British Parliamentary Esperanto lobby is still buttonholing MP's in the corridors of the Mother of Parliaments. Fifty-five MP's from both sides of the House comprise the lobby; and Michael Shersby, the member for Uxbridge, is a new joint-Secretary.

**PICTURE DICTIONARY:**

Back in 1964 Esperantist Ruediger Eicholz started compiling the Esperanto Illustrated Dictionary, basing his work on the German publication "Der grosse Duden - Bildwoerterbuch der deutschen Sprache". Eichholz's Esperanto dictionary is planned to have around twenty-five thousand concepts clarified by illustrations. Eichholz had completed 672 pages by mid-1975 and is at present editing the final proofs. The completed book is expected to be published in 1977. Meanwhile, if you want extracts from the proofs, write to Mr. R. Eichholz at 2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario L5H 3N6, Canada.

# NEWS - DIGEST

**A PASSIONATE QUESTION:** That's what Common Market Commissioner Borscheet called the proposed introduction of Esperanto into the European Economic Community. The Commissioner was commenting on a question asked in the European Parliament by British Esperantist and member of the Esperanto Lobby, Tom Normanton, MP. Normanton intervened during a recent Question Time when it was revealed that one in four of the Community officials works in the language services section. On hearing that more than \$17 million was spent on translations to and from the Community's six official languages, Normanton intervened to propose the use of Esperanto. But according to Commissioner Borschette, the present multilingual system will remain "for the time being."

**OLYMPIC WORDS:** The multilanguage sports brochure "Hello Friend" has been mentioned before in this column. Of the 13,000 printed, 11,400 found their way into the hands of athletes at the Montreal Olympics and 1,200 into the hands of other young folk. The balance will be sold to raise funds for the Esperanto movement.

**WORKING HOLIDAY:** Young Esperantists both Israeli and foreign, were invited to join in a working holiday at the Gaaton Kibbutz in east Galilee in mid-July. There were symposiums, excursions, and a variety of evening entertainments for them. They also took part in harvesting the kibbutz's pear crop.

**HOT AIR BALLOON:** Swiss Esperantist and balloonist, F. Liechti, will give Esperanto publicity a lift when he and a friend, Bruno Rohr, take off shortly from Zurich in a hot-air balloon carrying Esperanto slogans. To finance the operation, the Zurich Esperanto Society will sell philatelic covers celebrating the first flight of the Esperanto balloon at a cost of SFr6 each. In keeping with the spirit of the enterprise, the balloon will bear registration mark: HB-BEO which stands for "Swiss Balloon Esperanto" and was specially sought from the Civil Aviation Authorities in Berne.

**SOUTH AFRICA:** It appears likely that

the first Springbok Esperanto Congress will be held in Capetown this year.

**ESPERANTO AT THE MLA:** At the end of December 1975, the U.S. Modern Language Association held two seminars in San Francisco on the occasion of the Association's 90th Anniversary. The MLA has more than 30,000 professional instructors among its membership teaching English and other languages in High School, College and University.

One of the two seminars was given over to Esperanto, and concerned the language and its literature. Presiding was Esperantist Dr. Dennis Q. McNerny. Dr. McNerny himself teaches English at Bradley University, Peoria, Illinois and also gave a paper at the Esperanto Seminar. He spoke on the literary value of Raymond Schwarz's epic novel "Kiel Akvo de l'Rivero".

**OFFICIAL COURSE:** An official course in the international language is currently being taught at Provence University in Aix-Marseille, France. Guiding the instruction is the deputy lecturer in Russian, Michael Duc Goninaz. There are thirty men and women taking the course this year. It is given at an introductory level within the University's Institute for General Linguistics and Oriental and Slavic Studies. It lasts a year and requires 1½ hours' formal tuition per week. On successfully completing the Esperanto course, the students may receive a Diploma. An article by the professor appears in the latest Science Supplement of "Heroldo de Esperanto".

**VATICAN RADIO:** Every Sunday from April 18th Vatican Radio has broadcast in Esperanto at 23:30 hours GMT. The time was chosen to allow the international language to be heard as far afield as possible and the frequency in use (1529kHz) covers Europe and the Mediterranean zone. Instigated at the request of Catholic Esperantists from many countries, Vatican Radio says of Esperanto that its ideal of brotherhood among men is essentially Christian.

**SCULPTURE DISPLAYED:** A bust of the founder of Esperanto, Dr. L. L. Zamenhof, has been mounted on a concrete pedestal in the Zamenhof Gardens at Leenwarden, Holland. The bust of the good Doctor was sculpted twenty years ago by Samideano D. Blanksma.

**CREDITS:** This time to PP, HdE, IEMW.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Eurōka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Kasisto: S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 149 (229)

MELBOURNE

Septembro, 1976

## MIA ESPERANTISTIĜO

de

TREVOR STEELE

... la substantivoj ĉiuj finiĝas per  
'-ou', ekzemple, 'doŭmoŭ', 'po'doŭ',  
'muroŭ', 'fenestroŭ', 'sejĝoŭ' . . . .  
Parolis s-ino X, bonkora sed iomete kon-  
fuzkapa koleginino ĉe mia lernejo.

... kaj ĉiuj adjektivoj finiĝas per  
'-a', ekzemple, 'boŭna', 'va'ma', 'juna',  
'nigra', 'doŭlĉa' . . . .

La geknaboj de la optimisme nomita  
Esperanto-klubo gavis kaj ne povis sekvi  
la litanion. Mi flankenrigardis al mia  
juna franca kolego, kiu kune kun mi  
estis akceptinta la inviton de s-ino X  
aŭskulti la lecionon.

... kaj la adverboj kutime finiĝas  
per 'ej', ekzemple, 'boŭnej', 'rapidej',  
'oftej', 'utilej' . . . .

La franco malestime flustris, ke Esper-  
anto estas mizera imitaĵo de la franca,  
kaj li ekelpensis ĝentilan ekskuzon por  
malakcepti la sekvantan inviton de s-ino X.

... kaj se vi volas esprimi la malon  
de io, nur antaŭmetu 'mal-', ekzemple,  
'malboŭna', 'malligi', 'malpejza' . . . .

Ankaŭ la geknaboj neniam ĉeestis  
duan fojon, sed dank' al la populareco  
de la simpatia instruistino, ĉiusemajne  
aperis pluraj novaj interesatoj, kiuj  
siavice ne revenos . . . . El la ruinoj de  
tiu fiaska Esperanto-klubo leviĝis fine  
nur unu Esperantisto: mi.

Estis la jaro 1970 kaj mi troviĝis en  
Anglio post kelkjara restado en Ger-

manio. Retrospektive mi nun konscias,  
ke, kvankam mi eĉ ne aŭdis la vorton  
'Esperanto' dum tiuj jaroj, mia vojo  
al la lingvo internacia perpariĝis. Krome  
mi nun komprenas, kial multaj aliaj  
personoj, kiujn mi emas rigardi evidentaj  
kandidatoj por esperantistiĝo, ne faris  
la decidan paŝon. Plej grave estis, ke en  
1970 mi ne studis oficiale, la unuan fojon  
dum multaj jaroj (kiom da homoj ja  
lernus Esperanton, se "nur" ili ne devus  
studi aliajn temojn!). Plia faktoro ĉe  
mi estis, ke la Londona ĉirkaŭaĵo ne  
kontentigis mian emon okupiĝi pri frem-  
daj lingvoj: se mi estus renkontinta  
Esperanton en Germanio, eble mi estus  
konsiderinta ĝin senprestiĝa rivalo de la  
germana. Do en 1970 mi havis kaj tem-  
pon kaj emon esplori novan lingvon.

Aliflanke mi ekdubis pri la valoro de  
mia propra profesio, lingvoinstruado. En  
1970 estis mia sendanka tasko provi in-  
strui la germanan al geknaboj en orienta  
kvartalo de Londono. Mi dubas, ĉu iu  
observanto ricevus la impreson, ke la  
plej elstara trajto de la tiea loĝantaro  
estas senbrida soifo al klereco. Plej  
distingis mian lernejon la nombro da  
geknaboj, kiuj konatiĝis kun juĝistoj en  
ilia profesia funkcio. Nu, la germanan  
lingvon mi ja amas, sed tiu amafero  
estas privata, ne malkaŝenda al tia  
publiko. Certe la problemoj de lingvo-  
instruado estas akre akcentataj en tia  
lernejo, sed mia posteno tie igis min

ekpesi entute la rolon de mia profesio. Cu ĝi kontribuas al internacia interkompreniĝo, al forigo de problemoj kreitaj de lingvaj baroj, Eble . . . sed kial oni instruas precipe nur iujn lingvojn, kies rolo estas verŝajne malpli grava, ol ĝi estis antaŭ kvindek jaroj? Kaj kiel trakti la problemon, ke ĉiuj instruataj lingvoj havas por eksteruloj tiom da mallogikaĵoj, kaj malfacilaĵoj, ke ofte lernanto rikoltas nur kapdoloron kaj malplivaloran kompleksan? Al tiuj profesiaj zorgoj aldoniĝis samtempa politika evoluo—mi supozas, ke la konvencia termino estus "maldekstreniĝo"—malebligis al mi esti kontenta pri la privilegia rolo de la "grandpotencaj" lingvoj, speciale de mia propra idiomo.

Probable mia nuna perspektivo iom trompas mian memoron. Povas esti, ke mia intertempa sperto igas la konturojn aperi pli akraj, ol ili efektive estis en 1970. Tamen estas certe, ke eĉ tiam mia menso estis bone preparita por bonveniĝi Esperanton.

Do mi petis s-inon X prunti al mi lernolibron kaj ĉiuvespere mi dediĉis eble unu horon al la lingvo. Laŭ modernaj pedagogiaj principoj la malgranda libro (presita, mi kredas, en 1905) estis foje mankohava. Ekzemple, la plej longa ĉapitro detale esploris la kunmetitajn verbformojn kaj insistis, ke distingo inter "we have done", "we have been doing", kaj "we did" estas tre grava afero: alivorte, la verkinto ne povis trarompi la kadron de sia angla-lingva pensmaniero. Malgraŭ tiaj ne-perfektajtoj tiuj kvindek paĝoj rivelis al mi, ke Esperanto ja havas la du ecojn, kiuj laŭ mi necesas por lingvo, kiu ligas diverslingvanojn kaj samtempe kontentigas la intelektularon: ĝi devas esti relative facila kaj relative esprimiva. Oni povas imagi eĉ pli facilan lingvon ol Esperanton, aŭ pli nuancitan kun abundaj preskaŭsinonimoj. Sed Zamenhof trovis genian mezvojon, kiu kontentigas la plej diversajn kriteriojn. Kiam mi poste konatiĝis kun Ido, Occidental ks., la supereco de Zamenhof ŝajnis al mi okulfrapa, ĉar lia perspektivo estis interpopola, dum liaj rivaloj, kun malpli da sperto esperis proksimiĝi siajn kreitaĵojn al la okcidenteŭropaj lingvoj, imitante multajn el ties nelogikaĵoj. Mi supozas, ke Zamenhof dum tiuj multaj jaroj, kiam li submetis sian lingvon al la postuloj kaj de la mondliteraturo kaj de la ĉiutaga vivo, klare konsciis pri la "ora mezo".

Alia avantaĝo de Esperanto, kiu tuj ekscitis min, kaj hodiaŭ des pli, ĉar mi

intencas esprimi min bele tre per Esperanto, estas jena: la vortprovizo de niaj nacilingvoj suferas pro trouzado. Cu restas en la angla lingvo dek vortoj, kiuj ne almenaŭ parte senvalorigiĝis pro kliŝa ripetado, rikana dubasenco, aŭ intenca perversiĝo? Mi kunsentas kun tiuj poetoj en diversaj landoj, kies komuna devizo estas "tero bruligenda" . . . ni detruu ĉion, ĉiun vorton ekzistantan, kaj rekonstruu nian lingvan domon per novaj vortoj, kies signifon ni mem deternos . . . Eble tio estas neevitebla en kulturo, kie senĉesa komerca kaj politika reklamado kaj mensogado produktas cinikan mentalitaton. Ankoraŭ la vortoj en Esperanto konservas relativan freŝecon, kio povas esti tre favora al verkado, se oni evitas la malan danĝeron, tiun troan naivecon kaj sentimentalecon ekzempligitan en tia esprimo, kia "la verda koro".

Do mi trabaraktis la antikvan lernolibron kaj volis tuj eksperimenti per tradukado. S-ino X informis min, ke s-ro Y estas sperta "verdstelano"; mi surprizis lin per telefona peto kontroli kelkajn tradukaĵojn. Inter tiuj estis du aŭ tri psalmoj, kiujn s-ro Y "korektis" laŭ ege simpla metodo: li konsultis la esperantlingvan Biblion kaj, kie mia versio iel diverĝis de tiu "korekta" li trastrexis per ruĝa krajono. La ceterajn tekstojn li resendis sen korektaĵoj, ĉar li ne havis "sufiĉe da tempo". Kompreneble estis neĝentile miaflanke trudi miajn privatajn ekzercojn al nekompetentulo. Sed tiumtempe mi demandis min, ĉu s-ino X kaj s-ro Y estas tipaj Esperantistoj. Baldaŭ venis respondo . . . kaj la pendolo svingiĝis al la alia ekstremo. Laŭ instigo de s-ino X mi vizitis la Londonan Klubon. Prezidis D-ro Wells, gastparolis P-ro Lapenna, kaj multaj aliaj montris sin alte kapablaj. Plej imponis min iu ekscitigema klubano, kiu eligis vortorenton kun preskaŭ timiga vervo kaj flueco. Poste mi lernis, ke tiu "vervulo" nomiĝas Nikolaj Rytjkov. Mia reago al tiu memorinda vespero estis duflanka. Unuflanke estis plezurego sekvi fremdlingvan diskuton post nur kelksemajna lernado. Aliflanke mi iom senespere demandis min, ĉu mi iam regos eĉ ĉi tiun facilan lingvon samkiel tiuj Londonanoj. Modesta mi ne estis, ĉar mi jam ekkomparis min kun la elstaruloj de la monda Esperantistaro!

Du aŭ tri monatojn poste mi devis fari decidon: ĉu pasigi la someran ferion en Irlando, la hejmo de multaj el miaj prapatroj, aŭ ĉu akcepti la afablan inviton

de s-ro Markarian kunveturi al la 1970-a Universala Esperanto-Kongreso en Vieno? Mi ne plu scias, kial mi elektis la duan alternativon, sed en Vieno mi vidis propraokule, ke Esperanto estas vere tuthomara komunikilo, ne nur agrabla hobbio aŭ esotera ludilo por sekto da lingvemuloj. Certe mi seniluziĝis pri diversaj aspektoj de la homa-ho-tro-homa movado. Sed la mankoj ne forpeligis min, ili instigis min proponi mian modestan helpon. Mi ne plu estis nur juĝanto, kritikanto, aŭ observanto; mi jam fariĝis Esperantisto.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **TOOWOOMBA:** Post la aferkunsido (9/8), ĉeestantoj distris sin per Esperantoludoj.

La someraj ferio-kursoj ĉe Darling Downs Instituto por Supera Edukado kaj la estonta radio-kurso por lernejoj estis temoj dum pluraj kunvenoj.

Ĉe la Edukada Centro por Plenaĝuloj, du klasoj kunvenas ĉiun jaŭdon. La konversacia rondo, kiu ne kunvenis dum tri monatoj pro manko de taŭga loko, denove aktivis en septembro.

Ges. Le Fevre el Launceston feritis en Kvinslando, kaj per aŭtobuso el Brisbano ekskursis al Toowoomba, kie niaj anoj, S-inoj J. Carney, A. Dahl, R. Maltman, J. Lehane kaj F-ino Morgan, bonvenigis ilin ĉe urba kafejo, regalis ilin per kafo kaj poste eskortis ilin al la aŭtobuso. La Esperanto-kurso ĉe Darling Downs Instituto, januare, 1977, kaj la Esperanto-kongreso ĉe Launceston, januare, 1978, estis diskutitaj.

—J. Lehane.

● **PERTH:** Invitite por duonhora prelego pri Esperanto antaŭ grupo de sinjorinoj en Floreat Park, S-ino Vera Payne fakte sukcesis teni dum 1½ horoj la atenton de la aŭskultantoj, kiuj ŝajnis esti pretaj tuj komenci la lernadon. Espereble kelkaj aliĝos al kurso venontan februaron ĉe la Teknika Lernejo de Subiaco.

S-ino Margaret Chaldecott, sekretariino de la E-Societo de Sidnejo, estis nia gasto en aŭgusto. Membroj renkontis ŝin dum suna dimanĉa posttagmezo en "Kings Park" kaj poste ĉe unu el niaj klubkunvenoj. Estis plezuro aŭskulti tiel bonan kaj interesan parolanton.

Esperanto-klaso por infanoj okazas ĉe la Komunuma Centro de Fremantle. La instruisto, Ligano, nun ricevis inviton gvidi klason por plenaĝuloj, kaŭze de ties sukceso kaj pro Esperanto-ekspozicio en la biblioteko de Fremantle.

● **MELBOURNE:** Je 9/8 la klubanoj laŭvice prezentis erojn. Elstaris prelego de Pastro Midgley, kiu priskribis sian hobion, kolektadon kaj klasifon de informo multema. S-ro H. Koppel, 16/8, raportis pri "Novajoj el Esperantujo". S-ino Fay Koppel, 23/8, kun helpo de mapoj, parolis pri la multjara serĉo por la fontoj de la Blua kaj Blanka Niloj.

Okaze de la amuzvespero je la 30/8, S-ro Marshall Cohen priskribis aŭtobusan rondveturon tra Kvinslando kaj montris belajn diapozitivajn. Ni bonvenigis inter ni S-inon K. Ernst, kiu lernis Esperanton en Brisbano, sed nun loĝas en Melburno. Unu semajnon poste, S-ino F. Koppel distris la membrojn per legado de interesa letero de D-ro A. Einihovici, kiu detale priskribis sian vojaĝan al Sud-Afriko kaj poste viziton al la Esperantista Kolonio "Bona Espero" en Brazilo.

● **BRISBANE:** Klaso por komencantoj okazas ĉiujauĉe en la klubĉambro en "Martin Chambers". Tie ankaŭ okazas ĉiulunde la kutimaj societaj vesperoj. La kantgrupo regule ekzercadas en la hejmo de Ges-roj H. Butler.

## LEILA WOODRUFF

Mortis la 28-an de aŭgusto, en hospitalo, S-ino Leila Woodruff, edzino de Ted Woodruff, U.E.A.-Delegito en Moree, N.S.K.

Sin atakis bronhito, kiun sekvis pneŭmonio.

Ges-roj Woodruff, kiuj ge-edziĝis antaŭ preskaŭ 39 jaroj, venis al Aŭstralio el Suda Afriko, kie ambaŭ estis aktivaj en la loka E-movado.

Dum la lastaj dek-kelkaj jaroj S-ino Woodruff multe suferis pro artrito, de kiu nur la morto liberigis ŝin. Al Ted Woodruff kaj la familio A.E.A. esprimas sincerajn kondolencojn.

## VARBU KAJ VARTU NOVAJN MEMBROJN

Perturba fakto estas, ke la listo da membroj de A.E.A. ĉiujare malgrandiĝas. Alia observo, kiu ĝenas min, estas, ke la mezaĝo de la ceteraj tro rapide kreskas, kaj multaj el la mal-

junuloj perdas entuziasmon kaj nelonge restas aktivaj. (Ne surprize ke pluraj forfalas).

Tre interesa estas la sciigo, ke el la membraro, kiu pagis sian kotizon ĝis nun ĉi-jare, 69 el 222 estas pensuloj. Multajn el niaj kompetentaj Esperantistoj la plej bonajn subtenantojn de la Asocio kaj la movado ĝenerale, oni trovas en tiu grupo — ne gajiga penso!

Se ĉiu el ni allogus novan membron dum la jaro, la membraro duobliĝus, kaj tiu problemo forvelkos! Pensu pri tiu eldoro — nur unu sola nova membro varbota de ĉiu — via, nia celo.

Averto! Malutilas, se ni gajnos membrojn sen intereso kaj sen entuziasmo. varbu kaj vartu kandidatojn tre, tre zorge. Kies nomo aperos je la kapo de la listo? Bonvolu pripensi tion serioze. — Les Scott, Kasisto

## Gramatike-

**La adverba participo devas ĉiam rilati al la subjekto de la propozicio.**

1. Enirante la teatron, li ekvidis sian amikon. (Dum li eniris la teatron, li vidis sian amikon)
2. Trafinte la aŭtobuson, ŝi sidigis kontenta sur la benko (Ĉar ŝi trafis la aŭtobuson, ŝi sidigis kontenta sur la benko).
3. Komenconte la laboron, li ekbruligis sian pipon. (Antaŭ ol li komencis la laboron, li ekbruligis sian pipon).

**Ekzemploj de misuzitaj participoj:**

1. Sidante en la nekonata ĉambro, stranga sento kaptis lin. (Malprava uzo, ĉar la subjekto de la propozicio estas "sento", sed "sidante" ne rilatas al "sento")
2. Ricevinte la libron, estas nur dece, ke vi legu ĝin. (Malbona stile kaj gramatike, ĉar la vorto "ricevinte" en la participa frazero, ne povas rilati al la subjekto de la unua propozicio, ĉar ĝi ne posedas subjekton, estante senpersona kaj do ne havas subjekton kun kiu rilati. Pli bone estus ŝanĝi la frazon: Ĉar vi ricevis la libron, estas, nur dece, ke vi legu ĝin").

**La pozicio de la adverbo.**

Kutime estas pli bone stile meti la adverbos antaŭ la verbo, al kiu ĝi rilatas, sed precipe kiam temas pri la adverboj "ankaŭ" kaj "nur".

1. Kiel ankaŭ Johano donis — As also John (as well as Tom) gave.
2. Kiel Johano ankaŭ donis — As John gave (as well as received).
3. Ĉe la kunveno nur Jakobo ĉeestis — At the meeting only John attended.
4. Ĉe la kunveno Jakobo nur ĉeestis — At the meeting John only attended. (He did not speak, vote, or do anything else).

## Raporto de la Ĉefdelegito

Ĉi-jare ni havis naŭ reprezentantojn ĉe la Universala Kongreso en Ateno, kaj mi renkontis ĉiujn krom unu.

Mi ne intencas polemiki pri la Hamburga afero, ĉu Lapenna pravis aŭ ne, sed mi ĝojas raportiti, ke post avida serĉo en Ateno mi ne povis trovi ian ajn signon de malamo al nia prezidinto. Aliflanke mi ne povis ne admiri la lertan kaj justan manieron, laŭ kiu nia nuna prezidanto prezidis la komitatkunvenojn. Mi deziris aŭskulti kiel eble plej multajn prelegojn, precipe tiujn de William Auld kaj John Wells, sed trovis, ke mi devis konstante elekti inter prelego kaj komitatkunveno, aŭ inter prelego kaj ekskurso, sed mi tamen forestis de nur unu komitatkunveno, kaj tio estis, kiam mi ĉeestis la ekskurson al Delfo.

En Ateno oni ne vespermanĝas ĝis la sepa kaj duono, kun la rezulto, ke vesperaj aranĝoj komenciĝis iom malfrue. Jes, oni siasas dum la post-taĝmezo, kaj pro tio, ke mi ne sukcesis sufiĉe rapide alkutimiĝi al tiu vivmaniero, mi devas konfesi mian kulpon pri tio, ke mi iom laciĝis dum la vespero, kaj devis rezigni pri kelkaj vesperaj aranĝoj. Jes, mi bone konstatas, ke mi maljuniĝas. Surprizis min, ke lando, kie la movado estas iom malforta, tiel bonege aranĝis kaj organizis kongreson.

Mi aparte ĝuis la postkongreson, kiu ĉijare estis tritaga krozo inter la belaj kaj romantikaj grekaj insuloj.

Post la krozo mi aliĝis al veturo tra Eŭropo, kiun ni komencis per tuttaga krozo en la Saronga Golfo, kie krozantaj ŝipoj estis eĉ pli multnombraj ol en la tritaga krozo en la Egia Maro. Ni vizitis ankaŭ la lokojn: Korinto, Miceno, kaj Epidoro, kiuj estis eĉ pli antikvaj ol Delfo. El ĉiuj Eŭropaj landoj, eble Ateno kaj la cetera Grekio, plej atestas pri sia atikveco.

Ni transiris al bela Italio ŝipe de Patraso, kaj tra Iumenitso kaj Korfujo al Brindizo. Apud Napolo ni vizitis



Pompejon, kie la ruinoj estas en preskaŭ perfekta stato pro tio, ke ili estis kaŝataj dum tiel multaj jaroj per la dika tavolo el cindroj. Napolo estis kovrata de iom densa nubo de smogo, (Jen neologismo, ankoraŭ ne en P.I.V.) sed feliĉe ni loĝis en Sorrento, kie la plejmulto de la Napolanoj ŝajne loĝas, ĉar la stacidomo estis tute apud mia hotelĉambro, kaj mi povas atesti, ke naŭvagona trajno alvenis ĉiujn kvin minutojn. Dum nia resto tie ni vizitis ŝipekskurse la belan insulon Kaprio.

Romo ne estas tiel antikva kiel Ateno, sed aliaj aferoj tion rekompencas, precipe la laboro de tiu geniulo Mikelaĝelo, kiu ne nur pentris kaj skulptis sed ankaŭ arkitektis. Nenie tio estas pli rimarkinda ol en la preĝejo de Sankta Petro kaj en la Vatikano.

Sed ne ĉiuj trezoroj estas en Romo, ĉar ankoraŭ multaj troviĝas en Florenco, dum la romantika Venecio prezentas aliajn allogaĵojn.

En Aŭstrio ni pasigis la nokton en Insburok, kie nia hotelo situis sur alta monto kaj rigardas al la urbego mal-supra. Spaco ne permesas, ke mi detale priskribu la belojn de Svisio, kie ni pasigis du noktojn en la belega urbego Lucerno, kaj kie min gastigis la loka Esperanto-grupo, kaj kie troviĝis la plej granda horloĝobutiko en la tuta mondo. En Germanio ni esploris la famekonatan kastelon ĉe Hajdelburgo kaj ŝipveturis sur tiu trafikplena Rejna Rivero, antaŭ ol eniri Francion.

Survoje al Parizo ni vizitis multajn famajn lokojn, inter kiuj estas Mosel, Thionville, Verdun, kaj Somo, sed mi devas menciiri Rimzon, kie situas unu el la kvar plej belaj katedraloj en la mondo. Kiel milionoj antaŭe mi enamiĝis en Parizo, kiu, dankon al la ordonoj de Napoleono Bonaparto, estas tiel perfekte planita, ke la tuta urbego prezentas unu belegan bildon.

Mi devas nun konfesi, ke mi ne restis fidela al Parizo, ĉar nur unu semajnon poste usurpis tiun lokon en mia koro alia belulino. Jes, vi divenis; estis Londono. Eble ĝi ne estas tiel bela kiel Parizo, sed Londono posedas etoson netroveblan alie. La katedralo de Sankta Paŭlo estas unu el tiuj antaŭe menciitaj kvar katedraloj; kvankam mi dediĉis tutan taĝon al la Brita Muzeo, mi ankoraŭ ne finrigardis unu fakon, la egiptan. Mi povus paroli pri la Turo de Londono, Vindsor-kastelo, Varwick-kastelo, Hamptonkort-palaco, pri Stratford, kie naskiĝis Shakespeare, kaj mia

ŝipveturo sur la Tamizo, sed mi ne sukcesus komuniki mian amon al Londono, kiu suferis pro rekorda sekeco antaŭ mia alveno, sed kiu mi forlasis en pluvego. Mi, kompreneble, ne povas akcepti laŭdon, ke mia vizito kaŭzis tion, mi dankas Dion, ke Hajdparko, la Parko de Sankta Jakobo, Kensingtona ĝardeno, kaj multaj aliaj Londonaj parkoj nun povas denove verdiĝi. —Ken Linton.

## NIA HISTORIO

### Nova Serio:

En antaŭaj numeroj ni donis la vivhistorion de kelkaj elstaraj pioniroj inter 1887 kaj 1907. Tiuj estis: John Booth, Tilly Aston, Dr. A. E. Barrington, George Collingridge, William Drummond, George Gordon, Maurice Hyde, Henry Lanyon, D-ro S. McBurney kaj F-ino A. E. Sinnotte.

Sed estis ankaŭ aliaj fidelaj servantoj de la movado, kiujn ni nepre ne devas forgesi. Ĉi tiu serio rakontos al vi pri ilia laboro.

### No. 1 kaj 2 Hermann RITZ (1858-1916) kaj D. G. REINITS

Ni prezentu kune tiujn 2 pionirojn, ĉar ili estis la plej fruaj Esperantistoj en Aŭstralio. Ili aliĝis al la Monda Ligo de Esperantistoj en 1889, en la sama jaro en kiu D-ro Zamenhof fondis ĝin. Ambaŭ havis germanajn nomojn, ambaŭ loĝis en Mt. Victoria, proksimume 100 mejlojn okcidente de Sidnejo kaj ambaŭ aliĝis al la Ligo je la sama tempo, kiel montras iliaj membro-numeroj 1397 kaj 1394, respektive.

Ĉar Ritz devenis el la germanlingva regiono de Svislando, ni povas same supozi pri Reinits. Eble ili estis parencoj, certe amikoj aŭ kunlaborantoj.

Ni ankoraŭ ne malkovris pli pri Reinits ol ke li abonis la Aŭstralian E-gazeton "La Suda Kruco", kiam S-ro Reg. Banham unue redaktis ĝin en 1929. Tial li vivis pli longe ol Hermann Ritz, kiu mortis en Hobarto en 1916.

Estis "The Australian Esperantist" de D-ro Barrington, kiu donis al ni la unuan informon pri la vivo de Hermann Ritz. En la novembro eldono (1908) de tiu gazeto ni eltrovis mallongan komenton, ke Hermann Ritz estas docento ĉe la Universitato de Hobarto pri modernaj lingvoj, sekve de tiu aludo ni povis eltrovi la jenajn informojn:

Hermann Ritz naskiĝis en St. Gallen, Svislando, en 1858, elmigris al Aŭstralio en 1876, je aĝo de 18, edziĝis en 1879;

abiturientiĝis por la Melburna Universitato en 1881 kaj komencis universitatan kurson en 1884. Li bakalaŭriĝis ('B.A.') en 1887 kaj magistriĝis ('M.A.') en 1899.

Li estis docento pri modernaj lingvoj ĉe la Universitato de Tasmanio, 1901-1916, ĝis sia morto. Laŭ nekrologo en "Hobart Mercury", 29/3/1916, li mortis pro koratako, 28/3/1916, rezulte de rapido laŭ monteta aliro al la Universitato, kie li devis prezenti prelegon. Lin postvivis vidvino, S-ino Bertha K. Ritz, sed neniu infano. S-ino Ritz donacis al la universitata biblioteko kolekton de liaj verkoj, monografioj, artikoloj, k.t.p.

Li vivis ĝis la sama aĝo de D-ro Zamenhof (58), kiu naskiĝis unu jaron post Ritz kaj mortis unu jaron post li. —I. T. Maddern.

## NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto  
Bun'iči Išizaki)

En mia unua artikolo mi raportis pri diversaj regionaj E-kongresoj en Japanujo. Hodiaŭ mi intencas raportiri pri aliaj okazintaĵoj en nia movado.

Plej interesa por aŭstralianoj sendube estas ekspozicio honore al aŭstralia E-istino. Antaŭ preskaŭ 3 jaroj F-ino Edith Gibson el Launceston studis en la japana urbo Ikeda, Honore al ŝi okazis inter la 6-a kaj 12-a de majo 1976 ekspozicio en la centra halo de la urbdomo de Ikeda. "Kiel vi fartas F-ino Edith Gibson, post mil taĝoj de via foriro", estis la devizo de la ekspozicio, kies enhavo estis sufiĉe bona kun fotoj kaj diversaj sendaĵoj. Detalaj klarigoj estis en la japana kaj Esperanto-lingvoj. Multaj urbanoj vizitis la ekspozicion kaj la gravaj tag-jurnaloj "Asahi", "Jomiuri" kaj "Sankei" detale raportis pri ĝi. "Rondo Harmonia" estas asocio de studentaj kaj junularaj grupoj en Japanujo. La kvara printempa "universitato" de tiu organizo okazis en la junulara nacia domo de Okajama (6-8-a de marto). La partoprenantoj loĝis, studis kaj debatis kune. La ĉefa gasto estis S-ro Manfred Sona el Germanujo, kiu prelegis por la 90 partoprenantoj.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj de U.E.A., vizitis Japanujon kun sia edzino Akiko Nagata kaj ili restadis dum 46 taĝoj en nia lando. Ili vizitis Japanujon de la nordo ĝis la sudo. Unue ili salutis la gepatrojn de S-ino Woessink en Sapporo, ĉefurbo de Hokkaido, poste vizitis Nagoja, Kobe,

Osaka, Kioto, Kumamoto Nagasaki, Fukuoka kaj aliajn urbojn, ĉie bonvenigitaj de gasamideanoj. La 12-an de junio ili ekflugis de Tokio al Koreujo kaj poste hejmen al Nederlando.

## NOVAĴOJ EL NOV-ZELANDO

La 42-a Kongreso okazos en Auckland de la 4-a ĝis 8-a de januaro 1977. Ĝi okazos en Grarton Hall, kie ĉiuj kongresanoj loĝos kaj manĝos. Eksterlandaj gastoj NE pagas kotizon. Ĝis nun jam aliĝis ses aŭstralianoj. S-ro R. Prebble, Parlamentano, malfermos la kongreson. Petu pluajn detalojn de S-ino A. G. Wood, 24 Stewart Rd., Mt. Albert, Auckland 3.

La prezidanto de la E-Klubo de Wellington, "Kviz-Reĝo" Ralph Dearnley, rompis kruron frue en aŭgusto kaj devis eniri hospitalon. Nova grupo, la "Esperanto Luncheon Club" kunvenas ĉiun jaŭdon tagmeze en loka restoracio.

La Esperanto-Societo de Christchurch, bonvenigis je 31/8 S-ron Jack Hawks el Perth. S-ano J. Hawks revenis de mondvojaĝo kaj dum promeno tra Christchurch ekvidis en fenestro de granda butikio informon pri la kunvenoj de la loka E-Societo. S-ro Hawks rakontis pri spertoj dum sia mondvojaĝo kaj gratulis la societon pro la regulo paroli nur en Esperanto dum la grup-vespero.

En Auckland okazis, 11-an de septembro, la ĉiujara Regiona Renkontiĝo. La renkontiĝo okazis en la societa kunvenejo kaj konsistis el diskutoj, kantado kaj paroladoj. Je la 5-a ptn ĉiuj iris al restoracio kaj daŭrigis la diskutadon. Vespere, en la hejmo de S-ino Joan Siddall, okazis lumbildparolado de S-ino Rita Aagaard, kiu parolis pri sia mondvojaĝo. La renkontiĝon oni daŭrigis dimanĉe, 12/9, en la domo de Ges-roj F. Wood. Entute tre sukcesplena renkontiĝo, pro la malavara kunlaboro de ĉiu ĉeestanto.

## Literumi

Kvankam mi estis enmigrinto el nebrita lando, tamen ofte okazis, ke aŭstraliaj kolegoj en mia oficejo petis mian konsilon pri literumado de kelkaj vortoj. Fine mi demandis ian tian kolonon: "Kial vi ne aĉetas vortaron?" "Kion mi povas fari por vortaro?" estis la tuja respondo, "se mi ne scias kiel literumi la vortojn, mi ne povas trovi ilin; kaj se mi povas literumi ilin, mi ne bezonas vortaron . . ."

P. E. Schwerin.

**BURĜONOJ**

de Norma Davis.

Belegas ja burĝonoj. Mi ekvidas  
Ke verde, puŝe ili nun sin gvidas  
Laŭ branĉo ĉe fenestro. Pala jado  
Tenere ĉiun tegas. Plenkaskado  
Debutos baldaŭ kiam kremaj floroj  
Parados laŭ la sojlo, perltrezoroj.  
Kuraĝas ja burĝonoj. Jen ulekso  
Forspitas froston per brulora tekso.  
Falante dise, jen berilkesteto  
La belon montras de la violeto.  
Antaŭ okuloj miaj, tra nebulo  
Eksaltas en brilflaman kalendulo,  
Ne timigite de ventfaronoj.  
L'animo humiligas pro burĝonoj.  
Tradukita de Audrey Bruton.

**ZAMENHOF—FESTOJ**

**PERTH:** La Festo okazos ĉe Harper Hall, Hay Street East, merkredon, la 15-an de decembro.

**MELBOURNE:** La Melburna E-Societo kaj la grupoj de Malvern kaj Oakleigh kune festos je sabato, 11-a de decembro en la halo de la Skoltinoj en Russell Street. Membroj de la E-Societo de Morwell ankaŭ partoprenos la feston kaj ni esperas ke S-ino M. Wybenga prezentos filmon pri la Universala Kongreso, kiun ŝi partoprenis en Ateno.

**SYDNEY:** La festo okazos en la Esperanto-Domo en Redfern (143 Lawson St.), sabate, 11-a de dec. je la 8-a p.t.m.

**BRISBANE:** 11-an de decembro en St. Albans Hall, Wilston.

**ESPERANTO COURSES — 1977**  
**VACATION SCHOOL**  
**TOOWOOMBA**

Elementary, Intermediate and Advanced Classes. Enquiries to: Mr. W. Nicol, P.O. Box 100, Toowoomba, 4350. Write now and arrange your accommodation.

Mi ĵus legis la bonegan ĉefartikolon, kiu aperis en la jul-aŭg- numero de "A.E.", kaj tuj mia memoro revenis al la ĵus ĉeestita Universala Kongreso en Ateno, kie unu homo alparolis 1200 personojn reprezentantajn 43 diversajn lingvojn absolute sen nterpretistoj.

Se la tuta personaro de Unuiĝintaj Nacioj povus entrepreni unu solan unu-

jaran kurson en la internacia lingvo, ni povus doni al la Monda Saneca Organizo tiun monon, por kiu ĝi nun bedaŭrinde tiel vane apelas.

Povus esti, ke post plua cent aŭ pli da jaroj la mondo pli saĝe agos, kaj mi supozas, ke la mondo tiam diros: "Kial ni ne pensis pri tiu ideo antaŭ centoj da jaroj" tute ne konsciante, ke multaj personoj ne nur pensis pri la ideo, sed laŭte pledis al la mondo sekvi tiun konsilon. La mondo tute ne aŭdas tiun pledon, simple ĉar ĝi ne aŭskultas.

—K. Linton.

**KROKODILI:** Mi legis en la junia "A.E." klarigon pri la esprimo "Ne krokodilo", verkitan de S-ro K. G. Linton. Mi legis kaj akceptis tre malsaman klarigon en libro nomita "Pardonon", verkita de Ueyama Masao, presita en Kioto 1970.

Eksterlandano kiu planis vojaĝi al Japanio volis memori kelkajn japanajn vortojn por simpla saluto "konnitiva" (bonan tagon), "ohayo" (bonan matenon), "arigato" (dankon) k.t.p. Li trovis ke la du vortoj la japana "arigato" kaj la esperanta "aligato" estas ĝemele similaj. Mallonge li konfuzis aligaton kaj krokodilon. Kiam li salutis "krokodilo" li atendis ke japanoj mirigite ekkrios "Ha, ĉu vi povas paroli ankaŭ en la japana lingvo?"

Sed li trovis nur gapantajn okulojn. Kial, li ne povis kompreni.

Kial tia besto nun aperis, ankaŭ japanoj ne povis kompreni. Ili tro diskretaj ne aŭdacis demandi lin: "Kion signifas krokodilo en tia okazo?"

Tiel, la nova idiotismo gajnis sian lokon en la Esperanto-vortaro!

—Gwenda Sutton, Upper Hutt, N.Z.

**DATE TO REMEMBER:** Of course you know that December is the "Zamenhofa Festo" month, but did you also know that December 17th, 1878 was when the first group of people conversed in Zamenhof's "Lingvo Universala"—the forerunner of Esperanto?

**EX ARCHIVES:** The first Esperanto publication appeared in Russian in 1887 as: "Dr. Esperanto — Mejdunarodnyi Jazyk. Predislovie i polnij učebnik". Translation: "Dr. Hopeful — An International Language. Introduction and Complete Textbook". It was 40 pages long.

# NEWS - DIGEST

**SOCIETY FOR THE BLIND:** Harold Radar of the Austrian League of Blind Esperantists reports that the League was founded 14 years ago as a sub-group of the national Esperanto society.

The League has the task of spreading Esperanto among the sightless of Austria — teaching the international language directly as well as utilising tape-recordings and braille texts.

A taped magazine, "Heroldo de Aŭstrio" is distributed to League members and gets an international flavour by using excerpts from the Swiss Esperanto sound magazine "Amika Voĉo" and the Esperanto service of Radio Vienna.

**CONGRESS STATISTICS:** Summer time in Europe is always a busy time for Esperantists who have a wide choice of congresses to join. A few figures from some of these were—

- ★ 301 worker Esperantists from 21 countries met in Gothenburg, Sweden last July for the 49th Congress of SAT, the non-national international association.
- ★ The 61st Universal Congress finished a week later in Athens, Greece, with 1,100 Esperantists taking part.
- ★ 104 blind Esperantists from 16 countries took part in the 44th International Congress of Blind Esperantists in Stubenberg, Austria.
- ★ KELI's 28th International Congress had 74 participants from ten countries including a couple from Madagascar.

**BROADCASTS:** More statistics . . . official UEA figures show that 31 radio stations in ten countries transmitted 2,432 programmes in Esperanto last year, occupying 985 hours. Programmes about Esperanto were not included.

**ESPERANTO STARS:** In Chile, South America, there are five languages normally spoken at the so-called "Southern European Observatory". Last January—according to a belated report—this jumped to six when two astronomer-Esperantists, Dr. A. Heck of Belgium and Dr. H. Maitzen of Austria found themselves on duty there.

**AARHUS:** The Esperanto Centre of Aarhus, Denmark is now running classes in the international language from a shop in Søndre Alle.

**SELF STARTER:** Tarec Mawsily of Damascus saw an article about Esperanto in the well-known Encyclopaedia Britannica (check it out for yourself at the local library) and taught himself from the facts given. He then rustled up thirteen friends to found the Arab Syrian Esperanto Association last January. By July he was writing to the Esperanto Centre in Nurnberg, West Germany seeking help with textbooks and pen-friends. His address: 7 Mawsily & Dalaty Bldg., St. Al. Mal'ab, Mazra'ah Damascus, S.A.R.

**ROSY:** The Dutch horticulturists "Willense" have named one of their roses "Esperanto". Perhaps it is related to the famous "Peace" rose — rosarians are invited to put the record straight—ND.

**TRICORN:** Nideggen Village has been chosen as the site for this year's Three-Land Esperanto Get-together. The Get-together will be held on October 9th and 10th. Nideggen Village is situated close to the borders of Holland, Belgium and West Germany. Franz Jodozi of Hurtgenwald is the organiser.

**SPANISH KKK:** Not to worry! KKK is the Kataluna Kunordiga Komitato of the Spanish Esperanto Federation. Petro Nuez is the President.

**KOREA:** Following its re-activation in Seoul last year, the Korean Esperanto Association was admitted to affiliate membership with the Universal Esperanto Association at the recent world congress in Greece. East Germany's Central Esperanto "Working Circle" was accorded similar status.

**TOE TAPPER:** The Esperanto Section of Italy's Radio Roma are offering — at cost — a cassette featuring Esperanto versions of European favourites. We haven't heard it yet, but it had a good review. The cost is US\$3 or its equivalent plus post and packing.

**THANKS:** Credits for this issue to UEA, IEMW, and Pilo Press.

# The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Kasisto: S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 150 (230)

MELBOURNE

Okt.-Nov., 1976

## PINOKIO

Ĉi tiu rakonto pri petolema sed bonkora marioneco, kiu fariĝis reala vivanta knabo, jam vendiĝis po milionoj da ekzempleroj, de post kiam ĝi unue aperis en la jaro 1881. De post kiam ĝi eniris la publikan terenon en la jaro 1940, estis centoj da eldonoj en Italio sola, kaj pli ol mil en la cetera mondo. Hodiaŭ ĝi staras kiel unu el la infanaj klasikoj kun tradukoj en pli ol ducent lingvoj kaj dialektoj inkludante Esperanton.

Sed, malgraŭ la vasta influo de la libro, ĝia aŭtoro restas preskaŭ nekonata. Multaj personoj emas kunligi Pinokion kun Walter Disney; aliaj opinias, ke la rakonto naskiĝis el ia pratempa folkloro. Efektive Pinokio estis la cerba naskito de relative moderna firenza aŭtoro nomita Karlo Kolodi, negrava civila servanto kaj okaza verkisto de politikaj pamfletoj. Li pretendis, ke li komencis verki por infanoj, ĉar estis tute neeble plaĉi al plenaĝuloj.

Lia vera nomo estas Lorencini, sed en la jaro 1860, duonvoje tra sia kariero, li alprenis la nomon Kolodi—la nomon de la naskiĝvilaĝo de sia Patrino — kiel protekton kontraŭ eventuala akuzo pri ia polemika politika artikolo, kiun li verkis. Li estis amika sed ŝanĝhumora fraŭlo kun talento amuzi aliajn. En la jaro 1875 Paggi, eldonisto, komisiis Kolodin traduki francan libron de fabeloj. La libro estis granda sukceso, do aliaj komisiis sekvis. En la jaro 1881 petis lin verki humurajn artikolojn la Roma Ĵurnalo por Infanoj, semajna periodaĵo por infanoj. Ĉar mankis al li la mono, li baldaŭ plenigis plurajn foliojn per la unuaj du ĉapitroj de "La Rakonto Pri Marioneto". Enmetita noto

informis: "Mi sendas ĉi tiun infanecan sensencaĵon. Faru kion vi deziras pri ĝi, sed, se vi presos, pagu al mi tiel bone, ke mi deziru verki pluajn".

Povas esti, ke ili ne sufiĉe bone pagis, ĉar sekvantaj ĉapitroj tre neregule aperis, kvankam la eldonisto konstante piedis por ili, kaj malgraŭ la multaj protestoj de junaj legantoj. Kiam la rakonto estis nur trione komleta, li ŝajne tediĝis, ĉar li skribis "finis" post la lasta epizodo, sed post kvar monatoj, plenaj de pledoj kaj protestoj, la felietono reaparis kun nova titolo: "La Aventuroj de Pinokio".

Kolodi vendis la kopirajton al Paggi, la eldonisto, por tre malalta sumo, kaj la rakonto estis eldonita kiel libro en la jaro 1883. Tamen la libro ne bone vendiĝis, ĉar la tiamaj gepatroj maltrankviliĝis pri aŭtoro, kiu kuraĝigis en siaj legantoj senton de petolemo.

Sed la libro rifuzis malaperi, ĉar tuta generacio de itaj geknaboj tenis Pinokion viva en speco de kaŝmovado. Baldaŭ fenomeno leviĝo al populareco invitis seriozan kritikan intereson.

Multaj aktualaj kleruloj opiniis, ke Pinokio estas vera rakonto pri eventoj en la vivo de la aŭtoro. Ekzemple, la estro de la marioneta prezentado, kiun Pinokio vizitas, portretas konatan tiaman toskananon, la ĉefdukon Leopoldo la Dua.

La ĉapitro pri la malbonaj vulpo kaj kato kredeble baziĝas sur homo nomita Gatto, kio en la itala lingvo signifas kato, ĉar tiu homo estis kokidŝtelisto en la naskiĝa vilaĝo de la aŭtoro.

Ankaŭ la epizodo, en kiu la skilio (dogfish) glutas Pinokion, kiu en la ventro de la monstro renkontas maljunan

Gepeton kaj la tinuson (tuna), baziĝas sur sperto de Kolodi. La patro prunteprenis monon de riĉa firenzano, sed la interezo estis tiel alta, ke li dronis en siaj ŝuldoj. Kolodi devis do savi sian patron. Tion farante, li helpis amikon kiu fariĝis la modelo por la tinuso, kiu helpis Pinokion kaj Gepeton eskapi el la ventro de la skilio kaj naĝi al la marbordo.

En la jaro 1952 la Nacia Karlo Kolodi-Fondajo kondukis kampanjon kaj sukcesis kolekti sufiĉe grandan sumon por establi parkon apud la vilaĝo de Kolodi. La parko, kiu malfermiĝis en la jaro 1956, entenas gigantan statuaron de Pinokio, la feino, kaj birdo, kaj ĝi situas sur razeno, kiu estas ĉirkaŭita per magia kvadrato kun mozaikoj prezentantaj la epizodojn el la libro, ankaŭ per ludejo por infanoj, kaj konstanta ekspozicio de italaj kaj alilandaj eldonoj de "Pinokio", kiu estas ankoraŭ furora libro. Pinokiaj pupoj estas konstantaj membroj de familioj en la tuta mondo.

Italaj ĝepatroj avertas siajn infanojn, ke azenaj oreloj elkreskos el iliaj kapoj, se ili ne lernas siajn lecionojn. Ili ankaŭ mezuras la nazojn de siaj infanoj por ekcii, ĉu ili diras la veron.

Pinokio nun estas ne nur la ĉefrolulo en rakonto, sed vere vivanta persono, kies marioneta ekzistado prezentas la suferadon, kiun povas kaŭzi malbonaj kondutoj, kaj kies transformiĝo en homan estaĵon demonstras la rekompencojn por boneco. Aŭ, kiel la lastaj du linioj de la klasikaĵo de Karlo Kolodi diras: "Kiel ridinda mi estis, kiam mi estis marioneto, kaj kiel ĝoja mi estas, ke mi fariĝis reala vivanta knabo".

—El la angla tradukis Ken G. Linton.

### Gentileco.

Mark Twain ofte amare plendis pri homoj, kiuj rakontante ion persiste interrompas sin mem por demandi, ĉu oni eble jam konas la rakonton. Lutage tio okazis denove, kiam Mark Twain renkontis Henry Irving. Tiu fama aktoro demandis lin, ĉu li jam aŭdis certan historion. Twain gentile diris: "Ne". Irving daŭrigis kaj poste demandis denove. Sama respondo. Kaj veninte preskaŭ al la klimakso, Irving denove demandis, ĉu li iam aŭdis ĝin. Trankvile Twain diris: "Mi povas mensogi unufoje mi povas mensogi dufoje por esti gentila, sed jen la fino. Mi ne povas mensogi trifoje: mi ne nur aŭdis tiun historion antaŭe, sed mi mem inventis ĝin . . ."

—P.E.S.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

• **BRISBANE.** Ĉe la klubĉambro, komencantoj ankoraŭ ĉeestas jaŭde, kaj la membroj lunde, 18-19-an de septembro, membroj pasigis la semajna-finon ĉe Monto Tamburino kaj verkis skeĉojn, ktp. Nia Societo gastigis la semajna-finan konferencon de la Esperanto-Federacio de Kvinslando ĉe Ipswich la 9-10-an de oktobro, kiu estis tre sukcesa.

La 6-an de novembro, Klubanoj stariĝos budon pri Esperanto je la Internacia Taĝo de la Y.W.C.A. Monda Semajno de Preĝo. La 15-20-an de novembro ankaŭ estos budo ĉe Sato-kupekspozicio ĉe Civita Halo en la urbcentro, kie membroj deĵoros.

La ĉiujara kunveno ĝenerala okazos lundon la 29-an de novembro ĉe la klubĉambro. La Zamenhofs Festo okazos la 11-an de decembro ĉe la anglikana preĝejo halo, Wilston, kiel lastjare.

• **PERTH:** En la fiughavono de Perth la Esperanto-Ligo instalas reklam-ŝildon, kiu informas pasaĝerojn pri loko kaj taĝo de kunvenoj. Imitinda ekzemplo por aliaj urboj.

S-ro R. Britton alparolis grupon de katolikaj virinoj.

• **MELBOURNE:** Je la 27-a de septembro okazis nia jara merkat-vespero "Amerika Teo". Ĉeestis 26 (lastjare 23). Okazis vendado de multspecaj varoj, du loterioj kaj vespermanĝo. Fina rezulto estis \$54.60 (lastjare \$103.56). Parto de la profito estos uzita por tutaŭstralia eseo-konkurso de la Pyke Memoriga Fonduso.

Je 11/10 S-ino F. Koppel daŭrigis sian prelegon pri la Nilo kaj la Aswan Digo. Nia prezidanto, S-ro S. Kanaĉki revenis de vojaĝo al sia hejmlando Jugoslavio kaj rakontis pri kontaktoj kun Esperantistoj en Jugoslavio.

A.E.A. Prezidanto Prof. R. Robertson kaj edzino estis niaj bonvenaj gastoj okaze de la Amuzvespero de la 25-a de oktobro. S-ro Ken Linton, kiu ĵus revenis de la Universala Kongreso, per diapozitivaj kaj komentario quidus la multnombrojan ĉeestantaron ĉirkaŭ Ateno.

• **MANLY:** Oficisto de la Departamento pri urba planado petis informon de S-ino Betty Cleminson, nia sekretariino, ĉar li estis invitita paroli pri Esperanto al

studentoj de la Ryde Agrikultura Kolegio. Li poste raportis, ke pluraj studentoj tre interesigis pri la temo.

S-ro Les Scott, 1/11, faris paroladon ĉe la Rotaria Klubo de Manly pri la praktika valoro de Esperanto. La Aŭstralia-Cina Amikeca Societo kontaktis Edna Giles kaj petis al ŝi skribi artikolon pri sia renkontiĝo kun ĉinaj esperantistoj, kiujn ŝi renkontis en Pekino. Esperanto sendube impresas la anojn de tiu societo en Aŭstralio.

Betty Cleminson, kiu ĵus revenis de la Universala Kongreso en Ateno parolis (12/11) pri siaj eksterlandaj travivaĵoj. Ciumarde okazas legado kaj diskutado pri literaturo en nia klubo.

—Edna Giles

● **SYDNEY:** 18/10 Ni diskutis la transport sistemon de Sidnejo, kaj kiel ni sangus, se eble: Ĉu ni bezonas la trajnojn de Rusujo, kiuj en la grandaj urboj veturas rapide kaj akurate, kaj funkcias el stacidomoj kiuj estas artgalerioj? Aŭ ekzemple sistemon, kiu permesas la aĉetadon de unu bileto eĉ se oni devos iri per du veturiloj por atingi la celon? Aŭ pli larĝajn stratojn por niaj privataj aŭtomobiloj.

25/10: Debato: "Teknologio plialtigas la vivkvaliton". Tom Elliott, parolante jese, priskribis la evoluon de la homo danke al la elkovo de fajro. David Gould, parolante nee, i.a., menciis ke antaŭ 15 jaroj, en nur 4 taĝoj, liaj leteroj alvenis al Anglujo; nun estas 6 taĝoj —ĉu progreso? Volo Gueltling diris, ke kun lavmaŝinoj virinoj havas facilan tempon—nur ĵeti ĉion en la maŝinon, premi butonon kaj atendi. Margaret Chaldecott, respondis, ke la diversaj fabrikoj devigas, ke virinoj zorge elektu la metodon. Al tio Volo interjeckciis, ke teknologio pensigas la virinan carbon, kaj ĉu tio ne estas progreso? La jesuloj venkis.

1/11: Frank Dunn parolis pri soldatoj kaj ties diversopa kuraĝo.

8/11: Ni fastis la 40-an edzfeston de Wre kaj May Chandler. Telegramo gratulis ilin, i.a., esperantistoj el Melbourne, Kanbero kaj Sidnejo. Wre renkontis May en la Sidneja E-Societo, dum pikniko. Ili esperis, ke D-ro Fred Williams estu la pastro de ilia geedziĝo, sed li (misiisto) rajtis agi kiel pastro nur eksterlande. Sed je tiu dato, li estis for de Sidnejo. Post geedziĝo en registrejo, sekvis soleno kondukita esperantlinve de Ted Pryke.

Ilia unua hejmo estis ruldomo, en kiu ili veturis dum kvar jaroj. Kvankam May ne venas al multaj kunvenoj, ŝi uzas la lingvon telefone por la Esper-

anto-Infoservo, kaj dum sia vizito al Rusujo frue en la jaro. Por ili la plej grava eco estas toleremo. Ĉe la sama kunveno troviĝis kvar aliaj, kiuj estis aktivaj antaŭ 40 jaroj: Eve kaj John Matasin, Luis rekona kaj Tom Perry.

—Margaret Chaldecott

## EL LA FEDERACIOJ:

### Tombo-stono starigita por D-ro A. Barrington

Dank al la iniciato de S-ro Ivan Maddern, la sumo de pli ol \$500 estis kolektita (inkluzive \$50 de A.E.A.), por starigi Tombo--Stonon kun tabuleto memore al D-ro Arthur Barrington, kiu eldonis la unuan aŭstralian Esperanto-gazeton en Benalla en 1908-1909.

La inaŭguro je dimanĉo, 12-a de septembro 1976, estis la instigo por unu el la plej elstaraj ekskursoj de la Esperanto-Federacio de Viktorio. 44 esperantistoj kaj amikoj el Melbourne, Morwell, Seymour kaj Shepparton konverĝis al Benalla, inkluzive grupon de 31 Melburnanoj, kiuj alvenis per trajno.

La vizitantoj kaj la membroj de la Historia Societo de Benalla estis akceptitaj de la urbestro de Benalla, Konsilanto E. A. Staughair, J.P., kaj aliaj membroj de la konsilantaro. Al la bonveniga parolado de la urbestro, S-ro Arnold Baldwin, Prezidanto de la E-Federacio de Viktorio, respondis en la nomo de la vizitantoj S-ro Herbert Koppel, nome de la Aŭstralia E-Asocio, transdonis al la urbestro kelkajn E-librojn, kiel donacon por la urba biblioteko. Sekvis luksa posttagmeza teo antaŭ ol ĉiuj ĉeestantoj veturis al la tombejo. Post malferma parolado de la urbestro, S-ro I. Maddern prezentis la vivhistorion de D-ro A. Barrington kaj legis el la Biblio de D-ro Barrington, nun la posedajo de F-ino Ruby Ledger, 83, unu el la unuaj Esperanto-lernantoj de D-ro Barrington. F-ino Ledger plenumis la taskon senvualigi la Tombo-Stonon, kies tabuleto surhavas la tekston:

Dr. Arthur E. Barrington

Born Dublin, 1862.

Died Benalla 19/8/1919

A Great Australian Esperanto Pioneer.  
Established the Benalla Esperanto Club,  
1908.

Published the first Australian Esperanto  
Journal, 1908-1909.

Erected by the Australian Esperanto  
Association, Benalla City Council and  
Benalla & District Historical Society.

Unveiled by one of his first pupils,  
Miss Ruby Ledger, 12/9/1976.

Kanoniko E. Payne-Croston, Prezidanto de la Historia Societo de Benalla, konkludis la ceremonion per dediĉa preĝo.

Antaŭ ol forlasi Benallan ĉiuj vizitantoj estis gastoj ĉe luksa bufeda manĝo en la bela Civita Centro, aranĝita de la Historia Societo de Benalla. Konklude, Brigadestrino Isobel Gale, nome de la vizitantoj, dankis al la gastigantoj pro ties amika akcepto.

La Konsilantaro de Benalla decidis nomi du novajn stratojn "Barrington Street" kaj "Esperanto Street".

## Gramatike-

Sub tiu titolo s-ro Ken G. Linton aperigis artikolon en la Julio/Aŭgusta numero de A. E., kiun mi ne povas lasi nerespondita. Li skribis: "Du bonegaj Esperantaj vortoj estas KNALI kaj KNARI." Kaj: "La vorto HALO estis ŝajne malprave uzita, ĉar ĝi pli similas la anglan vorton HALL ol la ĝustan vorton AŬLO." Ja s-ro Linton invitas nin serĉi tiujn vortojn en la vortaro, sed tion evidente li mem ne faris.

Laŭ la vortaro s-ro Linton certe pravas pri la vorto KNARI, ĝi estas oficiala vorto de Esperanto. Kontraŭe la vorto KNALI estas nur neologismo, kiu eĉ ne estas en la Plena Vortaro aŭ ĝia Suplemento. Ĝi nur aperas en la Plena Ilustrita Vortaro, sed klare markita kiel neologismo. La frazoj uzitaj de s-ro Linton do estus pli bonaj tiel: "La motoro de la aŭtomobilo forte krakis. La krako de la vipo timigis la hundon. La ruĝa baloneto subite krake eksplodis".

Same pri la vorto HALO s-ro Linton eraras. HALO estas oficiala vorto de la Fundamento kaj tute bone uzebla kaj uzenda, spite al tio, ke ĝi similas al la angla vorto HALL, dum la vorto AŬLO iam estis enkondukata kiel neologismo de Boirac. Oni ja povas diri "festhalo" aŭ "festsalono".

Mi ne scias, kial s-ro Linton rekomendas la uzon de tiuj neologismoj, kiuj jam estas reprezentitaj per aliaj vortoj en nia lingvo. Tiuj necesaj neologismoj nur estas balasto por nia lingvo, kiu malfaciligas ĝian lernadon. Kompreneble, laŭ la paragrafo 15 de la gramatiko oni rajtas enkonduki neologismon, se oni ne povas esprimi ĝin per la jam ekzistantaj vortoj. Zamenhof mem enkondukis multajn neologismojn kaj ankaŭ mi uzas

ilin, tamen ne tiujn, kiuj anstataŭas kaj elpuŝas la vortojn de la Universala Vortaro aŭ ĝiaj Oficialaj Aldonoj. Zamenhof diras: "Ĉiu vorto, kiu troviĝas en la Universala Vortaro estas leĝdona por ĉiuj Esperantistoj, kaj neniu en la mondo, nek la aŭtoro de Esperanto, nek iu alia Esperantisto, havas la rajton fari en tiuj vortoj ian ŝanĝon (se ekzemple anstataŭ "ŝipo" iu uzus la vorton "navo", ĉar la vorto "ŝipo" al li ne plaĉas — tio estus rekta peko kontraŭ la unueco de la lingvo kaj ĉiuj Esperantistoj tiam protestus)."

Mi deziras registri mian proteston! Volo Gueltling.

P.I.V. p. 82: AŬLO, Solenejo, festĉambrego en universitato.

p. 371: HALO: 1. Konstruaĵo, konsistanta el nura tegmento sur kolonoj, por ŝirmi bazon.

2. Granda, publika ĉambrego en kastelo, hotelo.

BUTLER p. 47: AŬLO: Aula, court.

p. 160: HALO: (building) hall.

1. great roofed space, covered market-place, usually supported by pillars.

2. great room.

J. C. WELLS: p. 52: AŬLO: great hall

p. 84: HALO: hall, covered market.

En la 19-a Generala Konferenco de Unesko (tiaj konferencoj okazas ĉiun 2-an jaron), kiu komenciĝis la 26-an de oktobro en Nairobi, la ĉefurbo de Kenjo, la reprezentanto de U.E.A. estis **D-ro R. G. Robbins**, kiu laboras ĉe la Universitato de Nairobi kaj estas dumviva membro de U.E.A. (D-ro R. G. Robbins estis Prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio en 1962/63).

**S-ro Ralph Harry**, aŭstralia ambasadoro al UNO (kiu estis A.E.A. Prezidanto en 1960/61) prezentis filmon pri Aŭstralio en kunveno de la Esperanto-Societo de Nov-Jorko.

La 60-a Brita Esperanto-Kongreso, kiu okazis en bela kaj gastama Chester, decidis, ke estontece oni uzu en la angla lingvo ne la vorton "Congress", sed la vorton "Conference", kvankam en Esperanto ĝi restos "Kongreso".

La 61-a Brita Kongreso (aŭ angle "The 61st British Esperanto Conference") okazos je Pasko, 8-a ĝis 11-a de aprilo 1977, en Hastings. Aŭstralianoj, kiuj



hazarde vizitos Britujon kaj deziros partopreni, anoncu sin al Ken Hadler, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, 1N34 3HH

"Neniam maltrafu la okazon ĉeesti Esperantan kunvenon. Se oni ne komprenas ĉion, ne gravas, la ĉeesto pensigas la ĉeestanton pri la lingvo. Se pli da personoj pretus ĉeesti kunvenojn, pli estus aranĝitaj.

Kiam vi aŭdas pri Esperanta kunveno, forgesu la televidon, la vizitanton, la malvarmumon, la veteron, la globludon kaj ĉiujn alian pretekstojn kaj ĉeestu! Ĉi tiu estas bona konsilo ankaŭ al malnovaj Esperantistoj."

F. E. Wood (Auckland), en "Nov-Zelanda Esperanto."

## NIA HISTORIO

Nova Serio: N-ro 3

GEORGE C. HODGSON

George Hodgson aliĝis al la Monda Esperanto-Ligo de D-ro Zamenhof en la jaro 1891, nur kvar jarojn post kiam la lingvo estis lanĉita, kaj li ricevis N-ron 3009.

Li partoprenis la fondkunvenon de la Melburna E-Klubo je 10/2/1905 en la hejmo de John Booth en Rathdowne Street, Carlton, kaj ĉe tiu kunveno li legis tradukojn de leteroj, kiujn li ricevis en Esperanto de transmaro.

Okaze de la elekto de Komitatoj li elektigis Vic-Prezidanto, dum John Booth fariĝis la Prezidanto.

Sed, post la unua jaro, nenio plu pri George Hodgson estas trovebla, kio pensigas nin ke li estis maljuna homo kaj eble mortis unu aŭ du jarojn post la fondiĝo de la klubo. Lia nomo ne plu aperas inter la funkciuloj de la klubo en postaj jaroj kaj ankaŭ ne en la listo de D-ro Zamenhof de la membroj de la Melbourne E-Klubo por la jaro 1907. Lia adreso, presita en la Adresaro de la "Monda Ligo" estis Barry Street, Northcote, Viktorio. — I. T. Maddern.

## D-ro EINHUVICI RAPORTAS PRI NEORDINARAJ VIZITOJ

Survoje al Sud-Ameriko mia edzino kaj mi kontaktis Esperantistojn en Sud-Afriko, ĉefe en Johanisburgo kaj Kaburbo. En ambaŭ urboj la movado ne estas tre aktiva, tamen multaj personoj interesiĝas pri Esperanto. Mia edzino estis intervjuita dufoje kaj aperis artikoloj en lokaj tagĵurnaloj.

En Johanisburgo oni aranĝis kunvenon en la hejmo de la prezidanto kaj ni ambaŭ raportis pri la movado en Aŭst-

ralio. Ĉiuj tre interesiĝis kaj gastigis nin tre afable. La plej aktiva persono tie estas S-ro Appel, origine Nederlandano.

En Kaburbo, kiam ni atendis la aviadilon en la flughaveno, mia edzino kontaktis per telefono ĵurnalistojn kaj parolis dum pli ol 45 minutoj. (La publiko en viclinio malbenis ŝin senrezulte).

La lando estas tre alloga kaj la indigenoj vivas pli bone ol oni pensas en Aŭstralio. Tamen la problemoj estas sufiĉe gravaj.

De Suda Afriko ni flugis al Brazilo por partopreni en la ĉefurbo Brasilia la 11-an Brazilan E-Seminarion, inter la 15-a kaj 18-a de julio. Ĝi fakte estis kongreso kaj estis tre sukcesa kaj fruktedona. La nivelo de la prelegoj kaj diskutoj estis sufiĉe alta, kaj la partopreno de multnombra junularo vigligis la etoson.

La prelegantoj — verkistoj, universitataj profesoroj, sciencistoj diversfakaj, studentoj, aktoroj, ĉiuj pritraktis diversajn problemojn tre serioze kaj tre klare. La pastro, kiu celebris la Di-Servon en perfekta Esperanto en la eksterordinara katedralo, enhavanta pli ol 4000 personojn, geedzigis paron el diversaj landoj, kies komuna lingvo estis nur Esperanto, en neforgesebla ceremonio. Kiam mi gratulis lin, li diris: "En tiun katedralon venas amasoj da personoj de diversaj sektoj, inkluzive ateistojn". Li promesis sendi al mi kopion de sia prelego.

Tre surprizis kaj mirigis min la fakto, ke en Brazilo miloj kaj miloj da personoj interesiĝas, studadas kaj parolas Esperanton. Mi serĉis la klarigon, kaj laŭ mia opinio ĝi estas la jena: 90% de la loĝantaro apartenas al la spiritisma movado kaj Esperantistoj konsistigas integran parton de la movado. Pro tio ankaŭ la registaro multe helpas finance kaj alimaniere. Dum la seminario pli ol 300 personoj venis el tre malproksimaj partoj de la vasta lando, vojaĝinte 2-3 tagojn por partopreni la seminarion, kaj dum la tuta tempo ili ricevis bonan loĝejon, manĝaĵojn (trifoje tage), aŭtobusojn por ekskurso, ĉion senpage!

La Gubernatoro, kiu akceptis nin — kiel alilandanojn — estis tre afable kaj tre interesiĝis pri Esperanto. Aŭstralio ĉi tie estas tre favorata, kaj oni fakte lacigis nin per troa atento kaj prizorgo. La estraro invitis nin al la ĉeftablo kaj ni alportis salutojn en la nomo de la Aŭstralia Esperantistaro. Ĉiuj bombardis nin poste per kisoj, ĉirkaŭbrakoj

kaj senĉese petis adresojn, aŭtografojn—kvazaŭ ni estus famaj futbalistoj aŭ boksistoj. Precipe mia edzino iĝis heroino.

Ili deklaris, ke ili aranĝos la U.E.A.—Kongreson en 1980 en Brasilia kaj postkongreson en Rio. Mi estas certa, ke ĝi estos vera triumfo, ĉar la malavara apogo — finance kaj alimaniere — de la registaro estos certa.

Post la seminario en Brasilia ni iris al "Bona Espero", kiu estas Esperantista kolonio 240 kilometrojn for de la ĉefurbo. La ŝoseo tien ne estas bona, sed la registaro promesis asfaltigi ĝin antaŭ la kongreso. La vivo tie estas nuntempe tre primitiva kaj la vivkondiĉoj tre malfacilaj. Sed ĝi estas sendube interesa kaj unika eksperimento en la mondo. La ĉefa celo estas edukado de infanoj en spirito de Zamenhof. La registaro helpas ĉar tiu regiono estas neevoluinta kaj la loĝantaro tre primitiva kaj malriĉa. La infanoj estas plejparte orfoj. "Bona Espero" oficiale ekzistas kiel lernejo. La areo okupas 1250 hektarojn kaj la klimato estas tre bona — meztropika. La grundo estas bona, kulturebla kaj ĉirkaŭita de bonegaj riveretoj. Pro tio ili sukcesis kultivi ĉiujn legomojn, fruktojn de ĉiuj specoj — ananasoj, oranĝoj, citronoj, melonoj k.t.p. Ili celas akiri memsufiĉon almenaŭ en la esencaj produktoj kiel maizo, rizo, terpomoj, sukerkanoj k.t.p.

Dum somero pluvegas kaj la komunikado suferas multe. Pro tio oni devas ordigi la vojojn, la pontojn, la tegmentojn kaj tio postulas laboristojn, kiuj mankas. Nun tempe estas nur unu lernejo en Alto Paraiso (18 km de "Bona Espero"), kie loĝas D-ro Carlos Lima Melo, tre dediĉita Esperantisto, kiu forlasis la komfortan vivon de Rio por plenumi ĉi tie veran mision. Ili esperas starigi agrikulturan gimnazon, sed bedaŭrinde ĝis nun ne sukcesis varbi instruistojn. Oni devas memori, ke antaŭ nur 12 jaroj estis nenio tie. Kaj kio estas kreita ĝis nun estas pro la persista laboro de Ges-roj Grattapaglia, D-ro Melo kaj 2-3 aliaj Esperantistoj. Ankoraŭ mankas elektra kurento, malgraŭ tio, ke ili jam posedas generatoron kaj belegan, utiligeblan akvofalon.

Ili zorgas multe pri bestbredado kaj nuntempe ili jam havas 43 ĉevalojn, 10 bovinojn kaj virbovojn. Entute ili volas organizi la vivon interne kiel harmonian kunvivadon inter Esperantistoj, kaj ekstere kiel socian helpadon al loka neevoluinta regiono. La personoj, la

ĉielo, la riveretoj, la montoj, la natura nutraĵo, la belegaj oranĝejoj, la vastaj ebenajvaloj, la ŝvebanta lingvo kreas veran etoson de "Interna Ideo" de Zamenhof. Laŭ mia opinio tiu eksperimento meritus intereson kaj helpon ĉiumaniere, ĉar ĝi estas preskaŭ la sola gaja lumpunkto por la Esperanta idealo en la malhela ĉielo de la nuntempa materiala mondo.

La lastan semajnon de nia ĉeesto en Brazilo ni pasigis en Rio, kie okazis kongreso de kuracistoj. La esperantista aktiveco de Brazilo estas koncentrita en la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio. Ĝi fondiĝis en 1957, havas propran sidejon en la centro de la urbo, kie troviĝas la sekretario, klasĉambro, librejo kaj kunveno. Impresis nin precipe la librovendejo kaj propra moderna presejo kaj ilia vegetara restoracio. Ili akiris eĉ "B'non Esperanto" por libertempo kaj ferioj de siaj membroj. Ĉiutage multaj Esperantistoj vizitas la sidejon, paroladas, diskutas, trinkas kafon kaj legas librojn kaj gazetojn. Estas vera kultura klubo. Ni vizitadis ĝin tre ofte, prelegis ĉe kunvenoj. La etoso estis agrabla kaj vere frateca. Ni akiris tie bonajn amikojn kaj forlasis kun bedaŭro la landon.

De Brazilo ni flugis al Los Angeles, kie ni renkontis Esperantistojn en la hejmo de advokato W. Glenny. En Honolulu ni havis interesan renkontiĝon kun Bunnie Chambers — radiomatoro, kaj li eĉ aranĝis ke ni parolu per radio kun alia amatoro el Tokio, kiu demandis min pri D-ro Caldera.

Mi devas rimarkigi ke ĉiuj renkontiĝoj kaj intervjuoj estis aranĝitaj nur de mia edzino, kiu senlace elserĉis Esperantistojn en loĝeblaj kaj neloĝeblaj lokoj. Entute estis tre interesa vojaĝo, sed iom laciga.

—T. Einihovici (Perth)

## 21st AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

January 2-8, 1978 — Launceston (Tasmania)

This congress will be held at the brand-new TASMANIAN COLLEGE OF ADVANCED EDUCATION in Newnham, a suburb of Launceston. It will again be a "Live-in Congress". Ever-rising costs make it impossible to give an exact tariff at this stage, but it is estimated that full board should be approximately \$15 per day. As only limited accommodation is available, Esperantists are advised to book as early as possible.

**Congress Fee before 1st July 1977: \$11, Pensioners, Students \$6.** After 1/7/77: \$13, Pensioners, Students \$7.50. Send your room reservations (**\$10 Deposit**) and Congress Fee to the **Congress Secretary: Mr. Mac Le Fevre, 22 Belle Vue Avenue, Launceston, 7250** and enclose a stamped, addressed envelope for your receipt. (When paying by cheque, please add 9 cents for bank charges).

#### First List of Congress Members

1. Mr. Herbert Koppel, Melbourne.
  2. Mrs. Fay Koppel, Melbourne.
  3. Mr. John Matasin, Sydney
  4. Mrs. Eve Matasin, Sydney.
  5. Mrs. Peggy Ross, Brisbane.
  6. Mr. Ray Ross, Brisbane.
  7. Mrs. Pat Le Fevre, Launceston.
  8. Master Chris Le Fevre, Launceston
  9. Mr. Mac Le Fevre, Launceston.
  10. Mrs. Jean Lehane, Toowoomba, Queensland.
  11. Mrs. Barbara Pennington, Launceston.
  12. Mr. Clarence Strochetter, Pvangana, Tasmania.
  13. Mr. Ken Linton, Melbourne.
  14. Mr. Volo Gueltling Sydney.
  15. Mrs. Lynn Carswell, Launceston.
- State Distribution: Tasmania, 6; Victoria, 3; N.S.W., 3; Queensland 3.

#### INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO AŬTOMOBILISTA:

In the past there have not been many Australians driving cars in Europe, but the practice is greatly on the increase. Solidarity is strength, and it is only by united action that we can get results. Join the I.E.K.A. and help to get better facilities for international travel by car. Contact K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, 3162.

## RECENZOJ

**Jarlibro de U.E.A. 1976:** 384 paĝoj; la plej utila kaj necesa konsultlibro, fonto de informo ĉiaspeca rilate la Universalan E-Asocion, ties delegitaron, kiel ankaŭ multflankajn fakorganizojn. U.E.A. petas ĉies helpon aktualigi la adresmaterialon de la Jarlibro. Jen, do, kelkaj korektoj pri nia lando:

**MELBOURNE:** La adreso de Del. A. J. Baldwin estas 61 Eley Road, Box Hill South, 3128.

**MORWELL:** La adreso de I. T. Madern, jam kelkajn jarojn, estas 12 Avondale Road, Morwell.

**ORRORO:** La Delegito, S-ro George Clarke, jam antaŭ pli ol jaro transloĝiĝis al 34 Hamblynn Road, Elizabeth Downs, S.A.

**PORT LINCOLN:** S. H. Grant, ĉe BCA Hostel, 20 Queens Street, Port Lincoln

**REDCILFFE:** S-ino Pritchard mortis en novembro 1975.

Se vi deziras fariĝi membro de U.E.A., kontaktu la Ĉef-Delegiton S-ro K. G. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, 3162.

#### Scienca laboro

Botanikisto iam trovis ĉe-voje belan planton. Li dispartigis ĝin kaj ekzamenis ĉiun parton sub la mikroskopo. Post kiam li finis, li povis detale klarigi la koloron de la floro, ĝian klasifikadon, la nombrojn de ĝiaj stamenoj kaj pistiloj kaj petaloj kaj brakteoj . . . sed la vivo kaj la belco kaj la bonodoro estis malaperintaj.

(Noto: "Brakteoj" = modifitaj folioj proksime al kelkaj floroj; ekz. la larĝaj ruĝaj brakteoj de la "Waratah", kiujn multaj homoj prenas por petaloj.)

P. E. Schwerin.

La fama bibliotekisto, Djuval, estis konata pro sia modesteco. Foje iu profanulo demandis lin pri io, kaj la scienculo respondis:

"Pri tiu afero mi nenion scias".

"Tamen, oni pagas al vi por scii," ĉikanis la malklerulo.

"oni pagas al mi", rediris la bibliotekisto, "por tio, kion mi scias. Se oni pagas al mi por tio, kion mi ne scias, tiam ĉiuj trezoroj de nia lando ne sufiĉus".

A: Ĉu vi estas la fiulo, kiu diris, ke mi estas idioto.

B: Vi sendube eraras, ĉar mi neniam juĝas viron laŭ lia ekstera aspekto.

**MADAGASCAR APPROVAL:** Esperanto may now be officially taught as an elective subject in Madagascan secondary schools. As a result, the Malagasy Esperanto Institute is seeking to interest teachers in taking the subject. More facts from: "Esperanto", P.O. Box 167J Tananarive.

**HERCULES:** Fifty four people, mainly high school students, founded the Hercules Esperanto Society in Bitola, Macedonia last March.

# NEWS - DIGEST

**ITALIAN CONGRESS:** The 47th Italian Esperanto Congress was held in Massa, Tuscany during September. It was arranged by the Italian Esperanto Federation for its 1,644 members in a part of Italy mild enough to grow oranges. The Federation is comprised of 46 Esperanto Groups — situated mainly in Trent, Milan and Bologna.

A special post office was set up for two days and cancelled mail with a special congress franking. The Massa Town Council celebrated the Congress by issuing a commemorative bronze medal. The medal depicted the unveiling of a bust of Esperanto's founder Dr. L. L. Zamenhof at the Malaspina Castle by Italian Deputy Minister for Agriculture Eldoardo Speranza (whose name, coincidentally, is equivalent to "Espero"). Mass in Esperanto was said in the Massa Cathedral by Monsignor Wladislaw Miziolek, assistant bishop of Warsaw, who was also participating in the Congress.

During the Congress business sessions, the Italian Esperantists decided to abandon the idea of getting laws favourable to Esperanto passed, and instead to concentrate on making existing legislation work for them.

**TELL THEM!** Regulation 7732 of Argentina's Santa Fe province has proclaimed April 14th as: The Day of the International Language and requires every school teacher in the province to spend at least ten minutes on that day telling their students about Esperanto.

**SYMBOLIC:** Danish State Railways have decided to continue to publish their timetables with a page in Esperanto explaining the meaning of the symbols used.

**WINNING WIFE:** This year's award of the "Klara Silbernig Medal" for the most helpful wife for an Esperantist was won by the wife of the President of the Spanish Esperanto Federation, Mrs. Marcelina Paloma de Figuerola.

**CATALYST:** Sydney artist Leonid Denysenko redrew his "God is love" icon following the comment that Esperanto was not included. The original

icon was drawn three years ago and used the proposition "God is love" in 48 separate languages to form the outline. Lenysenko recently redrew the icon using Esperanto and seventy eight other languages to symbolise the universality of God's love.

**ACTION STATION:** Appropriately enough, members of the Munich Esperantist Railwaymen's Group and the Munich Esperanto Club put on a public display during October at the Holzkirchner Railway Station.

**PHILLY PHONE IN:** Members of the Esperanto Club of Philadelphia, U.S.A. have organised an Esperanto telephone information service which also provides tourist information. The number is (215) 722 2878.

**MATHS MAG:** A new function for the International Association of Esperantist Mathematicians is publishing "Matematiko Translimen". If you want to multiply their numbers and be added to the mailing list, then contact Editorial-Admin, c/- Francois Lo Jacomo, 14 Rue de la Pompe F-75076 Paris.

**HUNGARY CROWD:** Two hundred young Esperantists from ten countries converged on Eger, Hungary last April. Highlight of the get-together was the official opening of an "Esperanto Walkway".

**POLISH ESPERANTISTS:** The Polish Esperanto Association has about six thousand paid-up members, but estimates that around 70,000 (yes, that's right) Poles have some knowledge of the international language. Incidentally on May 9th the Esperanto Section of Radio Poland celebrated its 10,000th transmission.

**FRENCH STARS:** During May the Paris Esperantists' Theatre drew crowds to its performances in the international language in Antwerp and Liege of plays by Jean Cocteau and Florian.

**TAIWAN COURSE:** Father John B. Kao of the Catholic University of Fuchen is currently teaching Esperanto to more than 120 students.

**HAMBURG HOUSE:** An Esperanto House for Hamburg, West Germany was opened in the Langefelde district on October 1st.

**CREDITS:** This time to Pilo Press, A.B. IEMW.

# The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Kasisto: S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 151 (231)

MELBOURNE

Decembro, 1976

## INFLATION OF INTERPRETERS AT THE EUROPEAN COMMUNITY

In 1958 the officers of the European Community had 11 interpreters; in 1976 they had 2740. Every third officer in this organization is occupied with producing and distributing translations into the six official languages.

In Brussels four times more interpreters are working than at the United Nations in New York, although there delegates speak more than 100 different languages. This difference is explained by the claim that in Brussels more is discussed than in New York. It won't be long before more than half the employees will be interpreters or translators.

This state of affairs cannot change, because each country insists on equality of its language and the French claim for the use of French in order to eliminate difficulties is obstinately refused by the British, as well as by the Danes. That no reform is contemplated is proved by the decision of the Council and of the Ministers of Education represented in the Council. In the official Review of the European Community we can read that the instruction of languages should be advanced by the usual methods, interchanging teachers, students etc.

The language of the Irish, the Gaelic, cannot be included amongst the languages of the Community, because no Gaelic-Italian or Gaelic-Danish interpreters can be found. The languages, which will soon be added, Greek, Turkish, Spanish, will greatly increase the difficulties. The question arises whether the foreseeable chaos in language relations will inspire those responsible to a true reform and not merely to substitute one evil by another.

—(Laŭ "Interlingvistika Informa Servo")

### KIAL, KIAM, KIE KAJ KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Antaŭ 5000 jaroj la sumeranoj inventis sistemon de skribado kaj antaŭ nur 38 jaroj mi eklernis alian sistemon de skribado, sed bedaŭrinde la kvaliton de la arkaika skribaĵo de Sumero fote ne superas la moderna. Do, se vi pli

bone komprenas la sumeran lingvon ol Esperanton, eble vi devus ĉi tie haltigi la legadon, ĉar mia artikoleto ne fariĝos pli interesa ol io skribita en la sumera per bastonetoj premitaj en mola argilo, kiu poste estis bakita. Mi devis lerni la skribarton per kraĵono. Ankoraŭ hodiaŭ mi memoras kiel amuze estis,

kiam mi devis lerni skribi per plumo kaj inko. La instruisto klarigis ke por ke la inko povu resti sur la plumo, estas necese, ke ni leku la plumon antaŭ ol ni trempos ĝin en la inko. Do mi lekis la plumon, trempis kaj skribis, lekis, trempis kaj skribis tutan lecionon ĝis mia vizago estis malhele blua kiel la ĉielo en mezvintira nokto. Sed tamen mia skribajo aspektis malpli bela ol la kojnoskribajo, kiun siatempe faris la sumeranoj.

Poste estis inventita la papero kaj eĉ pli poste la globkrajono. Iam inter la papero kaj la globkrajono naskiĝis mi. Jes, mi naskiĝis, mi ne estas inventita. Sed kiel jam menciite, mi devis antaŭ 38 jaroj lerni la arton skribi kaj eĉ hodiaŭ mi provas skribi — aŭ pli bone tajpi — ĉifoje mi provas verki artikoloeton pri "Kiel mi fariĝis esperantisto". Se mia iama instruisto nur povus vidi kaj legi ĉi tiun artikolon! Estus tre amuze, ĉu ne? Li ja komprenus eĉ ne unu vorton, ĉar li ne estas esperantisto.

Car mi frekventis lernejon dum la germana okupacio de Danujo, mi estis devigita lerni la germanan lingvon. Nu, ĉio, kion mi lernis en la lernejo estis ja deviga kaj tio estas unu el la kaŭzoj kial mi lernis ĉion tre malbone. Tio ankaŭ devas klarigi kial mi ne ŝatis la lernejon. Sed tamen la ekono de la germana lingvo, kiun mi lernis, vekis en mi emon kontaktiĝi kun anoj de aliaj nacioj. Mi ŝatis paroli germane, sed trovis baldaŭ, ke mi tion faras malbone; pli bone estis silenti. Sed, kiel diris Zamenhof: "Kie estas sufero, estas ankaŭ espero". Mi aŭdis pri Esperanto kaj decidis lerni ĝin. Mi eklernis tuj kiam mi renkontiĝis kun la lingvo.

Mi komencis en 1950 la studadon de la universala lingvo kaj eĉ hodiaŭ lernas, kaj mi ankoraŭ trovas multe da plezuro kaj amuzo uzante la lingvon kaj certe ne volus esti sen ĝi. Cetero mi havas multajn amikojn preskaŭ ĉie en la mondo.

Nur hazarde, en la dua mondmilito mi aŭdis pri "Esperanto, la dua lingvo por ĉiu". Mi serioze ekinteresiĝis kaj faris multajn demandojn pri la lingvo. Mia patro klarigis al mi ke li persone scias nenion pri la lingvo, li nur hazarde aŭdis pri ĝi kaj ĝia supozebla facileco en unu el la tramoj, kiuj siatempe traveturis Kopenhagon. Do ĉe li mi povis ricevi nenian informon pri Esperanto. Mi devis atendi ĝis mi aliĝis al la "Unuiĝo de Danaj Migrantuloj". Ĉiunokte en ĝia membrogazeto troviĝis Esperanto-leciono. Mi studis fervore

kaj tradukis fidele la tekstojn en ĝi: La tradukojn mi sendis al nenui, mi simple atendadis unu monaton por kompari mian tradukon kun tiu, kiu tiam aperis en la gazeto. Mi ĝojis fari tion, sed tamen estis tro longa tempo atendi la ĝustan tradukon, ĉu ne? Krom tio, la gazeto estis ĉiam tro plena de preseraroj kaj mi neniam povus esti certa, ĉu la literumado estas korekta.

Iun tagon en librovendejo mi vidis Esperanto-lernolibron. Tuj mi aĉetis ĝin kaj eklernis. Mi memoras, ke mi lernis kvar lecionojn kaj post tiam ĉio estis nekomprenebla. Estis necesege, ke iu klarigu al mi la gramatikon de tiu nova lingvo. En gazetanoncaro mi trovis anonceton de sinjorino, kiu instruas Esperanton. Mi tuj telefonis al ŝi kaj ekde tiam mi vere lernis. Mi kredas, ke mi studis duonan jaron antaŭ ol mi kuraĝis aliĝi al Esperanto-klubo. Kaj en tiu klubo iun vesperon mi devis prelegi pri la jena temo, nun bone konata de vi: "Kiel mi fariĝis esperantisto".

Nervoze mi do ekbalutis: "Sinjorino, Sinjoroj, antaŭ 5000 jaroj la sumeranoj inventis sistemon de skribado kaj antaŭ nur 13 jaroj mi eklernis alian sistemon de skribado ktp. ktp."

—Robert Felby.

## LA URB-MUZIKISTOJ DE BREMEN (FABELO LAŬ GRIMM.)

Iu viro havis azenon, kiu jam de multaj jaroj persiste portis la pezajn sakojn al la muelejo; sed ĝiaj fortoj nun preskaŭ finiĝis tiel, ke ĝi fariĝis pli kaj pli ne-taŭga por la laboro. Tiam la mastro cerbumis, kiel li povus liberiĝi de la azeno, sed tiu sentis, ke neniu facila vento blovas kaj forkuris survoje al Bremen; ĝi opiniis, ke tie ĝi ja povus estiĝi urbmuзикisto.

Kiam ĝi jam estis marŝanta ioman tempon, ĝi trovis ĉas-hundon kuŝanta sur la vojo; tiu spiregis kiel iu, kiu kuradis ĝis laciĝo. "Nu, kial vi tiel spiregas, hundego?" demandis la azeno. "Ho," diris la hundo, "vidu: ĉar mi estas malforta kaj ĉiutage pli malfortiĝas, ankaŭ ne plu facile moviĝas dum ĉasado, tial mia mastro volis mortbati min; do mi kuregis for. Sed per kio mi nun meritu mian porvivaĵon?" —

"Aŭdu," diris la azeno, "mi iras al Bremen kaj tie estiĝos urbmuзикisto; venu kun mi kaj akceptu saman pozicion; mi ludos la liuton kaj vi frapos la timpanon." La hundo estis kontenta kaj

ili kune iris pluen. Ne daŭris longe, ĝis kiam iu kato sidis tie ĉe la vojo kaj faris grimacon kvazaŭ estus pluv-vetero dum tri tagoj. "Nu, kio intervenis viajn planojn, maljuna barb-purigulo?" diris la azeno. "Kiu povus esti gaja, se ĝi estus prenita ĉe la gorgo," respondis la kato. "Ĉar mi nun pliaĝas, miaj dentoj malakriĝis, kaj ĉar mi nun preferas sidi malantaŭ la forno kaj mediti, anstataŭ ĉasi musojn, tial mia mastrino volis dronigi min; mi ja sukcesis forkuri, sed nun konsilu kiu povas! Kien mi iru? — "Venu kun ni al Bremen; vi ja scipovas pri nokta muziko, do vi povas estiĝi urbmuŝikisto." La kato konsentis kaj iris kun ili.

Poste la tri vagabondoj preteriris korton; tie sidis sur la pordego virkoko kaj kriis tutforte. "Vi ja kriegas ĝis la interno de l'animo," diris la azeno, "kion vi deziras?" — "Mi ĵus antaŭdiris bonan veteron," diris la koko, "ĉar ja estas la tago de Nia Sinjorino, en kiu ŝi lavis la ĉemizetojn de la krist-infaneto kaj volas sekigi ilin; sed ĉar morgaŭ venos gastoj, la mastrino ne havas kompaton kaj diris al la kuiristino, ke ŝi volas manĝi min morgaŭ en la supo, kaj tial mi lasu ĉi-vespere fortranĉi mian kapon. Do mi krias plengorge dum mi ankoraŭ povas fari tion." — "Kiel stulte, vi ruĝkapulo," diris la azeno, "prefere kuru kun ni, ni iras al Bremen; tie vi povos trovi ion pli bonan ol morton; vi havas bonan voĉon, kaj kiam ni muzikos kune, tio devas esti bona." Al la koko plaĉis la propono kaj ĉiuj kvar nun kune foriris.—

Sed ili ne povis atingi Bremen en unu tago kaj vespere ili venis en arbaron, kie ili volis tranoktiĝi. La azeno kaj la hundo kuŝiĝis sub granda arbo, la kato kaj la virkoko grimpis en la branĉojn, sed la koko flugis ĝis al la pinto, kie por ĝi estis plej sekure. Antaŭ ol ĝi ekdormis, ĝi ankoraŭfoje ĉirkaŭrigardis al ĉiuj kvar ventdirektoj; tiam ŝajnis al ĝi, ke ĝi vidas malproksime flagri etan fajron, kaj ĝi vokis al la kamaradoj, ke domo devas esti tre proksime, ĉar vidiĝas lumo.

La azeno diris: "Do, ni devas denove ekpaŝi kaj iri tien, ĉar ĉi tie estas malbona restejo." — La hundo pensis, ke kelkaj ostoj kun iom da viando estus bonvenaj. Do ili ekiris al la loko, kie la lumo loĝis, kaj baldaŭ ili vidis ĝin brileti pli klare kaj ĝi ĉiam pligrandiĝis, ĝis kiam ili venis antaŭ brile lumigita rabista domo.

La azeno, kiel la plej granda, alproksimiĝis al la fenestro kaj enigardis. "Kion vi vidas, grizulo?" demandis la

koko. "Kion mi vidas," respondis la azeno, "estas tablo kovrita de bonaj mangaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj rabistoj sidas tie kaj iartas bone." — "Tio estus io por ni," diris la koko. — "Jes, jes, ho ke ni estu tie!" diris la azeno. "Nun ili interkonsiliĝis, kion ili devus fari, por elĉasi la rabistojn, kaj fine ili trovis rimedon.

La azeno devis stari per la antaŭpiedo sur la fenestro, la hundo salti sur ia dorson de l'azeno, la kato grimpi sur la hundon, kaj fine la koko flugis supren kaj haltiĝis sur la kapo de la kato. Kiam farite, je signalo ili ĉiuj kune komencis muziki: la azeno blekis, la hundo bojis, la kato miaŭis kaj la koko kriis; poste ili faligis sin tra la fenestro en la ĉambron, ke la vitroj tintis. Ĉe tiu terura bruado la rabistoj eksaltis opiniante, ke iu spirito envenis, kaj ili plentime elflugis en la arbaron. La kvar kamaradoj sidiĝis ĉe la tablo, kontentiĝis je tio, kio estis restinta, kaj manĝis, kvazaŭ ili devos malsati dum kvar semajnoj.

Fininte la mangadon, la kvar muzikistoj estingiĝis la lumon kaj serĉis dormlokojn, ĉiu laŭ sia naturo kaj komforto. La azeno kuŝiĝis sur la sterko, la hundo malantaŭ la pordo, la kato sur la kuirforno en la varma cindro, kaj la virkoko sidiĝis sur la koko-trabo. Ĉar ili estis lacaj por la longa vojo, ili baldaŭ ekdormis. Kiam noktmezo pasis kaj la rabistoj vidis de malproksime, ke ne plu estas lumo en la domo, ankaŭ ĉio ŝajnis esti kvieta, ilia kapitano diris: "Ni tamen eble malĝuste tromp-timiĝis" kaj sendis iun al al domo, por esplori ĝin.

La sendito trovis ĉion kvieta, iris en la kuirejon por ekfari lumon, kaj prenante la ardaĵn fajrecajn okulojn de la kato por ardantaj karboj — li almetis alumeton por ke ĝi kaptu fajron. Sed la kato ne ŝatis tiajn ŝercojn, saltis en lian vizaĝon, kraĉis kaj ĝratis. Tiam li ege timiĝis, forkuris kaj volis eliĝi tra la malantaŭa pordo. Sed la hundo, kiu tie kuŝis, suprensaltis kaj mordis lian kruron, kaj kiam li en la korto preterkuris la sterkon, la azeno donis al li ankoraŭ fortan frapon per sia posta piedo: kaj la koko, kiu pro la bruo vekiĝis, viĝiĝis kaj kriis de sur la trabo: "Kikerikiiiiiii!"

Post tio la rabisto kuris kiel eble plej rapide reen al sia kapitano kaj raportis: "Ho, en la domo sidas terura sorĉistino, kiu alspiregis min kaj per siaj lonqaj finproqj gratvundis mian vizaĝon; kaj antaŭ la pordo staras viro kun tranĉilo, per kiu li pikis mian kruron; kaj en la korto

kuŝas nigra monstro, kiu ekbatis min per ligna klabo, kaj supre sur la tegmento sidas la juĝisto, kiu vokis: "alportu al mi la triponon, frifrifri. . . ." "Iam," li kontinuis, "mi rapide forkuris. . ."

Le tiam la rabistoj ne plu riskis eniri la domon. Sed la kvar Bremenaj Urbmuzikistoj ŝatis la domon tiel, ke ili ne plu volis forlasi ĝin. . . . (Trad. el la germana teksto de Fratoj Grimm) — P. É. Schwerin.

### ROTARIA ASOCIO DE ESPERANTISTOJ

Sub la gvido de Grahame Leon-Smith, kiu estas la Prezidanto de la Brita E-Asocio kaj ankaŭ Rotariano, la supra Asocio estas starigita.

Kiel U.E.A.-rakdelegito por Rotario en Aŭstralio, mi estis elektita reprezentanto de la nova Asocio en nia lando.

La celoj de R.A.d.E. estas:

(1-e) Antaŭenigi la idealojn de Rotaria Internacio kaj faciligi kontaktojn inter Rotarianoj en diversaj landoj.

(2-a) Plivastigi la Internacian Servon de Rotario kaj kunligi la klopodojn de tiu grava organizajo kaj Esperanto por plibonigi internacian komprenigon kaj pacon.

Por pli bone informi Rotarianojn ĉirkaŭ Aŭstralio pri Esperanto, gastparolantoj estas urĝe bezonataj ĉie en la lando, por klubaj kunvenoj. Mi bonvenigos volontulojn, aŭ sinjorojn aŭ sinjorinojn. Bonvolu sendi proponojn kaj informon al mi ĉe 34 Ocean Road, Manly 2095. Mi anticipe dankas pro via kunlaboro.

—Les V. Scott (A.E.A. - Kasisto)

## RECENZOJ

**VIVO DE LANTI** de E. Borsboom; 274 paĝoj; eld. S.A.T., Parizo; prezo \$11.00 ĉe A.E.A.-Libro-Servo.

Jen verko nepre havenda por ĉiu membro de S.A.T.; egale havenda por ĉiu aŭstraliano, kiu memoras personan konatiĝon kun la fondinto de tiu organizo; kaj ne malpli havenda por ĉiu scivolulo, kiu ankoraŭ ne, aŭne sufiĉe informiĝis pri la deveno, kaj evoluo de la S.A.T. movado, kiel ankaŭ pri la forte individua esperantisto, kiu ĝin naskis kaj

gvidis ĝian junaĝan kreskadon. **VIVO DE LANTI** estas pli ol biografio; ĝi estas ankaŭ aŭtentika kaj plendetala historio pri la unuaj jaroj de la tutmonda laborista movado, kies lingvo por internaciaj rilatoj estas Esperanto. La verko estas la rezulto de plurjara, zorga kaj pacienca esplorado, de atenta legado kaj kribrado el vasta amaso da gazetoj diverslokaj kaj korespondajoj de Lanti kun esperantistoj multlandaj, krom kiel eble plej multaj intervjuoj fare de la nederlanda aŭtoro, kies instigon al la tasko vekis hazarda konatiĝo kun la verkaro de Lanti en la hejmo de esperantista gastiganto en Suda Francio.

Tre saĝa, je la parto de la S.A.T.— estraro, ŝajnas la fido pri plenumo de ĉi tiu gava tasko al la manoj, ne de ĝisosta S.A.T.-ano, sed de kvazaŭ neŭtrala observanto — aŭ, laŭ ties priskribo, "novbakita S.A.T.-ano" — kiu siaparte, apenaŭ eviteble espriminte opiniojn pri la evoluo en la ideologio de Lanti, avertis, ke tiuj ne ĉie akordiĝas kun la opinioj de la S.A.T.-gvidantoj. Per la faktoj kaj eventoj priskribitaj interplektite kun citaĵoj el skribaĵoj de Lanti mem, legontoj povos formi proprajn.

La nebigota kronikisto celis prezenti la fortecon egale kun la malforteco kaj de la perseno kaj de ties ideologio, kiel ankaŭ de la aparato — t.e. S.A.T. — kiun Lanti kreis. Krome, li tute ne limiĝis sin al la vivo de Lanti kaj eventoj en la historio de S.A.T., sed zorge esploris la vivojn ankaŭ de kiel eble plej multaj el la ĉef-roluloj en la Movado. Do kune troviĝas, rilate egale disĉiplojn kaj rivalojn aro da biografietoj, kiuj prilumas kaj certagrade pravigas agadon, kiu siatepe ŝajnis kondamninda.

Aparte interesa estas ĉapitro, kiu klarigas la uzon kaj diversecon de pseŭdonimoj de Lanti kaj atentokapta la priskribo kun citaĵoj rilate la multjaran sinokupon de Lanti pri la temo memortigo, kiu fine venkis lin, dum valora, kaj eble instiga al konatiĝo kun la verkoj de Lanti, estas pritrakto de la aŭtoro pri la literatura stilo kaj tradukarto de Lanti, kiu, "ekde la fino de la dudekaj jaroj, laboris sur majstra lingvo-nivelo." Rilate la personecon de tiu franco — ribelulo kontraŭ ĉia naciismo, altcelanto por la tutmonda laboristaro, fine elreviĝinta batalanto — eble lumigaj, certe kortuŝaj estas la vortoj cititaj el letero de D-ro Ross Robbins, iama A.E.A.-Prezidanto, kiu, ankoraŭ komencanto, konatiĝis kun Lanti en Nov-Zelando.



Kiam temas pri la stilo de la aŭtoro, oni ne povas ne senti, ke tiu verkas sub influo aŭ de propra lingvo aŭ de fruaj slavdevenaj verkistoj. Abundas esprimoj, kiaj: "la cirkaŭantaj lin homoj" (p.38); "la modele de li organizita kongreso" (p.58); "pro la pere de S.A.T. propagandata sennaciismo" (p.77); "de kelkaj precipe el Parizaj kamaradoj" (p.96); ktp., kiuj tamen neniel deprenas de la klareco. Oni povas nur miri, ke tiom da informo tiel koncize prezentigis en nur 177 paĝoj. Troviĝas jen kaj jen preseraroj, kiujn mi ne emas listi, car ĉi, kiu kapablas tralegi la enhavon., facile korektos por si mem. Eĉ ŝajnas, ke io forfalas el la manuskripto de paraĝrafo malsupre de paĝo 121, sed jen la sorto de ĉiu, kies fina plenumo de granda tasko dependas de la laboro de aliaj. Tiuj difektoj neniel malpliigas la grandan valoron de ĉi tiu grava aldono al la sekcio prihistoria en la Esperanto-literaturo.

Bonmezure aldoniĝis al la 177-paĝa biografio de E. Borsboom, 70-paĝa aŭtobiografia fragmento kode verkita de Lanti mem plus ŝlosilo, krom fotoj kaj pluraj klarigaj kaj utilaj resumaj aneksaĵoj.

—Fay Koppel

"TRANSCOCEANA", Revuo de la Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto.

Dum la pasintaj 25 jaroj plauraj aŭstralaj esperantistoj provis eldoni gazeton ĉefe destinitan por "instruistoj". Kelkfoje aperis nur du ekzempleroj en la dujara periodo inter 2 kongresoj, kelkfoje la multobligado estis fuŝe farita, kelkfoje la teksto estis nur kopiaĵo el aliaj Esperanto-gazetoj.

Tute kontraŭe TRANSCOCEANA estas bone redaktita kaj bone multobligita revuo, kiu provas vere eduki kaj ĝi bone taŭgas por grup-laboro. Gratulon al la redaktanto kaj Prezidanto de PAPIE. Trevor Steele. Subtenu lian bonan laboron per abono, sendante \$4.00 al 3 Woodridge Street, Moorooka, 4105.

Iu provincano venis al Parizo. Li eniris en luksan restoracion. La kelnero rapidis doni al li karton kun la menuo.

"Mi havas nur dek frankojn", diris la provinculo, "kion vi povas rekomendi al mi?"

"Alian restoracion, sinjoro", severe respondis la kelnero.

## IMPORTANT ANNOUNCEMENTS

The Chief Delegate of the Universal Esperanto Association, Mr. Ken Linton, wishes to advise all members that, owing to several causes, but chiefly devaluation of the Australian dollar, he is still unable to announce subscription rates, but will send out the usual circular as soon as possible. In the meantime, please do not make payments as it will only necessitate extra postage and save no time.

Mr. Tom Elliott, Book Agent of A.E.A. (8 Lone Pine Parade, Matraville, 2036) announces that due to the devaluation of the Australian Dollar, book prices will eventually rise by 17½%.

Also, please note the Banks now charge 20 cents to cash each postal note. Do NOT cross Postal Notes or Money Orders; make them payable at MAROUBRA, 2035.

## KOTIZOJ ESTAS NUN PAGENDAJ

Kiel prizorganto de la kaso kaj financaj aferoj de A.E.A., mi petas ĉiun leganton pagi la asocian kotizon por 1977 kiel eble plaj baldaŭ.

Bedaŭrinde, pluraj membroj ne pagis sian kotizon por 1976 kaj la Asocio devas informi tiujn, ke ili NE ricevos plian "A.E." Gazeton post ĉi tiu eldono krom se la kotizo estos pagita. Se kruco aperas en la kvadrato sube, tio indikas, ke vi ŝuldas la kotizon, kiu inkludas la abonon al "Aŭstralia Esperantisto".

Kotizoj estas: **Individua membro aŭ familio: \$10.00; Pensiulo aŭ junulara membro: \$5.00.** Sendu vian pagon al la subskribinto. Via pago estos bonvena, kaj mi anticipi dankas vin pro via subteno. Memoru ankaŭ: Varbu kaj vartu novajn membrojn, almenaŭ unu por ĉiu!

—Les Scott (A.E.A. Kasisto),  
34 Ocean St., Many, 2095.

Kruco indikas  
nepagintan membron

Dum la plumbisto taksis la taskon, kiun fiksi ni lin vokis, li rigardis el la fenestro al la ĝardeno, kiu estis plena de infanoj. "Ĉu ĉiuj apartenas al vi?" li demandis.

"Ne," mi respondis.

"Bone," li komentis, "se jes, vi certe ne povus toleri la elspezon por la laboro"

### La 63-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj

(De nia japana korespondanto  
Bun'ichi Iizaki)

La 63-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazis inter la 21-a kaj 22-a de aŭgusto en SETO (apud Nagoya), en la meza parto de Japanio. Aligis 468 gesperantistoj, el kiuj 3/3 fakte ĉeestis, inter ili 8 eksterlandaj gastoj, nome 2 el Britujo, 3 el Koreujo kaj po unu el Usono, Germanujo kaj Pollando.

Kongresejo estis la impona, luksa, kultura kolegio por laboristoj, kies modernaj ekipaĵoj estis je la dispono de la kongreso. Malfernis ĝin S-ro Niwa Masahisa, ĉef-organizanto de la kongreso. Saluti la estro de Gubernio Aĉiken, la urbestro de Nagoya kaj la Unesko-Societo de Nagoya. Okazis du prelegoj: S-ro Masao Abe, Lektoro de Internaciologia Fakoj de Tokai Universitato, parolis pri "Arabaj landoj kaj Japanio" kaj S-ro Cukui Hideki parolis japanlingve pri "La Mondo de Esperanto kaj mi".

Pri la 2-a Pacifika Kongreso okazis longa diskuto. S-ro Eizo Ito (de Oomoto) kaj S-ro Seitaro Sindo (de la Esperanta Servo-Centro, Osaka) prezentis la proponon inviti la 2-an Pacifikan Kongreson al Japanujo. La diskuto daŭris kelkajn horojn, sed tamen oni ne povis atingi definitivon. Oni rekomendis al la proponitoj, ke ili faru alian proponon ĉe la venonta kongreso.

La "Ossaka Premio" ĉijare estis donita al S-ro Sihei Mijake, kiu laboris dum longa tempo kiel ĉefsekretario de Japana Esperanto-Instituto, sub malfacilaj kondiĉoj kaj mizera salajro. Ĉefdirektoro de JEI, D-ro F. Egami transdonis la premion al S-ro Mijake.

Oni decidis ke la venonta kongreso estu en Tokio je 27-a kaj 28-a de aŭgusto, 1977. La kongresa komitato jam fandiĝis kaj elektis SS-inon Yukiko Iŝobe kiel ĉef-organizon.

## Gramatike -

Iu demandas, kial oni skribas "mi iras Londonon", sed "mi iras hejmen" anstataŭ "mi iras hejmon". Tiun demandon mi ne povas respondi kategorie, sed mia opinio estas, ke la esprimo "hejmen" signifas "en la propran hejmon" sed "hejmon" povus signifi "en

la hejmon de kiu ajn". Estas interese, ke oni re malofte trovas aliajn derivitajn adverbojn, kiuj alprenas la akuzativon de almovo, kiun oni ja regule almetas al la tabel-adverboj: "ie, tie kie" k.t.p. Ĉu oni devas supozi, ke ĉe "hejmen" Zamenhof influigis de la rusa lingvo, en kiu ekzistas la vortserio: "dom, domo aŭ hejmo: doma, hejme: kaj domoj, hejmen."  
—K.G.L.

Mi ofte rimarkas, ke eĉ kleraj francaj Esperantistoj diras "ne ankoraŭ, kiam ili evidente intencas "ankoraŭ ne"; sendube sub la influo de la franca "pas encore". "Ankoraŭ ne mortis" signifas "still has not died", dum "ne ankoraŭ mortis" signifas "is not still dead", kio estas absoluta neebleco. "Ankoraŭ ne manĝis" signifas "still has not eaten", dum "ne ankoraŭ manĝis" signifas "was not still eating", kion ni povas multe pli bone esprimi per "jam ne manĝis" — "was no longer eating". — K.G.L.

Kiam mi vidis la faman teatraĵon "Oberammergau" lastan someron, fulmotondro sin preparis por eksplodo dum la longa prezentado, sed la geaktoroj tute ne atentis la minacantan nubegon. Profunde emocie la spektantaro sekvis la krucumadan scenon. Tuj post kiam la mortanta Kristo diris sian: "Estas finite," la fulmo frapis ĝuste malantaŭ la scenejo, sekvata per laŭtega ton-drego. La spektantaro rigidiĝis pro timo. Baldaŭ poste mi aŭdis maljunulinon diri: "Mia vorto! Ĉi tiuj personoj bone scias kiel produkti efikojn, ĉu ne?"

La urbo, kie mi edukiĝis, fieris pri tre efika fajrobrigado. Tamen, kiam la sireno sonoris, ĉiuj enloĝantoj eniĝis en siaj aŭtoj kaj sin veturigis al la sceno de la fajro, tiel tre malhelpante la brigadon. Oni metis anoncon en la loka ĵurnalo, sed tute senefike.

Unu tagon, kiam la sireno sonoris, ni ĉiuj kiel kutime kuris al niaj aŭtoj kaj sekvis la brigadon, kiu finfine eniris senelirejan straton. La brigadanoj saltis el la fajraŭto kaj kuris al la enirejo de la strato, kie ili atendis la grandan homamason, kiam ili klopodis eliri la straton, kaj vendis al ili biletojn por la fajrobrigada danco. Kia rekorda ĉeesto estis ĉe tiu danco!

# NEWS - DIGEST

**SUMMER UNIVERSITY:** The third session of this year's Summer University Course held in the international language was conducted at Wilrijk, Belgium on the campus of the University of Antwerp. The courses given revolved around Mathematics, Sociology, and Biology. In all there were 15 courses, each averaging eight lectures of 45 minutes' duration.

The seven instructors who lectured in the international language came from Norway U.S.A., U.K., Belgium, Hungary and Poland. In future Summer University Courses there will be Geology, Astronomy and Psychology.

**GIVE BLOOD!** That's the message being given in a brochure which was recently published by the Republican Committee of the Red Cross of Macedonia in conjunction with the Skopje branch of the Macedonian Esperanto Club. The two-colour brochure invites Esperantists to give blood.

**NATURE LOVERS:** The Austrian Esperantist Nature Lovers group, TANEF, celebrated their golden jubilee last March by climbing mounts Rex and Schneeberg. Fifty Esperantist nature lovers from Vienna and lower Austria took part in the activities.

**HAVING A BALL:** For two days, starting February 12th, 1977, the 11th Esperanto Carnival will be held at Gyor, Hungary. There will be a ball.

**DID YOU KNOW?** That the first street to be named after the founder of Esperanto was inaugurated in Sabadell, Spain on July 14th, 1912.

**TRAVELLING THEATRE:** The Paris Esperantists' Theatre played Antwerp, and Liege in Brussels last May. Their programme of plays in the international language included those of Jean Cocteau and Florian.

**ESPERANTISTS JACK UP:** The International Esperanto Automobile Club (IEKA) wants more Esperantist motorists to join their group as Autoservice Delegates — but they point out that an Autoservice Delegate's obligations to visiting Esperantists run to contacting repair shops and interpreting only . . . and not to doing the repairs themselves! IEKA currently reports a membership of 1,006 mainly based in Western Europe and Argentina.

**ARGENTINE ADS:** Argentinian Esperantist Hugo O. Lingua got 400 replies from his advertisement for an Esperanto correspondence course in the newspapers of Colombia and Costa Rica. Surprisingly, the bulk of those who subsequently took part in the correspondence course turned out to be school teachers.

**ANTIHERO:** The adventures of the mischievous German antihero, Til Eulenspiegel, have been translated into the international language by Richard Schulz. Publication will be by Bleicher, and is scheduled for 1977.

**RUMANIAN RUMOUR:** The whisper from Jenö Zagoni is that the Rumanian Government authorities will shortly give their assent to a national Rumanian Esperanto Association being formed.

**SOVIET COURSE:** Grigorij Gercikov is now running an Esperanto Course at the state conservatorium in Alma Ata, the capital of Kazakhstan. It will be the Alma Ata students' Alma Mater (ouch!).

**LUXEMBURG:** Another Esperanto course is being run at the European School of Strassen, Luxemburg by the Esperantist, Hubert X. L. Drabs.

**AIRWAVES:** Two parts from the airwaves — Vatican Radio's shortwave Esperanto at midnight segment is now presenting hymns in the international language. Austrian Esperanto broadcaster Emil Vokal recently celebrated thirty years behind the microphone.

**ANOTHER COMPETITION:** Radio Poland is again offering an expenses-paid 10-day tour of Poland for the Esperantist who submits the best answers to three questions which deal with that country's products and services. Entries close January 31st, 1977, details from Polskie Radio, Warszawa.

ITRA: It's Those Railwaymen Again. The 20th annual get-together of the German Esperantists' Railwaymen's Association (GEFA) was held at Paderborn, West Germany during October. They ran three activities in parallel due to the shortness of time. There was a visit to Paderborn's Languages Institute; a guided tour of the River Pader; or the chance to sit in on the deliberations of the Executive Committee Meeting. Afterwards, all three groups regathered on the forecourt of the Paderborn Town Hall to hear the municipal wind orchestra.

FILM FILM: The photographic firm of Agfa-Gevaert has just released a slide-and-tape presentation of their products using the international language for the commentary. Congress organisers who want to demonstrate the commercial

effectiveness of Esperanto (and Agfa Products) can hire the presentation free of charge from Agfa-Gevaert N.V., Mortsel, Belgium.

RETRACTION: In our last News Digest we reported the unveiling of a bust of Dr. Zamenhof by Edoardo Speranza at Castle Malaspina. Mr. Speranza is not Italy's Assistant Minister for Agriculture but is (and we quote from Pilo Press): Sottosegretario di Stato al Ministero di Grazia e Giustizia. We regret the error.

REMEMBRANCE: During this year's Day of the Dead in Warsaw, the executive committee members of the Polish Esperanto Association laid a floral tribute on the grave of Dr. Zamenhof.

CREDITS: Thanks to Pilo Press, ASLE, and SAT.

Interesta por ĉiu klera esperanto:

## INTERNACIA JURA REVUO (IJR)

Jam la 13-an jaron aperadas **Internacia Jura Revuo**, sendube unu el la plej gravaj fakaj periodaĵoj en la Internacia Lingvo. La revuo estas organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, sed ĝin povas aboni ankaŭ nejuristoj. Ĝi estas 48-paĝa (plus kovriloj) kaj aperas du fojojn jare kun varia enhavo, ĉefe en la sferoj de jura teorio, kompara juro kaj internacia juro. Ekzemple, n-ro 1/1976 enhavas ampleksan artikolon "Atingoj kaj Malsukcesoj de Unuigintaj Nacioj", dum la aliaj artikoloj rilatas al laborprotekto laŭ la juro de kelkaj landoj, al kompenco pro damaĝoj kaŭzitaĵoj per akcidentoj, proprietaj rilatoj inter geedzoj, strukturo de la parlamento en Hungario, grupaj deliktoj de junaĝuloj, la jura pozicio de skabeno.

Ekde n-ro 2/1976 estos enkondukitaj kelkaj novaj rubrikoj: **notoj** pri internacie interesaj juraj eventoj, precipe en ligo kun la lingva problemoj; **recenzoj** pri fakaj verkoj publikigitaj en kiu ajn lingvo; **glosaroj** pri juraj terminoj; **informoj** pri IEAJ.

La nuna redaktoro estas Prof. D-ro Ivo Lapenna (universitato de Londono), dum la teknika redaktoro estas Kand. jur. Tom Arbo Hoeg. La revuo estas presata en la presejo de la Universitata Biblioteko en Oslo. La membroj de IEAJ (jara kotizo 120 aŭstriaĵ ŝilingoj)

ricevas la revuon senpage, kaj la jara abonprezo por nemembroj estas, same tiel, 120 aŭstriaĵ ŝilingoj. Kvankam faka, tamen, laŭ la prezentomaniero de la temaro, la periodaĵo estas populara kaj facile komprenebla por ĉiu iom interesita klera persono. La Estraro de IEAJ alvokas ĉiujn juristojn-esperantistojn aliĝi al Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, sendependa kaj politike neŭtrala faka organizaĵo. La Estraro ankaŭ esperas, ke multaj en la Esperanto-Movado, kvankam nejuristoj, abonos la du numerojn de 1976 kaj fariĝos regulaj abonantoj.

La kotizojn por IEAJ kaj la abonojn por **Internacia Jura Revuo** akceptas la sekretaria-kasisto D-ro Klaus Perko, Lendkai 111.A-8020 Graz, Aŭstrio, Poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

Kutimoj ŝanĝiĝas. Iam estis mode bani ĉiusemajne kaj preĝi ĉiutage.

La famekanta tenoro malsaniĝis, sed li feliĉe trovis anstataŭanton. Ties unuan arion li devis ripeti por tondra aplaŭdo. Ankaŭ duafoje li devis ĝin ripeti, sed kiam la bisoj ankoraŭ ne ĉesis,, li paŝis al la rando de la podio kaj diris: "Mi petas pardonon, sed kvarfoje mi ne povas ĝin ripeti." Tiam eksonis kria voĉo: "Jes, ja, fuŝulo, vi ĝin kartos, ĝis vi lernos ĝin kanti korekte."